

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and  
pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 160 (240)

MELBOURNE

Jan./Feb., 1978

## LA 21-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO EN LAUNCESTON

2-a — 8-a JANUARO, 1978

Trankvila kunestado de la "Familia Rondo"

Kiel agrabla zefiro post lacige varmega tago, la semajno de la 21-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso alvenis kaj forpasis. Ĝia trapaso ne estis tute sen bruo, ekzemple ĉe la televido kaj en la lokaj ĵurnaloj, sed la bruo espereble havos nur bonajn efikojn. Dume la formorto de la kongresa periodo lasis la partoprenintojn refreŝigitaj kaj denove in-spiritaj pro tiu mallonga restado en Esperantujo inter la samideanaro.

Nepre gratulinda estas la vere malgranda sensperta loka grupo, kiu du jarojn antaŭe kuraĝis akcepti la respondecon gastigi la kongreson; kiu certe ne tute senzorge entreprenis la taskon okazigi ĝin; kaj kiu sendube alfrontis sufiĉe da malfaciloj dum la dujara preparado. Se la fina programo ne ĉiam evoluis tute laŭ hortabelo, kaj, se el aferkunsidoj ne rezultis tre frapaj decidoj kaj atingoj, tio ŝuldiĝas al vizitantoj aŭ cirkonstancoj egale, aŭ eĉ pli ol, al organizintoj.

Ĉiu situacio havas malavantaĝojn kaj avantaĝojn. Okazigi kongreson en unu anĝulo de nia vasta kontinento havas la malavantaĝon, ke anoj el aliaj ekstremoj ne povas amase alveturi; sed malpli granda ĉeestantaro signifas avantaĝon en etoso pli familie intima. Ankorau unu avantaĝon povis prifanfaroni tiu

bela kongresurbo Launceston, unu el kies sendube multaj jam eminentaj idoj, estas S-ro Ralph Harry, C.B.E., Aŭstralia Ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko. Ties ĉeesto dum la kongreso ne nur estis granda instigo al la kongresanaro, sed multe aldonis al la prestiĝo de la kongreso kaj ties intereso por la publiko.

Ĝojiga aspekto estis la nombro da pli junaj anoj inter la organiza grupo. Bedaŭrinde, ke la plej juna, Chris Le Fevre, antaŭ la komenco, mispaŝis kun piano, vundis piedon kaj ne plu povis aktive partopreni. Ni esperas, ke intertempe li tute resaniĝis.

Aliĝis al la kongreso 92 ĝesamideanoj, el kiuj fakte ĉeestis 75. Laŭŝtate venis el Viktorio 19, el Nov-Suda Kimrujo 19, el Kvinŝtato 15, el Tasmanio 12, el Okcidenta Aŭstralio 7, el Kanbera 2 kaj el Nov-Jorko alflugis S-ro Ralph Harry.

Ĉiuj vizitantoj loĝis tre komforte en la preskaŭ nova "Tasmanian College of Advanced Education", en la antaŭurbo Newnham, kampareca situacio apud la rivero Tamar. Krom apartaj bone ekipitaj loĝdomoj, estis uzublaj, en impona administra centro, komuna manĝejo, granda prelegejo, klasĉambroj, moderna teatro kaj granda akceptejo, kie oni registris delegitojn kaj kie Tom Elliott starigis ampleksan libro-vendejon.

Lundon (2/1) la kongres-programo kuncenciĝis per Film-Vespero. Du filmoj montris diversajn panoramojn pri Tasmanio, dum la tria estis la Esperanto-filmo "Aŭstralia, Lando ĉiam ŝanĝiganta" kun la voĉo de S-ro P. E. Schwerin.

#### Inaŭguro de la Kongreso

Marde (3/1) okazis la oficiala malfermo de la kongreso. Prezidanto R. Robertson bonvenigis la ĉeestantojn kaj prezentis al la kunveno la honor-gaston, la Vic-Urbestro de Launceston, Skabenon T. D. Room. La Vic-Urbestro petis pardonon ke la urbestro, Skabeno Max Cleaver, forestas el Launceston kaj ne povas ĉeesti. Li ankaŭ petis la pardonon de la vizitantoj pro la malvarma vetero. Skabeno T. D. Room emfazis la kreskantan bezonon de pli facila komunikilo por internaciaj rilatoj, al kiuj Esperanto bone taŭgas. Li bonvenigis la kongresanojn al Launceston, deziris al ili gvidan restadon kaj sukcesan konferencon. Forirante li esprimis deziron revidi ĉiujn en la posttagmezo en la Urbdomo pro la urbestra akcepto.

Post mallonga paŭzo Prof. R. Robertson daŭrigis la inaŭguron per bedaŭ respirmoj de forestantoj. Li petis la ĉeestantojn observi unu minuton da silento por la mortintaj gesamideanoj dum la pasintaj 2 jaroj: S-inoj Alfreda Brown (Sydney), Jessie Feldmayr (Sydney), Pearl Hanks (Melbourne), Freda Smith (Sydney), Leila Woodruff (Moree, NSW), S-roj Lester Bankston (Adelaide), Alfred Roy Cohen (Tweed Heads), William M. Howard (Perth), Stan Milligan (Melbourne), Henk Schepers (Won Wron, Vik.).

Sekvis la salutoj de la reprezentantoj de la diversaj organizaĵoj. Nome de U.E.A. salutis S-ro K. G. Linton; nome de S.A.T. S-ro V. Guelting; S-ino Sybil Martin, nome de la Int. Katolika Unuiĝo; S-ro W. Chandler, nome de la Veteranoj kaj de O.R.E.; S-ro Ray Ross (E-Fed. de Kvinslando); S-ino Eunice Graham (Fed. de N.S.K.); S-ro R. Reed (Fed. de Vik.); F-ino Edith Kerr (Launceston E-Klubo); S-ro C. Dean (E-Ligo Perth); S-ro Don Pescod (Malvern); F-ino Margaret Sanders (Oakleigh); S-ro Herbert Koppel (Melbourne E-Societo); S-ro W. Wybenga (Morwell); S-ro Tom Elliott (Sydney E-Societo); S-ro Arthur Cocking (Manly E-Klubo); S-ino M. Ross (Brisbane E-Societo); S-ino I. Lehane (Toowoomba); F-ino Joyce Turner (Rockhampton);

S-ro John Moore (Kaprikornia E-Grupo); S-ro E. Loorits (Hobart).

Finiĝis la inaŭguro per la kantado de la Esperanto-Himno.

#### Urbestra Akcepto

Proksimume je la 5-a p.t.m. de la inaŭgura tago (3/1), la kongresanoj bele vestitaj, per 2 aŭtobusoj ekveturis al la Urbdomo. Tie en bonorda procesio gvidata de Prof. Robertson kaj Ges-roj M. Le Fevre kiel reprezentantoj de la loka grupo, ili digne kaj salute preterpasis Skabenon kaj S-inon Room, kiuj atendis bonvenige ĉe la pordo de eleganta salono. Interne, post iom da ĉirkulado kaj babilado, dum oficistoj servis trinkaĵojn kaj la vizitantoj servis sin mem el teleroj sur disaj tabletoj, lia moŝto la Vicurbestro formalde esprimis bonvenon kaj i.a. diris ke "la urbestro, Skabeno Max Cleaver, ne povas persone ĉeesti, ĉar li ĵus vizitas per amika militŝipo, alian 'amikan insulon' norde de Tasmanio." Li ankaŭ esprimis la esperon baldaŭ bonvenigi en Launceston Universalan Esperanto-Kongreson. Prof. R. Robertson, nome de A.E.A., danke respondis.

#### Labor - Kunsidoj

Okazis 4 A.E.A.-kunvenoj kaj po unu U.E.A., S.A.T. kaj O.R.E.-fakkunvenoj. Prof. R. Robertson malfermis (3/1) la A.E.A.-Generalan Kunvenon. La Vic-Sekretario (S-ro Herbert Koppel), alterne kun sia edzino, legis la protokolon de la lasta ĝenerala kunveno 1975 en Melbourne . . . akceptita).

Detalan raporton pri la agado de A.E.A. dum 1976/77 donis la Aganta Sekretario, S-ro Les Scott (vidu aliloke). Li ankaŭ prezentis sian raporton kiel Kasisto, kiun legantoj ankaŭ trovas sur alia paĝo de nia gazeto. Ambaŭ raportoj estis unuanime akceptitaj kaj la ĉeestantoj esprimis dankon al Les pro ties grandega laboro en du gravaj oficoj.

La estro de la Libro-Servo (S-ro Tom Elliott) prezentis raporton pri sia multfaceta laboro, tiel grava por la glata kaj daŭra funkciado de kursoj kaj kluboj. Lia plej granda malfacilaĵo estas la galopanta inflacio, kiu necesigas daŭran ŝanĝon de la libro-prezoj. S-ro K. Linton gratulis Tom pro la kolosa tasko plenumita.

S-ro L. Scott proponis la kombinon de la postenoj de Kasisto kaj Sekretario. S-roj H. Koppel kaj K. Linton avertis ke

la tasko estos tro granda por unu persono. Okazis vigla diskuto pri la problemo. La Prezidanto (Prof. R. Robertson) demandis ĉu iu ĉeestanto estus preta akcepti la postenon de la sekretario. Neniu volontulo sin prezentis S-ino P. Guy (Rockhampton) demandis "Ĉu ni devus ŝanĝi la Statuton de la Asocio, se ni kombinus la 2 postencojn?". S-ro H. Koppel klarigis ke fakte ni ja devus ŝanĝi la Statuton kaj tio kostus pli ol cent dolarojn en preskostoj. S-ino Guy proponis kaj S-ro Koppel subtenis la proponon ke ni lasu la Statuton de la ĝi nun estas, sed ke ni elektu aparte por ambaŭ oficoj. S-ro L. Scott diris ke tio estas eble la plej bona solvo de la problemo. S-ro W. Chandler proponis ke ni voĉdonu pri la propono. S-ro K. Linton subtenis kaj la kunveno akceptis la proponon unuanime.

Sekvis la elekto de la nova Estraro. S-ro W. Chandler, kiel Nestoro de la aŭstralia movado, gvidis la elekton por la nova prezidanto. S-ro K. Linton proponis Profesoron R. Robertson kiel Prezidanton subtenis (S-ino E. Matasin), kiu estis unuanime reelektita. Prof. R. Robertson nun gvidis la elektadon de la aliaj oficistoj. S-ro E. Looirits proponis S-ron I. Maddern kiel Vic-Prezidanton (subtenis S-ino E. Matasin). S-ro R. Ross proponis S-ron K. Linton kiel Vic-Prezidanton (subtenis S-ro L. Scott). S-ro Tom Elliott proponis S-ron L. Scott kiel Sekretarion (subtenis S-ro J. Moore), S-ro T. Elliott proponis S-ron L. Scott kiel Kasiston (subtenis S-ino E. Matasin). S-ro L. Scott proponis helpantojn por specialaj taskoj. Li proponis kiel estron por Korespondaj Kursoj S-ron J. Moore (subtenis S-ro R. Ross). Por plenumi korespondpetojn S-ro T. Elliott proponis S-ron B. Cleminson (subtenis S-ino E. Graham). S-ro T. Elliott proponis ke S-ro L. Scott havu rajton koopti helpantojn laŭbezone, kun la permeso de la Prezidanto kaj unu Vic-Prezidanto (akceptita). S-ro J. Matasin proponis S-ron T. Elliott kiel Libro-Servanton (subtenis E. Looirits). S-ro T. Elliott proponis S-ron K. Linton kiel Cef-Ekzameniston (subtenis S-ino Einihovici). S-ro T. Elliott proponis S-ron H. Koppel kiel Redaktoron kaj Vic-Sekretarion (subtenis S-ro J. Matasin); S-ro A. Cocking proponis S-rojn V. Guelting, V. Timmins kaj R. Ross por la Honoriga Komisiono (subtenis F-ino D. Hasluck). S-ro V. Guelting proponis S-ron A. Cocking kiel Kaskontroliston (subtenis T. Elliott). La membraro voĉdonis kaj unuanime elektis

la sekvantan novan Estraron:  
 Prezidanto: Prof. R. Robertson (Manly)  
 Vic-Prezidantoj: S-ro K. Liiton  
 (Melbourne)  
 S-ro I. Maddern (Morwell)  
 1-a Sekretario: S-ro L. Scott (Manly)  
 2-a Sekretario kaj Redaktoro: S-ro H. Koppel (Melbourne)  
 Kasisto: S-ro L. Scott (Manly)  
 Libro-Servo: S-ro T. Elliott (Sydney)  
 Korespondaj Kursoj: S-ro J. Moore  
 (Emu Park, Q'ld.)  
 Help-Korespondanto: S-ino B. Cleminson (Manly)  
 Cef-Ekzamenisto: S-ro K. Linton  
 (Melbourne)  
 Honor-Komisiono: S-roj V. Guelting, V. Timmins (Sydney) kaj S-ro R. Ross (Brisbane).  
 Kaskontrolisto: S-ro A. Cocking (Manly)

Vigla diskuto okazis pri la financa stato de la Asocio kaj la neceso de plialtigo de la membro-kotizoj. Speciala Sub-Komitato detale pritraktis la situacion kaŭzitan de la nuna inflacio. Post zorga pritrakto de ĉiuj punktoj, S-ro K. Linton prezentis la skvantajn proponojn.

- (1) Membro-Kotizo por individuaj membroj, kluboj kaj Federacioj (inkludante Pensiuojn): \$12
- (2) Plentempaj Studentoj: \$8.
- (3) Korespondaj Kursoj:
 

Elementa	\$15
Mezgrada	\$19
Supera	\$27

S-ino P. Guy proponis la akcepton de tiuj proponoj (subtenis S-ro A. Cocking) La membraro voĉdonis baj unuanime akceptis la proponojn.

S-ro K. Linton daŭrigis la proponojn de la Sub-Komitato:

- (4) Ekzamenoj: Elementa \$8 (Skriba \$3, Parola \$3, Diplomo \$2).  
 Supera \$11 (Skriba \$4, Parola \$4, Diplomo \$3)  
 Klereca \$20 (Tezo \$5, Skriba \$5, Parola \$5, Diplomo \$5).

S-ro M. Leereveld proponis akcepton de tiu propono (S-ino Jean Lehane subtenis) La membraro voĉdonis kaj unuanime akceptis la proponon.

S-ro L. Scott proponis ke ni dediĉu \$500 por reklamado de la Korespondaj Kursoj kaj ke S-ro J. Moore havu la rajton elekti pri la speco de reklamo. S-ro T. Elliott subtenis la proponon kaj la membraro unuanime akceptis la proponon.

**Simpkita Memoriga Fonduso:** S-ro H. Koppel (nome de la Melburna E-Societo) proponis ke la sumo de \$1578, kiun

A.E.A. heredis el la testamento de S-ro W. Simpkins, estu investita en sekuraj obligacioj kaj la interezo el ĝi estu administrata de 3 Kuratoroj, kiuj ĉiujare donacos Esperanto-Librojn al bibliotekoj. Per tiuj libro-donacoj ni povos atingi milojn da homoj, kiuj nuntempe ne povas trovi Esperanto-librojn en siaj bibliotekoj. S-ino I. Einihovici diris ke ni ne lasu la monon en la kanko, sed ke ni elspezu ĝin propagandcele. Sekvis vigla diskuto, preskaŭ disputo, dum kiu la plimulto opiniis, ke per elspezo de la kapitalo ni malmulton rikoltos, kion jam montris la pasinteco. S-ro M. Leereveld proponis ke ni ne faru ion per la mono dum la sekvantaj 2 jaroj. Fine S-ro I. Maddern proponis kaj S-ro T. Elliott subtenis, ke la Estraro esploru la aferon dum la venontaj 2 jaroj.

S-ro H. Koppel proponis ke la A.E.A.-Adresaro aperu ne pli frue ol en majo por ebligi ĝisdatigon de la Adresaro. Subtenis la proponon S-ro T. Elliott kaj la propono estis akceptita.

Prof. R. Robertson proponis ke la 22-a Aŭstralia E-Kongreso okazu en la unua semajno de januaro 1980 en unu el la Sidnejaj Universitatoj. Subtenis S-ino E. Matasin kaj la ĉeestantoj akceptis la proponon.

S-ro H. Koppel proponis ke A.E.A. subvenu la klopodojn de S-ino J. Lthane rilate la organizadon de Someraj Kursoj en januaro 1979 en Toowoomba. S-ro V. Gueltling subtenis kaj la kunveno akceptis la proponon.

La **U.E.A. Kunvenon** gvidis la aŭstralia ĉefdelegito, S-ro K. G. Linton. Li raportis, ke multaj aŭstralanoj partoprenis la lastan kongreson en Reykjavik kaj li donis ĝeneralan raporton pri kotizoj kaj la venonta kongreso en Varna. La lokaj delegitoj raportis malmulton pri loka agado. S-ro John Moore resumis plej bone la situacion kiam li diris "Mi nur povas raportiti, ke mi havas nenion por raportiti."

La **S.A.T. Kunveno** multe suferis pro la samtempa okazigo de la O.R.E.-fak-kunveno. Peranto V. Gueltling havis nur 3 aŭskultantojn, kiam li klarigis la celon de S.A.T. kaj anoncis la kotizojn por 1978.

S-ro W. Chandler gvidis la fakkunvenon de la **Ornitologia Rondo E-a** (O.R.E.) Li priskribis la laboron de la Studgrupo por Natur-Protoktado. Membroj tradukis artikolojn el naciaj gazetoj por la ORE-organo "La Mevo", aŭ tradukis anglajn artikolojn el "La Mevo". S-ro Chandler alvokis membrojn kandidatiĝi por la Premio Simondetti, kiu jam trifoje en 10 jaroj venis al Aŭst-

ralio. Komunlingvo Nomaro de Aŭstraliaj Birdoj estas nun prespreta kaj membroj okupas sin per preparado de Ornitologia Terminaro. Kotizoj por O.R.E. estas: Individuaj membroj \$5.50, Geedzoj \$8.25, por ĉiu alia membro en familio \$2.75. Familioj ricevas nur unu ekzempleron de "La Mevo" kaj de "La Suda Mevido".

Sendu kotizojn al: S-ro E. W. Chandler, 57 Northcote St. Naremburn, 2065, aŭ al S-ino B. Cleminson, 20 Stirgess Ave., Harbord, 2096.

### Prelejoj

Pro diversaj kialoj, prelejoj komenciĝis nur vendredon matene, kaj tre oportune, ĉar tiu estis la sola tago, kiam la vetero ne indulgis la kongreson. Pluvego daŭris preskaŭ senhalte ĝis post la lunchoro kaj kongresanoj estis dankemaj pro la subtegmeta programo.

S-ro Ralph Harry komencis la serion kaj sub la titolo "Esperanto kaj la Diplomatio" priskribis spertojn pri la lingvo en kvin kontinentoj dum sia kariero kiel diplomato. Ties informoj enhavon legu entute en venonta numero de "A.E."

Post la tepaŭzo, D-ro Einihovici anoncis sian titolon "La Movado, la Lingvo, la Literaturo", kaj tuj avertis ke lia parolado eble dolorige kontrastos kun la pli optimisma parolado de S-ro Harry. Li aludis al "La Espero" kaj "La Vojo" de D-ro Zamenhof. En la unua vidigaĵo la idealisto, en la dua la realisto, kiuj ambaŭ karakteroj kombiniĝis en la kreinto de Esperanto. Koncerne la Movadon, evidentiĝas la unua motivo, sed por esti realismaj ni devas agnoski, ke la Movado ne progresas bone. Kiel trovi metodojn por plibonigi la situacion?

Nepra kondiĉo estos harmonia kunlaboro, ne tiom da ĉagreno pro fuŝetoj. Pli oftaj, pli intimaj konferencoj povos esti pli efikaj ol Univ. Kongresoj. Ne prediku, nia devizo estu "Apliku". Rilate la Lingvon, restas kialo por optimismo, ĉar neniu alia projekto faris eĉ etan progreson. Kiam temas pri la Literaturo eble la poezio estas la plej altnivela atingo de la lingvo, sed oni malpli emfazas la perfektecon. La espero povas resti nur ĉe la junularo kaj estontaj generacioj.

Posttagmeze F-ino Margaret Sanders montris diapozitivojn kaj parolis pri duk vizito kun la patrino en Bulgario, kie per floroj kaj speciale bakita kuko, akceptis kaj gastigis ilin malnovaj geamikoj — multjaraj korespondantoj.

Similan prezentadon pri transmaraj spertoj faris vespere Prof. R. Robertson,

montrante bildojn pri la antaŭkongreso en Stirling (Skotlando) kaj la Univ. Kongreso en Reykjavik. Vidu artikolon aliloke.

Ankoraŭ unu vojaĝrakonto kun diapozitivaj estis donita de F-ino Ann Hearn sabatan posttagmeze. Si parolis pri "Spertoj transmare kun Esperantistoj kaj neesperantistoj." Si kunportis sondendajn salutojn de esperantistoj en, kaj diapozitivajn pri Aŭstralio. En Danlando ŝi renkontis plumamikon, vizitis la E-klubon de Fredericia, kie, post prelego, ŝi estis intervjuita de ĵurnalistino favora al Esperanto. Sekve ŝi daŭrigis la vojaĝon al Ĉeĥoslovakio, kie ŝi faris turis man rondvojaĝon kaj poste pasigis agrablan restadon ĉe korespondamiko.

### Literatura Sesio

D-ro Einihovici komencis la horon dediĉitan al la literaturo, legante areton da poemoj — de Julio Baghy, de Pastro Dinwodie kaj de D-ro Zamenhof. Prof. Robertson sekvis kun rakonto pri sia renkontiĝo kun la skota poeto. William Auld, kaj poste alternis kun S-ino E. Graham prezentante elektitajn poemojn el ties kolekto "Humoroj". Ankaŭ S-ro V. Gueltling prezentis ĉerpajojn el la verkaro de israela verkisto Efrajim Kishon.

### Mallongaj Paroladoj

Ankoraŭ unu horo da prelegoj estis tiu kiu disponigis oportunon por ekfloro de novaj talentoj pere de paroladetoj.

Trafa estis tiu de paralizito, Clarence Strcchnetter, kies bonstila verkajo havis gravan celon kaj lamentis la senpensajn fuŝojn de arkitektoj, kiuj tute malatentas la bezonojn de handikapitaj personoj — preterlasante en grandaj publikaj konstruaĵoj eblecojn, kiel ekzemple, talusojn kaj pli larĝajn pordojn kaj koridorojn por radseĝoj.

S-ro Arthur Cocking estis pli facilanima sed egale pensinstiga. Konsilante "Kiel esti kaj resti feliĉa kvankam edzo" li incitis ridadon, sed samtempe donis saĝan konsilon, ne nur por edzoj sed ankaŭ por edzinoj.

S-ino Palma Guy esprimis sian opinion pri "La plej bona metodo porti mesaĝon pri Esperanto al aliaj homoj." Si opinias la insignojn tro malgrandaj kaj ne facile videblaj. En la kolegio kie ŝi studas en Rockhampton, ŝi ĉiam portas ĉemizojn kun E-devizo. Si ne varbis iun, sed almenaŭ iniciatis oportunojn por informi pri la ekzisto kaj celo de la lingvo—ankaŭ kie kaj kiel eklerni.

S-ro W. Chandler tuj rebatis ripetante opinion de Tibor Sekelj, ke Esperanto estis mortigita de fanatikuloj — tio estas, la portantoj de ĉemizoj, flagoj ktp. kaj troa insistado "orelbatadi" kaj enuigi la homojn.

### Lingvaj Seminarioj

Tra la tuta semajno okazis "Lingvaj Seminarioj" en tri niveloj. S-ro I. Madern gvidis la elementan, S-ro J. Moore la mezgradan kaj S-ro K. Linton la superan.

### Ekskursoj

Tri ekskursoj en la kadro de la kongresa programo ebligis sufiĉe ampleksan konatigon kun la urba ĉirkaŭaĵo kaj ties vidindaĵoj.

La unua je merkado (4/1) ekiris antaŭ la lunĉoro kaj kondukis al pitoreska "Cataract Gorge", ĉe la malsupro de kies imponaj klifoj, ekskursanoj marŝis, laŭ serpentuma pado, al rava piknikejo kun naĝlageto. Tie en bela sunlumo ili manĝis sandviĉojn ricevitajn en la kolegia manĝosalono post la matenmanĝo. Post la lunĉo ekskursanoj reeniris la du aŭtobusojn por daŭrigi la ekskurson al "Red Feather Inn" ĉe Hadspen, restarigiita gastejo — haltejo, unue konstruita en 1845, kie, per senbendigitaj priskriboj kaj sonoj, ili informiĝis pri la gastejo kaj la frua historio de ties regiono, kaj poste trairis la ĉambrojn nun muzeje konservitaj. Ankoraŭ unu halto estis ĉe "Entally House", grand-sinjora hejmo de koloniaj tagoj (1820) en bele zorgata ĝardeno.

Ĵaŭdon matene (5/1), jam je la 9-a partoprenantoj kun siaj pakajoj da sandviĉoj, denove eniris du aŭtobusojn por tuttaga ekskurso, okcidenten tra belaj pejzaĝoj en akvoriĉaj regionoj ĝis la granda akvujejo "Devil's Gate", en kies apudeco la piknika lunĉo sufiĉe rapide englutiĝis kaj tiel fortigis la kruojn de la manĝintoj por posta longa esplorado en glacimalvarma kalkŝtona kaverno ĉe "Mole Creek", kian kontraston kun la karesa varmeĉo ekstere, nur la ĉarmaj internaj "grottoj" provis kompensi.

La tria ekskurso okupis nur sabatan matenon (7/1) kaj sekvis la valon de la rivero Tamar. Post paŭzo ĉe Georgetown apud la marenfluejo la veturado kondukis preter "Belle Bay" — lokon de aluminio-fabrikejoj kaj eksporto, trans la nun imponan ponton Batman, kies bildo ornamis la belan kongres-insignon. De tie la aŭtobuso veturis al malnova

tostoj. Prof. Robertson proponis la toston al la Loka Kongresa Komitato, kies estro, S-ro Mac Le Fevre, respondis. Tiu ankaŭ proponis la toston al A.E.A., respondis S-ro K. Linton. S-ro Herbert Koppel transdonis la Dramo-Trofeon al la Brisbana E-Societo, kies prezidanto, S-ro Ray Ross, ĝin akceptis. S-ro Linton transdonis ĉekon de \$78 de la Pyke Memoriga Fonduso al D-ro Einihovici, kiu ne povis ĉeesti la bankedon. Fine, kiu ne povis ĉeesti la bankedo. Fine. S-ro Ralph Harry transdonis malnovan gazeton kun historia signifo al S-ro I. Maddern.

Por daŭrigi la feston kaj la babiladon, kongresanoj akceptis inviton translokiĝi al alia salono, kie lokaj anoj plie regalis ilin per kafe kaj kukoj. Tre aktiva pri la servado estis S-ino Pat Le Fevre, kies o'ulfrapaj salivfluigaj kremkukegoj venkis eĉ dietemajn sinjorinojn.

Esprimante al ŝi dankon pro tio kaj la dumkongresa subteno de la edzo, ni emfazke ke S-ro Mac Le Fevre estas aparte dankenda pro sia gvidado de la komitato dum la tuta preparado kaj multfaceta penado kaj atento dum la kongresa semajno. Dankon Mac kaj al ĉiu jviaj helpantoj kaj ĝis la revido en Sidnejo.

#### La Di-Servo

Nur dimanĉon (8/1) okazis la Di-Servo, kiun gvidis S-ro Linton. F-ino Isabel Gale legis la lecionon kaj S-ino M. Sanders ludis por la himnoj.

#### 21st Australian Esperanto Congress

##### Late Supplementary List:

- 83. Mrs. R. Carruthers, Manly, NSW.
- 84. Mr. Ralph Harry, New York, USA.
- 85. Miss S. Bayliss, Launceston, Tas.
- 86. Mr. Chris. Dean, Perth.
- 87. Mrs. Dolly Dean, Perth.
- 88. Mr. E. Loorits, Hobart.
- 89. Mrs. E. Loorits, Hobart.
- 90. Mrs. G. Phillips, Brisbane.
- 91. Mrs. T. Elliott, Sydney.
- 92. Miss Phillipa Maddern, Melbourne.

State Distribution: N.S.W. 27, Vic. 26, Qld. 16, Tas. 12, W.A. 7, A.C.T. 2, U.S.A. 1, New Zealand 1.

Eble estas malbone paroli kun plena buŝo, sed pli malbone kun malplena kapo.

Saĝuloj parolas ĉar ili havas ion dirindan; stultuloj ĉar ili devas ion diri.

Oni parolas pri la "havuloj" kaj la "nehavuloj". Plejparte ilin kreis la "farintoj" kaj la "nefarintoj".

# AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** La Generala Kunveno de la E-ligo okazis la 7-an de dec. 1977 en la Instruista Kolegio de Nedlands. Ceestis nur malmultaj; eĉ la kasisto kaj la sekretario ne povis veni. Elektiĝis la jenaj: Prez. S-ro A. C. Huts; Vic-Prez. S-ro R. Smeets; Sekretario: S-ro Chris. Dean; Kasisto: S-ro O. Loneragan; Bibliotekisto S-ino D. Dean; Informado: S-ino R. McGrath.

Je 11/12 Ges-roj C. Dean gastigis S-inon Annie Spencer el Brisbano. Membroj pasigis agrablan vesperon.

La ZAMENHOF-FESTO okazis je 15/12 en Halo Mundarra en Hay Strato. Ges-roj O. Loneragan meritas la dankon de la membroj pro la bona organizado. Prezentiĝis varia programo, i.a. ankaŭ kelkaj infanoj prezentis erojn. (Ni ne ricevis raporton pri kiu faris la kutiman festparoladon).

La Ligo ŝanĝis la tagon de kunvenoj, kiuj nun okazas la 1-an kaj 3-an mardojn en la monato.

La biblioteko de la Ligo estis donacita al la Universitato Murdoch, kiu ne estas facile atingebla por la plimulto de la membroj. Pro tio la Ligo nun komencis starigi la "Bibliotekon 'Nova'n'".

● **MELBOURNE:** Je 14/11 tri vizitantoj venis el la grupo de Waverley, inklude la Gvidanton, Isabel Gale, por aŭskulti Ges-rojn Köppel pri vojaĝo tra la Norda Insulo de Nov-Zelando kaj partopreno en la Nov-Zelanda E-Kongreso en Auckland. F-ino Gale aldonis kelkajn diapozitivajn al tiuj montritaj de Ges-roj Köppel. Samvespere klubanoj festis la naskiĝtagon de S-ino May Frogley.

Pro malsano de la parolonto, S-ro Marshall Cohen, 21/11, S-ino F.Köppel legis la rakonteton "Nila" el "33 Rakontoj". Okaze de la Societa Vespero je 28/11, S-ro Ken Linton parolis kun diapozitivaj pri vidindaĵoj de Londono, inklude ekskurson sur la Tamizo.

Pro la federacia balotado la ZAMENHOF-FESTO okazis jam je la 3-a de decembro. Anoj de la Melburna E-Societo kaj la Esperanto-grupoj de Oakleigh, Malvern kaj Waverley kunvenis en la halo de la Skoltinoj kaj harmonie kunlaboris por prezenti kaj kune ĝui varian kaj gajan programon. Bedaŭrin-

de mankis la anoj el Morwell, sed rekompece venis novaj Esperantistoj el Geelong. La ravaj pianonotoj de "Country Gardens" duope ludataj de S-ino M. kaj F-ino M. Sanders signalis komencon, post kio S-ro S. Kanački (Prez. M.E.S.) bonvenige salutis la ceestantaron kaj lin sekvis S-roj Don Pescod kaj R. Reed kun bondeziraj salutoj nome de "Malvern" kaj "Oakleigh" respektive. La anoj de la "Waverley"-grupo kune kantis siajn salutvortojn.

Ravajoj estis bekfluta dueto de S-ino kaj F-ino M. Sanders kaj dueta kantado de Margaret kun F-ino Isabel Gale. Alternis kun tiuj, diversajoj de "Oakleigh"-grupanoj, poemdeklamoj de M.E.S.-anoj, komuna kantado, kaj skeĉoj de Malvern-anoj kaj Waverley-anoj, kiuj, ne nur elvokis ridadon, sed montris sufiĉe da aktora talento kaj kuraĝigan progreson parte de kelkaj kompare novaj studentoj.

Fest-parolis S-ro H. Beechey, kies titolo "Kelkaj Korelativoj", neniel rilatis al la gramatiko, sed, pere de la "K"-serio servis por prezenti klarigajn respondojn al la demandoj "Kiel ni festas?" "Kial ni honoras Zamenhof?" "Kial li kreis lingvon kaj kion li celis?", "Kial fariĝi kaj kiel esti E-isto?" ktp. Ĉe la konkludo vigle eksonis "La Espero", kaj baldaŭ poste aŭdiĝis tintado de tetasoj kaj zumado de babilantaj langoj kaj rideksplodoj.

Je 5/12 S-ro S. Kanački tre bildige priskribis la kultivadon de Papriko en Jugoslavio, multe uzata en Hungario, de kie venis la specialistoj.

Ĝarfina Festeto de la Melburna E-Societo okazis je 12/12. S-ro Cohen montris diapozitivajn kaj parolis pri ekskurso al Okcidenta Aŭstralio, dum S-ro Kanački montris filmon pri diversaj sociataj okazajoj. Sekvis tre luksa manĝejo.

● **SYDNEY:** 17/10/77: Vizitanto el Shepparton (Vik.) estis S-ro E. Thompson. S-ino E. Matasin parolis pri vizito en Orienta Eŭropo (Julio/Aŭgusto, 1977) Depost vizito en 1958 okazis ŝanĝoj. Pli frue estis severa kontrolado de pasportoj, paperoj, mono, ktp., kaj ĉie ruinoj, Nun la kontrolado estas malpli severa, sed jen kaj jen ankoraŭ videblas ruinoj. Oni devas longe atendi por akiri lavmaŝinon aŭ televidaparaton, sed mankas problemoj pri drogoj, kaj ĉiu havas laboron. Modernaĵo estas aŭtomataj

biletvendiloj por tramoj. Neniu kontrolas, ke pasaĝeroj aĉetas biletojn, sed neniu friponas.

24/10/77: Novaj studentoj faris siajn unuajn paroladojn. Leonka Daetz, kiu eklernis nur ĉijare, bone preparis kaj priskribis sian laboron en granda hospitalo, kie, helpe de masino, ŝi analizas la sangon de malsanuloj. Sia edzo, Merv, pasigis junagon sur bieno en Kvinlando, kie li malŝatis la lernejon; pli maturajn jarojn kiel maristo, kaj studtempon por fariĝi elektra inĝeniero en universitato, kie iu profesoro interesigis lin pri Esperanto. La edzino persvadis lin ke li eklernu. Samvespere Tom Elliott legis el la Biblio kaj kontraste el romano de Karel Capek.

31/10/77: James Harwood parolis laŭ la temo "Fuŝado en Toronto". Flugante, tien por partopreni kongreson, li tranoktis en Los Angeles kaj spertis malfacilojn pro striko de laboristoj ĉe flughavenoj. En Toronto li vizitis la plej altan konstruaĵon, la "C.N."—Turon, 1800 futojn altan.

7/11/77: Wre Chandler montris lumbildojn pri Londono, Sterlingo, Edinburgo, Islando kaj kelkaj urboj en Eŭropo.

21/11/77: David Gould ŝanĝis sian laborlokon, kaj parolis pri la diferencoj. Antaŭe li laboris en antaŭurbo en malalta fabriko; nun kiel registara oficisto li iras ĉiutage al t.n. "Black Stump". Lia oficejo estas je la 25-a etaĝo, kaj dum malfunkcio de la lifto, li devis resti tie dum 20 minutoj. De la nova loko, li havas tute alian vidaĵon de Sidnejo.

28/11/77: Grumbla Vespero. Ni diskutis la neregulecon de la angla lingvo; sistemon de trafiklumoj; ĉu voĉdonontoj iru unue antaŭ psikologoj. Ni ankaŭ eksciis ke je la pasinta samajnfino, mortis la 96-jara Freda Smith. Kaj je la venonta dimanĉo, velos Anne Gash en Sidnejan Havenon post sia ĉirkaŭmonda vojaĝo.

5/12/77: Sub gvidado de Margaret Chaldecott, ni preparis programon por la Distra Vespero de la venonta kongreso en Launceston.

12/12/77: Shirley Fanos montris lumbildojn pri sia vojaĝo, aŭtobuse, de Sydney al Townsville, Mt. Isa, Darwin, kaj suden tra Alice Springs: regiono de vasta senhoma dezerto kaj ankaŭ bela Katherine Gorge.

Je 14-a de decembro kelkaj Sidnejanaj ĉeestis urban bonvenigon en Manly por Anne Gash; Urbestro Frank Preacher parolis, ankaŭ Robbie Robertson.

—M. Chaldecott.

**AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO**

Financa etato por la dujara periodo

1976-77

**Enspezoj:**

Kreditsaldo 1/12/75		\$4479.42
Kotizoj 1976/77	\$4265.75	
Kotizoj antaŭpagitaj 1978	150.10	
		4415.85
Profito el la Melburna Kongreso		1551.05
Elementa Kurso	350.70	
Mezgrada Kurso	291.19	
Altgrada Kurso	129.00	
		770.89
Minus Elspezoj	42.26	
		728.63
Ekzamenoj	53.00	
Minus Elspezoj	17.29	
		35.71
Donacoj:		
Publiciga Fonduso	199.30	
Elspezoj	16.37	
		182.93
Generalaj	140.43	
Repago Brisbane E-Inst.	200.00	
F. R. Banham-Fonduso	277.93	
Esperanto-Junularo (Bankkonto transdonita)	36.87	
Altgrada Studlibro (K. G. Linton)	149.99	
Minus Presado ktp	88.15	
		61.84
Diversaĵoj	1.54	
Bank-Interezo	397.33	
Interŝanĝitaj Ĉekoj	18.95	
		\$12528.48

**Elspezoj:**

"Australian Esperantist", Presado kaj Afranko	\$4702.54
Generala Afranko	82.51
Presajoj kaj Paperajoj	81.69
Post-Kongreso Sydney 1976	\$330.00
minus Enspezoj	310.00
	20.00
Adresaro 1976	64.13
Honor-Insignoj	70.58
Monumento—Dr. Barrington	50.00
UEA-Asociaj Kotizoj	135.12
Poŝtkesto Manly (2 jaroj)	48.00
Diversaĵoj	116.55
Interŝanĝitaj Ĉekoj	18.95
Kreditsaldo 2/12/77	7138.41
	\$12528.48

Les. V. Scott, Kasisto

La Kreditsaldo de \$7138.41 inkludas:  
F. R. Banham Fonduson \$413.02, Publiciga Fonduso \$825.98, Heredajon W. L. Simpkins \$1578.47.

**Sekretaria Raporto 1976-77**

Antaŭ la kongreso en Melburno, Russ Baxter bone plenumis la devojn de A.E.A.-Sekretario dum 4 jaroj. Pro profesia premo li ne povis daŭrigi la taskon dum la pasinta dujara periodo.

Ni serĉis anstataŭanton sensukcese. Ĉiuj rifuzis akcepti tiun postenon. En atmosfero de malespero, Simon Wickenden estis petata prizorgi la aferojn kaj li estis elektita. Spite tion, li malvolonte konsentis aĝi. Li eĉ ne povis ĉeesti la Melburnan Kongreson. Kiel Kasisto, mi baldaŭ konstatis ke ne ĉio estas bona. La ŝarĝo estis tro peza por li. Rezulte prokraston. La pozicio iom post iom malplibonigis kaj finfine, en junio 1977, mi devis transpreni la sekretariajn taskojn aldone al miaj kiel Kasisto.

Mi eluzis multe da tempo dum pluraj semajnoj por ĝisdatigi la detalojn kaj enkonduki modernan metodon. Mia nuna metodo ne nur ŝparas multe da valora tempo, sed estas multe pli efika ol la antaŭa.

Dank' al la helpo de Russ Baxter (korespondaj kursoj), Betty Cleminson (korespondantoj), Jack Fallu (ekspedado de memorigiloj kaj anoncoj), la administrataj aferoj de la asocio nun funkcias kontentige kaj ĉio estas denove en bona ordo.

La Redakcio, Herbert kaj Fay Koppel, eldonis 16 numerojn de "The Australian Esperantist" dum la 2 jaroj, po 8 en ĉiu jaro. La Asocio estas tre dankema pro la klopodoj de Herbert kaj Fay en tiu grava afero. Sajnas ke pro la plialtigo de la preskosto, ni eble devos konsideri limigi la oftecon de ĝia apero eble ĝis ses eldonoj jare.

La nombro de petoj por korespondaj kursoj malpliĝis. Tio rezultis el manko de reklamado kaj aliaj instigoj, pro maleblo administre pritrakti ilin. Plaĉas al mi informi vin pri plano por ĝustigi la pozicion kaj mi intencas prezenti ĝin inter ĝeneralaj aferoj poste.

Post multe da sperto kiel kasisto dum la pasintaj ok jaroj kaj dum pluraj monatoj kiel Aganta Sekretario, venas en mian kapon la ideo, ke la posteno de Sekretario kaj Kasisto estu kombinitaj por eviti duobligon. Tio ne nur ŝparas valoran tempon, sed ankaŭ plibonigus la efikecon. Mi intencas prezenti proponon al tio, poste.

Mi mem multe laboras por la Asocio dum longa tempo kaj certe venas mia vico por iom da ripozo. Pro tio mi ne volas prezenti min kiel kandidaton por la posteno de Sekretario aŭ por proponota kombinita posteno de Sekretario Kasisto.

—Les. W. Scott (Aganta Sekretario)





## HEJMEN

La 30-a de novembro ni adiaŭas la homojn, bestojn kaj plantojn de "Bona Espero", tiu eta kaj fragila Esperantujo en la izolita centro de Brazilo. Ĝi kresku kaj prosperu!

Por lingve prepari nin por la restado en Germanio, ni aĉetas tradukon de la dua volumo de "La Gulaga Arkipelago" de Soljenicin. Sed intertempe ni turistis en Brazilo. Ni elektas tri urbojn: ouro Preto, Congonhas kaj — kompreneble— Rio.

Ouro Preto ("Nigra Oro") konservas muzeze sian dekokjarcentan aspekton. Ĉar Brazilo estis portugala kolonio, la arkitekturaj vidindaĵoj estas preĝejoj: ĉi tie senescepte barokaj. Antikva gotikaĵo, eĉ se neglektata, povas aspekti majesta, neglektata baroko ŝajnas nur kaduka. Kial? Eble pro tio, ke baroko volas esprimi triumfosenton: trumpeta fanfaro, religia ekstazo, kirliĝantaj amasoj de blanko kaj oro. Sed ŝimaj keruboj, kies orstrioj forfoliĝas, vekas sentojn de malreŝeco kaj laciĝo.

Ni estas malbonaj puristoj! Ni troviĝas en la plej renoma historia loko de Brazilo, sed pli allogas nin la atestaĵoj pri la rusa historio prezentita de Soljenicin.

Congonhas (proi, Kongonjas) famiĝis pro du homoj. Aleijadinho (La Eta Kriplulo), groteske misforma artisto, kiu devis apogi sin en kaĝo dum la laboro, kreis dum la dekoka jarcento la plej imponan verkaron en Brazilo. Antaŭ la ĉefpreĝejo de Congonhas staras vicjoj da elŝtonaj profetoj, kies severa sublimeco superas la kliŝan esprimaron de la konvencia tiutempa arto. Ne surprizas, ke la profetoj havas torditajn spinojn kaj dolorplenaĵojn vizaĝojn. Pri la alia fama filo de Congonhas, Arigo, kies mesaĝo por la homaro estis eble eĉ pli signifa, ni povas trovi nenian spuron. Angla-lingvanoj povas legi pri li en "Arigo, Surgeon of the Rusty Knife" de John Fuller.

Rio de Janeiro verŝajne meritis la epiteton "la plej bela urbo de la mondo", sed la pululantaj aŭtomobiloj eksufokis ĝin. La fifamajn "favelas", la svarmajn

kabanaĉojn de la malriĉuloj, ni ekvidas nur de malproksime, survoje al la flughaveno. En la flughaveno oni devas submetiĝi al rigora kontrolado de la "Luft-hansanoj". Por pruvi, ke nia fotoaparato ne estas pafilo, ni devas fari la plafonon. Ĉiu ero de nia pakajo estas ekzamenenda. Nu, ni preferus tion al eksterplana surterigo ie en Afriko devigita de glimokulaj sovaĝuloj kun pistoloj kaj bomboj.

Kaj fakte tio estas la aktuala ĉeftemo en Germanio: terorismo. "Politika terorismo" estas neekzakta nomo: la junuloj, kaj ĉefe junulinoj, kiuj militas sen ia espero je sukceso kontraŭ la germana registaro, evidente malamas la ekzistantan "socion", sed ili mem ne scias, kion ilia agado celas. Kaj kial ĝuste en Germanio, tiu prospera lando sen grandaj kontrastoj en la materia vivnivelo, kies leĝaro estas multe pli demokrata ol en preskaŭ ĉiuj aliaj landoj, kial ĝuste tie la gefiloj de pastroj, lernejestroj kaj industriuloj fariĝis teroristoj?

Glate nia aviadilo saltegas de Frankfurto al Bombajo, al Singapuro, al Ĝakarto, al Sidnejo, kaj fine al Brisbano. Post ege interesa jaro en alia kulturo ni devas nun al kutimiĝi al riĉa, sekura, materialisma Aŭstralio.

—TREVOR STEELE

## DETEKTIVO

Conan Doyle itutage alvenis en Parizo kaj antaŭ la stacidomo prenis taksion por veturi al la hotelo. Kiam li pagis, la ŝoforo diris ĝentile: "Dankon, sinjoro Conan Doyle!"

"Kiel vi scias, kiu mi estas," scivole demandis la detektivo.

"Estis sciigo en la gazeto, ke vi alvenos," klarigis la ŝoforo, "ke vi alvenos en Parizo el la sudo de Francujo. Mi vidis laŭ via ekstero, ke vi estas anglo, kaj evidente viaj haroj estis tonditaj lastfoje de sudfranca barbiro. Pro ĉio tio mi ekkonis vin."

"Tio estas eksterordinara!" diris Doyle, "Kaj ĉu tiuj estis la solaj faktoj por via konkludo?"

"Certe," diris la ŝoforo, "kaj krome via nomo estis sur la kofroj".

—P. E. Schwerin

The zinc plate for this Congress photo was generously given  
by Apex Engraving Co. Pty. Ltd., Melbourne,

as a mark of sympathy with our movement through our Vice President, Mr. K. G. Linton.

# NEWS - DIGEST

**"BONA ESPERO"**: From time to time we get reports of this Esperanto settlement in Brazil. Despite formidable difficulties — climate, transport, lack of funds — "Bona Espero", as its name implies, is still in good heart and rich in hope.

**DOWN UNDER IS TOPS**: Even if you can't tell a brown-topped tit from a yellow-bellied seersucker, you will be thrilled to learn of the success of the Esperanto Bird Watchers' "Rondo" — the fastest growing "fako" in "Esperantujo". You will also be proud to learn (from reports now to hand from Malmo, Sweden), how much Wre. Chandler's slides and tapes were appreciated "top-side". Ray, who, of course, is President of the O.R.E., made a strong and most favourable impression in introducing his feathered friends from the land of the kookaburra. Congratulations, Ray.

**WHAT NEWS ON THE RIALTO?**: No, we're not talking about Venice. We refer to the Rialto restaurant, near the station in Basle (Basel) where, in characteristic European fashion a "Three Land Get-Together" was recently held. It seems so strange to us in huge Australia where it is so difficult to gather Esperantists from 3 States, but in the smaller countries in Europe, gatherings from 3 and 4 countries are commonplace. This one in Basel was actually attended by folk from, not 3, but 8 countries.

A feature of the week-end programme was the contribution by S-ro Hugo Rollinger, well known orator from Bad Kissingen. (Let us hasten to add that Bad Kissingen has nothing to do with illicit kissing. "Bad" merely meant "bath", so a place with Bad or Baden in its name is a good place, with natural warm springs.) S-ro Rollinger spoke on "Origins of Culture" and later showed slides of "Oriental aspects of the Western World" in which he stressed the influence of Islam and India.

**ANOTHER HAPPY TRIANGLE**: Esperantists from Belgium, Germany and Holland, met on a recent Sunday in Haarlem, where they inspected the Middle Ages section of the town, then the ultra-modern shopping and office centre, after which they enjoyed slides about Ruanda in Africa.

**FROM THE SITE OF THE FIRST WORLD CONGRESS**: At the end of October, the wife of the Deputy Mayor arranged for a twin-town relationship between the Esperantists in Boulogne-sur-Mer and those in Gdansk in Poland.

**NOT IN THE WINTER OF THEIR DISCONTENT**: Do you wonder what happens in countries in the icy grip of Old Man Winter? Actually the Winter in many countries is the cultural and social season of the year — concerts, operas, soirées and all that.

Esperantists, especially, do not mope at home waiting for warmer weather. Many organize winter-holiday week-ends. Others arrange "mini congresses" at ski resorts. Perhaps typical is that held this, last, year between Boxing Day and 5th January at the "Skiparadise" of Adelboden in Switzerland. The programme included:—group skiing, ice skating, instruction for beginners (skill in 13 sittings?), evening talks, slides (lantern) and games.

**BOUND FOR BULGARIA ?** Those going to Varna this year may be interested to hear of an air caravan going from Stuttgart and possibly other German cities late in July this year. The cost is much less than the normal air fare and the return flight is designed to give Esperantists adequate time to attend the post-congress. There may, of course, be caravans from other countries. If and when further news comes to hand, we'll let you know. If you have information to share, will you, please send it to Arthur Cocking, 53 Monash Parade, Dee Why, N.S.W. 2099.

**HIS WORSHIP THE VICE-PRESIDENT**: News from N.S.W. Did you know that the recently elected Mayor of Manly, Ald. Frank Preacher, is a Vice-President of the Manly Club ?

(Credits: Pilo Press)

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and  
pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 161 (241)

MELBOURNE

Marto, 1978

## LA PREZIDANTO SKRIBAS

Unue, mi nepre devas gratuli la malgrandan grupon en Launceston, kiu tiel bone organizis la 21-an Kongreson. Se mi volus menciigi precipe la agadon de Mac kaj Pat Le Fevre, tio ne signifus, ke ni kongresanoj ne alte taksis la laboron de ĉiuj el la ĉta grupo. Multan dankon!

Due, ni komencas pripensi la 22-an en Sidnejo kaj starigis nukleon de L.K.K. por prizorgi la aferon. La Prezidantino de A.E.A., la Prezidantino de la Federacio, S-ino Betty Cleminson, kiel estrino de la gastiganta organizo, S-ino Margaret Chaldecott, sekretariino de la L.K.K., kaj S-ino Eve Matasin, kasistino de la L.K.K., jam kunvenis kaj pridiskutis kelkajn gravajn punktojn. Ni interkonsentis, ke la kongreso okazu de la 2-a ĝis la 9-a de januaro, 1980, kiel kutime dum multaj jaroj, kaj post esploroj de la eblecoj ĉe la tri en-Sidnejoj universitatoj kaj aliaj institucioj, ni decidis, ke kolegio de la Universitato de Sidnejo estos la plej taŭga loĝloko. Ni kunvenos keĵ eble plej ofte, kaj raportos la plej aktualajn detalojn al "Australian Esperantist".

Trie, per la iniciatemo de S-ino Winstone Greenhalgh, raportistino de "Women's Weekly" intervjuis min je la 2-a de februaro, kaj promesis aperigi tutpaĝan artikolon pri Esperanto post ses semajnoj, do, mezaprile. Ne supozu, ke tio estas bagatela; laŭ "National Times", la redaktoro de "W.W." estas "la plej potenca virino en Aŭstralio", kaj 3.7 milionoj da aŭstralianoj translegas la ĵurnalon ĉiusemajne, 46% el virinoj kaj 23% el viroj, pli aĝaj ol 18 jaroj.

Neniu alia ĵurnalo aŭ gazeto en nia lando atingas tiom da legantoj, kaj ni rajtas esperi, ke la propaganda efiko estu granda, sed mi petas ĉiun anon de nia asocio, ke vi kiel eble plej forte kuragigu la raportistinojn kaj la redaktorojn. Aĉetu la ĵurnalon, almenaŭ mezaprile, kaj skribu individue al la redaktoro. Certigu al ŝi, ke la afero estas interesa kaj grava. Se ŝi ricevas sufiĉe da leteroj pri Esperanto, ŝi, supozus, ke la artikolo kreis grandan intereson; ŝi presigus kelkajn leterojn, la mallongajn sed bele esprimitajn, kaj kredeble konsentus aperigi alian artikolon.

Tiamaniere ni povos duobligi la efikon de la artikolo, kaj la kosto al vi estos nur dek ok cendojn. La redaktoro de "W.W." ricevas 300-400 leterojn ĉiusemajne. Se 400 anoj de A.E.A. skribus, ŝi supozus, ke la tuta loĝantaro de Aŭstralio interesiĝas pri Esperanto, kaj po 18-cendoj vi, jes vi mem, povos fari tion.

—R. G. Robertson, Prez., de A.E.A.

If "The Australian  
Esperantist" arrives  
incorrectly addressed, or if  
you should change your  
address, please supply the  
correct details to our  
Despatch Officer:  
Mr. Jack FALLU  
10 Sumersett Avenue,  
Oakleigh South, Vic., 3167

## WOULD THIS ATTRACT YOU?

Learn the international language, ESPERANTO, by correspondence. For information, send 2 stamps to —  
ESPERANTO, Box 415 MANLY, NSW 2095

Name: .....

Address: .....

..... Postcode: .....

How can we reach the millions of Australians unable to come to our clubs and evening classes?

Correspondence students can learn at times to suit themselves, at their own pace — fast or slow — without troubling others. They can join AEA and keep in touch by reading the English parts of A.E. while they learn to read the Esperanto. Club members who also learn by correspondence become better members more fluent and confident.

With modern cassettes, pronunciation is no longer a problem. AEA has now under consideration, three new courses — the first two with cassettes — and a new Australian-information brochure which invites enquirers to join the first course and at the same time join AEA.

The first course — attractive and easy — contains an invitation to go on to the second, and so on.

But how do we reach these people in the first place? By a simple, direct invitation, repeated many times — with always the same wording and the same

constant address. Week after week, year after year.

This is where we all come in. If you like this small ad., would you or your club or Federation be willing to start by inserting it in one or more local papers, say one a week for six months? And help to distribute cards printed with the same message, and posters, in local shops, libraries etc.?

Perhaps each Federation could appoint someone to co-ordinate the advertising in the State.

Of course, the best publicity comes free; and papers running our ad. should be more receptive to articles about Esperanto.

Once the initial campaign starts to show results, the Correspondence Course Service of AEA should be able to take over the advertising and gradually expand it.

If you think this idea practical — or if you don't — I'd like to hear from you. (Please sit down now and write to me.)  
— John Moore, Pelican Street, Emu Park, Qld. 4703)

### KOREKTOJ

Estis neeviteble ke en la longa kongresa raporto (Jan/Febr. n-ro), spite de korektado, enŝteliĝis kelkaj eraroj.

La plej grava eraro okazis en la raporto pri la bankedo sur paĝo 139, kolumno 1, kiu devus teksti jene: "S-ro Linton transdonis ĉekon de \$78 de la Pyke Memoriga Fonduso al D-ro Einihovici, **anŝtataŭante por S-ino Threlfall**, kiu ne povis ĉeesti la bankedon".

Aliaj eraretoj estis: Sur paĝo 136, kolumno 2, prelego de F-ino Sanders, d vus teksti "Dua vizito al Bulgario", kaj ne "Dukvizito al Bulgario". Sur paĝo 137, kolumno 1, prelego de F-ino Hearn devus teksti "sonbendajn salutojn", kaj ne "sondendajn salutojn".

En la raporto de Trevor Steele "Hejmen", paĝo 143, kolumno 1, devus teksti "Ni estas malbonaj Turistoj", kaj ne "Puristoj". La Red.

### SPORTENTUZIASMO

La bona Adamo estis entuziasma adepto de la futbalsporto. Li ne ludis mem, sed ĉiun semajnfino li ĉeestis iun futballudon, ĉiun lundon li legis en la gazeto pri la estintaj ludoj kaj dum la semajno li studadis la prognozojn pri la estontaj.

Tiel okazis, ke iutage li trovis sian junan edzinon en larmoj. Al lia demando ŝi plorgeme riproĉis lin: "Vi ja konas nur vian futballudadon, nenion alian... vi ja eĉ ne rememoras la tagon, en kiu ni geedziĝis!...".

Sed jen Adamo ekbrilis: "Ho, certe! Estis en la sama tago, kiam Oksfordo venkis Londonon 3:2."

— P. E. Schwerin.

## TAGLIBRO DE KONGRESANO ĈE LA 62-a U.K.

Sendube la legantoj de nia ĵurnalo plejparte estas legantoj de aliaj E-ĵurnaloj kaj jam legis oficialajn raportojn pri la kongreso. Mankis al mi dum mia foresto tiuj ĵurnaloj kaj ili atingis min tre malfrue. Anstataŭ sekvi tiujn raportojn, mi prezentos kelkajn foliojn el mia taglibro mian propran sperton ĉe la kongreso.

Mi aliĝis al la karavano de B.E.A., kaj ĉiuj aranĝoj funkciis glate, krom aferoj ekster la kontrolo de la turista peranto. La ŝoforo veturigis nin laŭ la ŝoseo de Stirling al Glasgovo sufiĉe rapide, sed baldaŭ ni renkontis la kutimajn duonkonstruitajn statojn ĉe la fino de la ŝoseo, kiel en ĉiu urbo de ĉiu evoluinta nacio. Finfine ni atingis la aerhavenon kaj kiel eble plej pacience atendis alvokon al la aviadilo, sed la anoncistino flue parolis la glasgovan dialekton, kaj ni eksterlandanoj ne komprenis ĝin; eĉ la denaskaj parolantoj de la angla, kiel mi, ofte povas erari pri la signifoj de diversaj dialektaj frazoj en tiu malgranda insularo, la t.n. "Unuiginta Regno". Do, ni sekvis la skotojn inter ni, sed nur malrapide trapasis la serĉistojn ĉe la liria pordo.

Plaĉas al mi, ke la gardisotj estu zorgemaj. Mi preferus perdi kelkajn minutojn, kaj savi la vivon, se iu teroristo alvenus kun bombo. Ĉe la pordo, la gardisto zorge serĉis min de la skalpo ĝis la piedfingroj, kaj enketis: "Kia estas tiu skatolo en via poŝto?" Mi respondis "Estas malgranda fotilo". Li informis min ke mi ĵus perdis ĉiujn miajn bildojn de la antaŭkongreso, pli ol 50. Kia ŝoko! Sed mi decidis sendi la filmon al Kodaka uzino por ke ili povu riveli ilin. Post ses semajnoj kaj striko de la poŝtistoj, mi ricevis la bildojn, ĉiujn bonegajn.

Ni flugis 2 horojn super la nuboj kaj atingis Keflavik, aerhavenon por transmaraj aviadiloj, kaj devis veturi 50 minutojn per aŭtobuso al Rejkjavik. Iomete pluvis, la temperaturo estis nur 9°C, kaj la aspekto de la lando estis malkuraĝiga. Ni forlasis la plej riĉajn el ni ĉe la luksa hotelo Loftleidir, kaj daŭrigis nian veturadon ĝis la studenta domo Gardur. Bonŝance ke ni loĝis tie, ĉar ĝi staris meze en la Universitata kvartalo, kaj preskaŭ ĉiuj kunvenoj kaj okazajoj estis facile atingeblaj piede, ankaŭ la urbcentro mem estis sufiĉe proksima.

Ĉe la akceptejo, la ĉambroj estis plenplenaj de varmeĉo kaj lumo, helpemo kaj kapableco. Ĉiu deĵoranto bonvenigis

nin per rideto kaj flua Esperanto. Rapide ili fordonis informilojn, programojn, biletojn ktp., entenatajn en belaspekta teko donacita de islanda flugkompanio. Mi ĝuis babiladon kaj kafon inter samideanoj en la studenta kafejo, antaŭ ol mi enliktiĝis. La lampo en la dormĉambro ne funkciis, sed ne gravis, la taglumo daŭris la tutan nokton.

La matenmanĝo surprizis nin, ĝi estis nekutime bongusta kaj plena; oni provizis suptelerojn plenplenajn de jogurto, kun bruna sukero, cerealflokojn, panon blankan, bruon kaj nigran, bulkojn kun butero, fromaĝon, labovajon, fruktosukon, kafon, teon kaj lakton. Ni pagis antaŭ ol ni forlasis la hejmlandon, kaj atendis nur la t.n. "kontinanta matenmanĝon", t.e. bulko kaj kafo. Poste ni trovis, ke aliaj neantaŭpagitaj manĝoj estas tre multekostaj, kaj multaj el ni elektis la matenmanĝon kiel ĉefmanĝon, kaj nur manĝetis sandviĉojn kaj trinkis kafon lunde kaj vespere.

Promenante en la urbon laŭ la bordo de ĉarma lageto, mi preterpasis interesan statuon de urseto, sur kies soklo oni povis vidi ciferojn, la distancon inter Rejkjavik kaj Berlino. La kialon mi neniam eltrovis, kredeble usonaj aviadistoj starigis ĝin dum la dua mondmilito. Multaj anasoj kaj kelkaj cignoj naĝis sur la lageto kaj interesis min kiel O.R.E.-ano. Enirante la urbon mi observis, ke la domoj estas duetaĝaj, kaj plejparte konstruitaj el onda lado, kiel multaj en la kamparaj regionoj de Aŭstralio, sed ili estis farbitaj ruĝaj, blankaj, bluaĵ, verdaj, kaj eĉ rozkoloraj.

En la urbo malmultaj personoj piediris kaj la magazenoj kaj butikoj estis fermitaj sabate, kiel en Aŭstralio. La aŭtomobiloj estis etaj, el Japanio, Britio aŭ Francio, krom kelkaj usonaj de la aviadistoj. Ni vizitis la katedralon kaj la parlamentejon, ambaŭ malgrandajn, ĉar la loĝantaro de la insulo estas iom malgranda.

Vespere okazis la Interkonatiga Vespere en la granda luksa hotelo Loftleidir ĉe la alia flanko de la urba aerhaveno. Mi trinkis bieron kun ano de A.E.A., S-ro Ralph Harry, kaj prezentis lin al S-ro Auld, la konata poeto, kaj la ĉarma edzino.

La Inaŭgurejo, bela granda kinejo, ekstere similas al antikva fotilo aŭ moderna akordiono. La detalojn pri la Inaŭguro vi povas legi en aliaj ĵurnaloj, pri la ĉeesto de la Prezidento de Islando,

la paroladoj de la kulturministro kaj la urbestro en Esperanto, la kongrestemo tiel bone esprimita de S-ro Ralph Harry, kaj la parolado de la ĝenerala direktoro de Unesko, S-ro M'Bow, en la franca lingvo, sed facile komprenebla, ĉar ĉiu ĉeestanto ricevis Esperantigitan tekston. La tua inaĝuro estis modele aranĝita, kaj faris fortan impreson sur a menso.

La Solena Malfermo okazis post la lunca paŭzo, tre bona arango ĉar ne necesis resti tro longe en la aŭlo. Ne necese, ke la ne-esperantistoj restu dum la salutoj de la landaj asocioj, aŭ la salutontoj sur la podio dum la matenaj paroladoj de la altranguloj. Kiel kutime, la saluto de la reprezentanto de A.E.A. estis la unua, ĉar mankis reprezentanto de Argentino. Kion diri? Ĉu iu ajn memoros eĉ unu vorton, post tridek salutoj? Mi iom dubas, sed estas vere solena tasko, grava devo, paroli al 1100 homoj el 40 landoj. Oni devas eldiri poreternajn verojn, sed famaj poetoj aŭskultos. Mi zorge pretigis 60-sekundan paroladeton kaj precipe strebis por eviti enuigajn frazojn kaj banalajojn.

Mi diris: "S-ro Prezidanto, gesamideanoj, estas grava devo kaj granda privilegio por mi, kiel Prezidanto de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, saluti vin en la nomo de la landa asocio de Aŭstralio. Aŭstralio estas preskaŭ antipodo de Islando, kaj la du landoj tute ne estas similaj. Islando estas insulo en la Norda Atlantiko, Aŭstralio estas kontinento en la Suda Pacifiko, la sola kontinento sen lingvaj baroj. Ĉe ni mankas baroj, mankas vulkanoj, mankas gejseroj, mankas glaciejoj, mankas eĉ pluvo — en Islando ne mankas".

Ili ĉiuj ridis, ĉar pluvus tri tagojn dum nia tuta kongresperiodo ĝis tiam. La parolanto ĉiam ĝojas, kiam la aŭskultantoj ridas, ĉar li scias ke ili atente aŭskultas kaj tuj komprenas. Mi daŭrigis: "Ne ridu, pluvmanko estas serioza afero por ni, kaj serioze, ni el Aŭstralio elkore salutas la 62-an Universalan Kongreson de Esperanto".

Inkluzive la ridadon, 60 sekundojn precize. Poste venis en la menson la poemo de W. Auld, "Mankas krotaloj". Tre plaĉas al mi tiu poemo, kaj kredeble, ĉio sonis en mia saluto. Post kelkaj tagoj denove S-ro Tonkin ehis la vortojn de mi kaj Auld, kiam li salutis la Prezidenton de Islando ĉe la oficiala akcepto en la Blanka Domo de la Prezidento.

—R. Robertson.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

### ESPERANTO YOUTH MOVEMENT

An attempt is being made to revive the (A.E.J.A.) Esperanto Youth Movement. Any person (up to 25 years of age), interested in joining or helping in any way, please contact Mrs. E. Kerr, 1/12 Bourke Street, Launceston, Tas. 7250.

● **ROCKHAMPTON:** Nia klubo estos la gastiganto de la venonta konferenco de la E-Federacio de Kvinlando, kiu okazos en Bundaberg je 29-a kaj 30-a de aprilo, 1978. Ni rezervis 25 litojn en la privata hotelo "Lyelta Lodge". Interŝtataj vizitantoj ne pagos kotizon. Informojn donos S-ino Palma Guy, 178 Thozet Rd., North Rockhampton, 4701.

● **TOOWOOMBA:** Kun bedaŭro ni devas raporti la morton de la edzo de nia fidela ano, S-ino Ruth Maltman, je 24-a de dec., 1977. Li ne estis esperantisto, sed ĉiam subtenis la lokan movadon.

Je 21/I ni kunvenis por legi teatraĵojn Valora, interesplena vespero por partoprenantoj, kiun ni ripetos 27-an de februaro, kaj de tempo al tempo dum la jaro. Studado komenciĝis la 8-an de februaro ĉe F-ino K. Evans kaj daŭros semajne. Gis nun ne estas klaso por komencantoj ĉar la Vespera Kolegio ankoraŭ ne havas sufiĉe de ĉambroj en la nova kunvenloko.

La jarkunveno okazis, 13-an de februaro, en la hejmo de S-ino Lehane. La unuan fojon, ni elektis Protektanton, S-ron H. V. Petley. Jen la nova estraro: Prez: S-ino J. Lehane; Sek: F-ino S. Connors (12 Argyle St., Toowoomba, 4350); Kas: F-ino G. Morgan; Bibliotekistino: F-ino M. O'Mara.

Interesplena artikolo aperis, 8/2, en la ĵurnalo "Toowoomba Chronicle". S-ro H. V. Petley verkis ĝin, ĉefe pri la lingvaj servoj de UNO, kaj pri la ĝenoj de multlingveco.

Pastintiare, kelkaj el niaj ŝtataj lernejoj instruis la 7-an klason pri Esperanto per la kurso "Bonan Tagon". Ĉi-jare, almenaŭ unu el tiuj lernejoj denove utiligos la kurson por instrui 7-an klason.

—Jean Lehane.

● **IPSWICH:** Dank' al la klopodoj de S-ro R. Ross (Brisbane) naskiĝis la 9-an de februaro la Ipswich Esperanto-Klubo.

Hobio estas peniga laboro, kiun oni ne volonte farus por gajni la vivrimedojn.

Jen la estraro: Prez: S-ro Alec Morrison; Vic-Prez: S-ino Ruth Morrison; Sek: S-ino Mary Nielson; Kas: S-ro Cliff Nielson; Biblioteko: S-ino Edna Klauke. La Klubo kunvenas ĉiuŝaŭde je la 7.30-a p.m. en la "Teknika kaj Plua Edukado Centro.

● **BRISBANE:** Meze de decembro raportistino de Courier-Mail, per telefono, intervjuis min pri Esperanto kaj artikolo aperis la 3-an de januaro. Post mia reveno el Tasmanio atendis min 30 telefonnumeroj. Dua artikolo aperis fine de januaro. La alia ĵurnalo, "Telegraph" raportis, kun foto de mi, pri kursoj por komencantoj. Sekve de tiuj raportoj kaj de apartaj reklamoj, ni gajnis 16 novajn studentojn kaj samtempe starigis klasojn en antaŭurboj Moorooka kaj McGregor.

Ni denove kunvenas en "Martin Chambers", Roma Strato, tamen alia kunvenejo, "Senior Citizen Centre", estos verŝajne nia nova hejmo. Mankas nuntempe sufiĉe da spaco por niaj 3 klasoj, Trevor Steele instruas grupon (ĉ. 16) kiuj intencas prepari sin por la Supera Ekzameno; Tom O'Grady gvidas la mezgradan grupon kaj Ray Ross la komencantojn. Kay Anderson instruas ĉe Moorooka, kaj Ray Ross ĉe McGregor, ŝaŭde kaj merkrede, respektive.

Edith Steele, instruistino ĉe Girl's Grammar School, proponis Esperanto-instruadon al knabinoj; ŝis nun ĉirkaŭ 70 aliĝis. Edith instruas unu klason dum la lunchoro, kaj duan post la fino de normalaj lecionoj. Vere, ni gratulas al Edith.  
—Ray Ross.

● **ST. LUCIA:** La jarkunveno okazis 22-an de februaro ĉe la domo de S-ino W. Greenhalgh. La eksiganta prezidantino, S-ino Margaret Jones donis detalan raporton pri la aĝado dum 1977; tiu raporto havis grandan intereson por la novaj membroj. Elektigis la jena nova estraro: Prez: S-ino Dawn Degen; Vic-Prez: S-ino M. Jones; Sek: S-ino Decia Shonhan; Kas: S-ino Joy Coulter; Bibliotekisto: S-ino Jovcelin Munro; Libroperanto S-ino W. Greenhalgh; Komitatanoj: S-ino Ruth Morrison, S-ino Mary Stephenson, S-ro Allan Mason.

Ĉiumerkr-de la membroj kunvenas kaj S-ino W. Greenhalgh instruas 3 klasojn (komencantan, mezgradan kaj superan). Post 3 lecionoj la komencantoj jam parolis mallongajn frazojn.  
—Decia Shonhan

● **SYDNEY:** Ni ne ricevis lastatempe raporton el Sidnejo, probable pro la strikoj de poŝtistoj, sed ni eksciis el diversaj fontoj, ke okazis elstara Zamen-

hof-Festo, kies ĉefa ero estis kortuŝa festparolado de S-ino M. Duncan; ankaŭ okazis tre sukcesplena semajnfina seminario ("Work Shop") kun multnombra partopreno, la jarkunveno okazis je la 6-a de januaro kaj semajnon poste komenciĝis nova klaso por komencantoj.

● **MANLY:** Por reklami Esperanton, nia klubo aranĝis (3/2) "Internaciona Vesperon" en la Preĝejo St. Mathews. S-ino Thora Thomas prezentis familion el Tongo, kiu distris la 65 ĉeestantojn per indigenaj kantoj kaj dancoj. Esperantodiskoj sekvis diskojn el Nov-Gvineo. Prof. Robertson montris diapozitivajn pri Islando. Post reklamo en "Heraldo de Esperanto" ni ricevis 72 poŝtkartojn, kiujn ni ekspoziciis dum la propagandvespero.

Novaj klasoj komenciĝis je 7-a de februaro. S-ino M. Duncan gvidas superan. Les Scott mezgradan kaj Prof. Robertson elementan kurson. La mezgrada kurso uzas la unuan libron de "Secondary School Esperanto" kaj la supran kurso la 2-an libron.

Je 14/2 studentoj rigardis la 72 poŝtkartojn ric-vitajn post reklamo en "Heraldo". Membroj respondis al kiel eble plej multaj kaj decidis aperigi dankesprimon en "Heroldo".  
—Edna Giles.

● **CANBERRA:** La ĝenerala kunveno okazis en la hejmo de S-ino Barbara Amies, dimanĉon posttagme, 5-an de februaro. La ĉeestantoj diskutis pri novaj klasoj, gvidotaj de S-ino Margaret Ellyard, kiu partoprenis kun edzo la Aŭstralian E-Kongreso en Launceston. Membroj decidis partopreni semajnfanan konferencon, kiun la E-Federacio de Nov-Suda Kimrujo aranĝos en kelkaj semajnoj.

Elektigis la jena estraro: Prez: S-ino Barbara Amies; Vic-Prez: S-ro Noel Gamble; Sekretario kaj Bibliotekisto: S-ino M. Ellyard; Kas: S-ro Sam Ellyard; Kaskontrolisto: S-ro Colin Johns.  
N. F. Gamble

● **MELBOURNE:** La kluba jaro komenciĝis la 9-an de januaro, kiam ni povis honveniĝi Ges-rojn P. Schwerin en la Esperanto-domo. S-ro H. Koppel, kiu revenis samtage el Launceston, raportis pri la 21-a Aŭstralia E-Kongreso.

Amuzvespero okazis 23/1, kiam S-ro K. Linton montris plujajn vidindaĵojn pri Londono, inklude la "ŝanĝon de la Gvardio" kaj Parkon St. James, krom multaj imponaj kaj historie signifaj konstruaĵoj kaj kasteloj. Du semajnojn poste, S-ro H. Koppel raportis pri



novajoj el Esperantujo.

La Generala Kunveno okazis je 13/2. Laŭ la raporto de la kasisto (S-ro S. Munro) la jaro finiĝis per defikto de \$13.69. Tamen la societo havas aktivojn de pli ol \$2000 kaj la membroj decidis transigi monon el ŝparbanko al konto en "Konstru-Societo", kiu pagas pli altan interezon. Laŭ la raporto de la sekretario (S-ro H. Koppel) la societo havis en 1977 tridek ses membrojn kaj unu kursanon. (Lastjare 36 membroj kaj 5 kursanoj).

Elektiĝis la jena estraro: Prez: S-ro S. Kanački; Vic-Prez: S-roj H. Beechey, J. Midgley; Sek: S-ro H. Koppel; Kas: S-ro J. Munro; Bibliotekisto: S-ino F. Koppel; Kaskontrolisto: S-ro K. G. Linton.

La E-Grupo en antaŭurbo OAK-LEIGH havis sian jarkunvenon je 1/2 kaj elektiĝis la jenaj: Prez: S-ro J. Fallu; Vic-Prez: S-ro N. Butkunas; Kas: F-ino A. Hearn; Sek: S-ro R. Reed; 2-a Sek. kaj Libro-Servo: S-ino I. Fallu.

La Jarkunveno de la WAVERLEY-grupo okazis je la 9/2. Elektiĝis Prez: S-ro George Holding; Sek. F-ino Sue Parker; Kas. F-ino I. Gale; Bibliotekisto: S-ino Daphne Mather; Societaj distraĵoj: F-ino E. Trainor. La vespero finiĝis per prelego de S-ro D. Pescod (Malvern), kiu priskribis la aŭstralian kaj internacian E-movadojn.

En MALVERN la jarkunveno okazis je 14/2. La nova estraro konsistas el: Prez: S-ro D. Pescod; Sek: S-ro G. Killender; Kas: S-ino B. Pescod; Bibliotekisto: S-ino B. Podmore; Grup-Gvidanto: S-ino A. Paling.

● **PERTH:** La unua kunveno en 1978 okazis je 7-a de februaro ĉe Nedlands. Pluraj membroj raportis pri la Aŭstralia E-Kongreso en Tasmanio. Membroj formis grupetojn por legi teatraĵetojn.

La komitato pridiskutis kaj konsentis restarigi la perradian kurson "Ĵen nia mondo" en marto. Proponataj estas unuagrada kaj duagrada kursoj ĉe Teknika Kolegio en Subiaco, estrotaj de S-ino Vera Payne, kaj unuagrada kurso ĉe la Instruista Kolegio. Ni esperas pri kelkaj kursoj ankaŭ en infanaj lernejoj.

La "dommastrinoj" studas grupe laŭ sia propra volo kaj S-ino Annie Spencer (Brisbano) estas ankoraŭ bonvena gasto inter ili.

—Chris Dean.

Se vi deziras, ke aliaj laŭde pripensu vin, ne laŭde parolu pri vi mem.

## Gramatike-

Mi trovas, ke la plej multaj eraroj okazas pri la refleksivo. Ni ĉiuj lernas, ke la refleksivo rilatas al la subjekto de la frazo. Prave! Sed de kiu frazo? Efektive estas pli konsilinde memori, ke la refleksivo rilatas al la subjekto de la plej proksime sekvata agvorto, kaj ke tiu agvorto povas esti tempa aŭ moda verbo, infinitivo, participo, aŭ substantivigita verbo.

Tiu lasta prezentas iom da malfacilaĵo, ĉar ofte la lernanto ankoraŭ ne scipovas rekoni la substantivigitan verbon. Progresintoj scias, ke radikoj grupiĝas en kvar klasoj, la suzstantiv-karakteraj, la adjektiv-karakteraj, la verb-karakteraj, kaj la senkarakteraj. Kiam tiuj radikoj aperas kiel substantivoj, la substantiv-karakteraj indikas ajon, la adjektiv-karakteraj indikas econ, kaj la verb-karakteraj indikas agon. Tamen ni ĉi tie devas konsideri nur la verb-karakterajn radikojn, kiuj ĉiam indikas agon; kiel ekzemple: "amo", "kono", "kuro", "marŝo", "salto", kaj "vido".

Jen estas ekzemploj de refleksivoj post substantivigita verba radikoj:

(a) "Mi ne komprenas lian konfidon al si." (La agvorto en ĉi tiu ekzemplo estas la substantivigita verbo "konfidon", do la refleksivo "si" rilatas al la subjekto de "konfidon" kaj ne al la subjekto de "komprenas", do ni scias, ke "li konfidas al si".)

(b) "Tio malhelpas ŝian revenon al sia hejmo." (La plej proksime sekvata agvorto estas la substantivigita verbo "revenon", do "sia" rilatas al la subjekto de "revenon" kaj ne al la subjekto de "malhelpis" do ni scias, ke "ŝi revenis al sia hejmo".)

(c) "Ŝi respondis, observante la enportadon de ŝiaj korboj." (En ĉi tiu ekzemplo estas tri agvortoj, la verbo "respondis", la participo, "observante", kaj la substantivigita verbo "enportadon". Se ni uzus refleksivon "siaj" anstataŭ la pronomon "ŝiaj", tiu refleksivo rilatus al la subjekto de "enportadon", sed ni deziras, ke ĝi rilatu al la subjekto de la unua agvorto, "respondis", do ni ne uzis refleksivon.)

Se iu leganto ne tute komprenas iun parton de la ĉi-supera, tiu povas skribi al mi, kaj estus mia plezuro skribi personan klarigon.

—K. G. Linton

## FORPASI PEARL HANKS

Manko en la programoj de la Melburna Esperanto-Societo, longe sentata — precipe de iamaj "Rendevu"-anoj — estas tiaj prelegoj, al kiaj oni kutimiĝis, kiam unu el la Geedzoj Hanks (pli ofte ambaŭ kune), ĉerpinte el siaj senĉesaj studoj pri la naturo kaj la literaturo, provizis veran feston por la menso. Bedaŭrinde, antaŭ longe, pro malsaniĝo kaj maljunigo, la paro devis sin retiri el aktiva partopreno.

Post la morto de la edzo (1973. 4. 12), S-ino I. P. Hanks travivis pluajn 4½ jarojn, spite de malsano kaj preskaŭa blindeco, kuraĝe kaj grandparte sola en propra hejmo. Nur lastatempe, ŝi ekloĝis en "Elanora Home & Hospital" (de la Blindula Asocio) ĉe Brighton, kie, preskaŭ 90-jara, ŝi mortis pace dum dormado, iom antaŭ noktomezo, Kristnaskvespere (t.e. 24an de Dec.).

Isabella Pearl Grant naskiĝis la unuan de Marto, 1888, kaj pasigis la junagon en la kamparo de Viktorio. Ŝi edziniĝis al Ernest Silvertan Hanks, 19an Dec., 1918 (vidu ties nekrologon en "A.E.", Jan. 1973), kaj kun li partoprenis multajn kulturajn aktivojn, inklude Esperanton, al kiu ili varbiĝis jam en 1919. En 1938, la geedzoj Hanks vojaĝis transmaren; rindveturis en Eŭropo kaj Britujo; kaj ĉestis la Universalan Kongreson en Londono. Ili restis for proksimume unu jaron.

Ambaŭ estis entuziasmaj natur-kaj literatur-amantoj kaj estis membroj de pluraj rilataj organizaĵoj — "Field Naturalists Society", "Ornithological Society", "Bird Observers", "Royal Australasian Ornithological Union", "Henry Lawson Society", "Australian Poetry Lovers", "Literature Society", "Melbourne Freelance Writers" — kontribuante de tempo al tempo siajn proprajn verkojn — poeziaĵojn, libro-recenzojn k.s. — al ties programoj.

En la Esperanto-rondoj, similaj verkoj, ĉiam en bonstila lingvaĵo, kaj informricaj komentarioj de S-ino Hanks, ilustrataj de vere unikaj diapozitivoj faritaj de la edzo, pri ĉiu flanko de la aŭstralia arbaro, flaŭro kaj faŭno, estis bonvenaj kaj alte taksataj.

Statistikoj pri kiom da aspirantaj Esperanto-studentoj la paro helpis ne estas haveblaj. La jena verkanto povas atesti nur laŭ persona sperto, ke per multe da temporaba korespondado kaj pacienca kontrolo, ili grandmezure kontribuis al ŝia sukcesa provo por la Brita Diplomo.

Dum Ernesto Hanks estis la spertulo

pri la fotografarto, bird-observado k.s., S-ino Hanks sendube superis laŭ lingvokapablo; sed apartigi ilin ne valoras; ili kune vivis kaj laboris kiel bona teamo. Ili estis de tia kalibro, kian bezonas ĉiu klubo, kaj kia, malfeliĉe, pli kaj pli malaperas el niaj vicoj. —F. Koppel.

## KIEL MI ESPERANTIGIS ?

Iun tagon, dum mi estis rigardanta en nia lerneja libraro, mi trovis lernolibron de Esperanto, kaj legis iomete. La internacia lingvo tuj kaptis min, do mi prunteprenis la libron ("Secondary School Esperanto"). En tiu tempo mi estis lernanta tri aliajn lingvojn: germanan, japanan kaj francan. Mi kredas pro tio, ke la lernado de Esperanto estas tre facila por mi. Ju pli mi lernis ĝin, des pli mi ŝatis ĝin. La lingvo interesas min tre multe, do iam ajn kiam estas eble mi legas pri Esperanto en la ĵurnaloj eksterlandaj kaj en enciklopedioj.

Unu tagon mi rimarkis anoncon en la loka ĵurnalo pri la 6 NR radio-kurso. Tiam mi ĝuegis. Post du lecionoj mi kontaktis la skribantinon de la ĵurnal-anonceto, S-inon Einihovici, por ke ŝi sciigu min kiel mi povas lerni Esperanton. (Mi volis lerni ĝin rapide, ne nur unufoje semajne per radio-leciono). S-ino Einihovici diris, ke ŝi volonte instruos min kaj post tiu tempo mi lernas nian lingvon pli rapide kun S-ino Einihovici. Mi lernas Esperanton unu jaron, unu horon semajne.

## Kial mi esperantiĝis ?

Mi satas mondpacon multe kaj malŝategas ĉiujn militojn. Mi ankaŭ deziras ke iun tagon la homaro de la tuta mondo unuiĝos. El ĉiuj ideoj por unuiĝi la mondon mi pensas ke Esperanto havas la plejan ŝancon por fari tion.

Esperanto por mi signifas bonecon, pacon, unuiĝon kaj fratecon. Mi deziras, ke mi povu marŝi antaŭen al monda paco kune kun geesperantistoj de la mondo. Antaŭen, senfine !

—Blair Silverlock (Perth), 16-jara

Pacienca estas la virto, kiun ni admiras en la veturigisto, kiu sekvas nin, kaj malestimas en la veturigisto, kiun ni sekvas.

Nia generacio estas tre misŝanca. Kiam ni estis junaj, oni instruis nin respekti nian pliagulojn: kaj nun, kiam ni estas pli aĝaj, oni admonas nin aŭskulti la junulojn.

# NEWS - DIGEST

## HOME THOUGHTS FROM ABROAD:

My heart leaped up as I beheld the first words of a letter in "The Esperanto Teacher" (London) now to hand. They were, "We in Australia etc. etc." As I read on, I saw that the writer, who obviously "sniffs the battle with delight," had dared to do battle with two formidable academics — Professor Geo. Steiner and Roland Hindmarsh, deputy controller of the teaching division of the British Council.

Steiner had rejected Esperanto as being artificial and "too European" while Hindmarsh espoused English as the international language.

The letter written? None other than our champion from Morwell — Ivan Maddern. Calmly, logically, yet adroitly and convincingly he parried their contentions and then pressed the fight into the enemies' camp.

"THE JOKE, THE THREAT AND THE OBVIOUS". Also from "The Esperanto Teacher". "It has been said that all organizations for social improvement go through three phases: the joke, the threat and the obvious. Esperanto has left behind the stage when it was considered an unrealistic ideal. Now it is seen as a serious threat to the existing order."

**FERVORA FERVOJSTO:** The President last year bestowed the honour of "Cavalier of the Order of Merit of the Italian Republic" on Germano Gemelli, a very active member of the Esperanto Railwaymen's movement. S-ro Gemelli is also a keen philatelist.

**TALKING OF STAMPS:** The Director of the Philatelic Office of San Marino wrote at the end of last year on the occasion of the reunion of Esperanto Philatelists. "I am glad that I could be useful to the Esperanto Philatelists whose principles of goodwill accord with mine". By the way, the 1978 Italian Congress will be so close that San Marino postage facilities will be available.

**ECHOES OF VOKAL:** Remember Emil Vokal, Viennese announcer? He was here in 1976 for the Pan Pacific Conference. Here are predigested extracts from a recent radio interview:—

Vokal (V) "What news from Britain concerning Esperanto?"

S-ro Klatil (K) Things are moving there. E.g. there is now an "influence group" of 55 members of diverse parties in the British Parliament. (See "affairs of Men" in a previous News item).

V. And what is the function of this "influence group"?

K. To support the progress of Esperanto and vote positively in proposed legislation especially concerning its introduction into schools".

What a shame there is no such group —yet—in Australia! But don't despair, Remember constant stonng (with discretion) wears away the drip!

**ANOTHER LONG LIVER:** The Austrian director, Leonhard Schmid, recently celebrated his 90.h birthday. He learned Esperanto in 1903 and has been an active Esperantist ever since.

Of course, he is a mere boy compared with the father of our (Melbourne) Brigadier Isabel Gale. Th's reverend gentleman, growing old in years and wisdom, is now 101.

**MORE GOOD HOPE:** (See last issue). Schweim, Zamenhof Night, S-ro Torben Kehlet showed his latest slides about the countryside and the life in 'Bona Espero', the Esperanto colony-cum-school in Brazil. A donation will be sent to 'Bona Espero' and a gift to help the Esperanto struggle will also be sent to Malagasy.

**TOMORROW IS THEIRS:** The Esperanto Youth Groups (90 members from 7 countries) gathered near Hilversum (Holland) for a most pleasant lakeside camp last Autumn.

From all over Europe come signs that the accent is-properly-on youth. WE must encourage young learners. After all, you and I are getting on in years. "In a year or two, or three, maybe, we'll be too old".

(Credits: Pilo Press and "The Esperanto Teacher").

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and  
pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063  
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095  
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 162 (242)

MELBOURNE

Aprilo-Majo 1978

## LA KVINJARA PLANO DE S-RO RALPH HARRY

La aŭstralia ambasadoro ĉe Unuiĝintaj Nacioj, S-ro Ralph Harry, C.B.E., prezentis al UN 5-jaran planon por la enkonduko de Esperanto.

**Unua jaro:** Kontrolo, fare de la Sekretariato, de terminaro necesa por eldoni bazajn dokumentojn. Trejnado de interpretistoj de la 6 lingvoj de la Generala Asembleo al Esperanto.

**Dua jaro:** Konstantaj delegitaroj de ŝtatomembroj kaj anoj de la Sekretariato ricevu bazan instruon por akiri pasivan konon de Esperanto. Preparado de terminaroj en cefaj kampoj. Trejnado de interpretistoj de aldonaj 6 lingvoj (ekz. portugala, germana, japana, bengala, hinda kaj tamila).

**Tria jaro:** Interpretado de Esperanto al la 12 lingvoj estu ebla, sed la lingvoj de la Generala Asembleo estu ankoraŭ uzataj. Dokumentoj estu haveblaj en Esperanto kaj en la 6 oficialaj lingvoj.

**Kvara jaro:** Dokumentoj estu produktataj je la kosto de UN nur en originala lingvo kaj en Esperanto. Aliajn tradukojn pagu la koncernaj ŝtatoj. Interpretado en Esperanto sole.

**Kvana jaro:** UN instigu aliajn organizaĵojn alpreni saman lingvo-praktikon. Rekomendo al registaroj, ke Esperanto estu instruata al ĉiuj novaj diplomatoj. UN malfermu kursojn ĉe konferencoj. Delegitoj povu paroli en sia propra lingvo interpretado en Esperanton estu provizata el la 12 lingvoj kaj eventuale pliaj. Paroladoj en Esperanto estu stimolataj.

Laŭ S-ro Harry, la supra plano postulus aldonan elspezon en la unuaj tri jaroj. Poste, la kcs.o ege malaltiĝus en la 4-a kaj 5-a jaroj. La granda valoro de la uzo de la Internacia Lingvo ĉe UN estus la alproksimiĝo al egaleco.

## TAGLIBRO DE KONGRESANO ĈE LA 62-a U.K.

(Daŭrigo)

Post la fino de la Solena Malfermo kelkaj el la ĉeestantaro alproksimiĝis kaj gratulis min; mi ĝojis renkonti S-inon-Elfriede Ernst el Bruselo, kiu partoprenis la 1-an Pacifikan Kongreson en Melbourne, kaj poste bonvenigis la edzinon kaj min en Bruselo. En la kunveno de la I.S.U., nemultaj sidlokoj restis vakaj dum S-ro W. Auld parolis pri la rolo de originala literaturo en la historio de Esperanto.

Vespere ĉe la teatro ni vidis la duaktan teatraĵon "Hipnoto" de la Pola Esperanto-Teatro. Bedaŭrinde la teatro ne taŭgis por tia prezentado, la planko ne kliniĝis kaj neniu povis vidi la scenejon krom inter la kapoj de aliaj; la voĉoj de la geaktoroj, kvankam klaraj, ne estis sufiĉe laŭtaj por granda salono, kaj la dramo rampiris ĝis iu klimakso.

La sekvantan matenon mi bonŝance trovis la solan restantan sidlokon apud S-ino Chaldecott por ekskurso ĉirkaŭ la

ĉefurbo, vizitante lokajn vidindaĵojn. Aparte interesa estis la monteto de la akvujoj; ili entenas varmegan akvon distribuotan per tuboj al ĉiuj antaŭurboj por hejti la domojn. Oni bezonas nenium fajron kaj la urbo estas tute sen fumo, stranga fakto, ĉar en la islanda lingvo "Rejkja" signifas "fumplena" kaj "vik" signifas "fjordo", do antaŭe ĝi estis la "fumplena fjordo". En la mezo de la urbo sur monteto oni vidas grandan blankan konusturon; ĝi aspektas kvazaŭ spacveturilo. Tiu estas la sonorilturo de la konstruota Hallgrimskirkja; "kirkja" signifas "preĝejo" kiel skota "kirk". La turo staras kiel granda monumento al la astronautoj, sed tio ne estas la intenco. Survoje al la kongresejo ni vizitis vilaĝon konstruitan por montri al turistoj la diversajn konstrumetodojn kaj materialojn, de torfo, ĝis onda lado, kaj viciaj ekspozicioj de skulptaĵoj, kaj tradiciaj kaj modernaj.

Kelkaj interesaj skulptaĵoj montriĝis en la urbo: antaŭ la Hallgrimskirkja staras statuo de Leif la Bonŝanca, kiu trovis Nord-Amerikon preskaŭ 500 jarojn antaŭ Kristoforo Kolumbo. Efektive, Kolumbo serĉis Ĉinion, trovis Haition, neniam staris sur la kontinento mem, kaj alia nekonato, Amerigo, ricevis la honoron.

Mi lunĉis en la studenta restoracio, kaj subtenis samideanon kiu argumentis kontraŭ fumanto. En ĉiuj kongresĉambroj, fumado estis malpremetata, kio plaĉis al mi, kaj ankaŭ al la plimulto laŭ mia opinio. Kiel kutime, ni neniel sukcesis konvinki la fumanton, ke nefumanto eĉ rajtas plendi.

Posttagmeze D-ro Bormann prezidis kunvenon de la respondeculoj de landaj asocioj; ili diskutis rimedojn por allogi lernintojn el la kursoj kaj varbi ilin kiel anojn de la landaj asocioj kaj U.E.A. Aparte interesa estis la parolo de S-ino Grattapaglia el Brazilo, kie la movado lastatempe fortiĝis sub la influo de spiritismo. S-ro Braha el Israelo proponis klubojn por junuloj kaj priskribis porjunulan rondon en Tel-Aviv. Tro da kunvenoj kaj prelegoj samtempe okazis sed mi penis ĉeesti prelegon de Prof. Stop-Bowitz pri "Komunikiĝo inter Bestoj". Ni aŭdis pri la dancoj de la abeloj por indiki direkton kaj distancon al la aliaj; tio ne estas io nova.

Vespere ni ĉeestis la Artan Vesperon. Aparte interesaj al mi estis la tri poetoj, Auld, Boulton kaj Daŝupta, kiuj deklamis proprajn poemojn. La granda aŭditorio, plenplena de homoj, ne vere taŭgis por aprezi la nuancon de poezio sed denove estis privilegio aŭskulti la voĉojn kaj elparolmanieron de la poetoj

mem. Mi interesiĝis ankaŭ pri la popolkantisto kun gitaro, O. Tzaut el Sv.ŝujo, post konatiĝo kun liaj kantoj ĉe la somera kurso en Toowoomba januaron 1977.

La 2-an de aŭgusto mi ĉeestis la aferkunvenon de O.R.E.; prezidis S-ro W. Chandler. Estis granda plezuro renkonti persone tiom da eksterlandaj ORE-anoj. La posttagmeza ekskurso kondukis nin al Hveragerdir. La ĉefa specialaĵo de la vilaĝo estas la kreskigo de tomatoj kaj bananĉoj en varmdomoj hejtitaĵoj per varma akvo el la tero. Alia vidindaĵo estis gejsero funkciigita per sapo. La gvidanto jetis la sapon en la truon, kaj la gejsero obeeme funkciis. La akvo estas varma, sed la aero estis malvarma; ni veturis al komforta restoracio en la vilaĝo, kaj la kelnerinoj regalas nin per kafo, teo, pastoringoj, krespoj kaj kremkukoj. Poste ni eniris apudan butikon, sed trovis ĉiujn varojn multekostaj, ekz-e kolorfilmon po \$15.90.

Vespere okazis la Bankedo; mi sidiĝis kun du finlandanoj, usonano, franco, S-ino M. Chaldecott kaj S-ro Chandler. Laŭ mia opinio la aŭstralianoj estis pli parolemaj, kaj baldaŭ ni interbabilis feliĉe kaj facilanime. Kvankam la kongreslibro avertis nin, ke vino mankos, kelneroj alportis sufiĉe bonan rozan vinon el Portugalio. La menuo estis abunda kaj bongusta, ni ĝuis lokajn specialaĵojn kiel maraĵojn, islandan montaran ŝafidon, kaj islandan patkukon kun bluaj beroj. K'el diris la poeto Kipling, "La valaj ŝafoj estas grasaj, sed la montaraj estas dolĉaj.

La 3-an de aŭgusto ni neniam povis forgesi; ni partoprenis tuttagon ekskurson al Thingvellir, la situo de la antikva ŝubiĉla parlamento de la islandanoj, fondita en la jaro 930. La suno bele brilis kaj la aŭtobusoj veturiris 1000 gekongresanojn trans lafejojn kaj inter rokojn ĝis sovaĝa ravino. Tiu ravino estas la divido inter Eŭropo kaj Nord-Ameriko. Laŭ geologoj, la distanco inter la du kontinentoj pligrandiĝas po 25 mm ĉiujare, kaj la ravino ĉe Thingvellir estas la norda ekstremo de la fendo en la mezo de la Atlantiko. Tial Islando suferas tiom da tertremoj kaj entenas tiom da gejseroj kaj vulkanoj. Tie, kia surprizo! Flirtis la bela islanda flago en la vento, kaj ĉirkaŭ mikrofono staris Auld kaj aliaj famuloj.

D-rino M. Boulton kortuŝe deklamis sian poemon pri Zamenhof "La Okulisto". En tiu impona situo, tiel histori-plena, malproksima de nia tro evoluinta civilizacio, antaŭ la granda sed silenta kaj senmova ĉeestantaro, la efiko estis neforgebla. Sekve nia Prezidanto de U.E.A. taŭge retorikis pri "La spirito de

Thingvellir — de libereco, de kunlaborado, de egaleco, gravaj kaj memorindaj frazoj.

Post la solenaĵo ni piediris laŭ pitoreska malvarma rivereto por vidi la situon de la fama gejsero, la originala gejsero mem. Oni avertis nin kontraŭ la varmega ŝpruco, sed turistoj svarmaŭ ĉie; neniu pereis, ĉar Providenco prizorgas stultulojn, kaj ili ne mankas. Denove ni veturis al la plej granda akvofalo en Eŭropo. Ĉu Islando estas en Eŭropo? La Islandanoj opinias ke jes, kaj fieras pri "Gullfoss", la "ora akvofalo". Denove la lingvaĵo estas konata, ĉar en la nordaj regionoj de Anglio multaj akvofaloj estas nomitaj "Force", kiel High Force kaj "Aira Force", do, oni povas rekoni la influon de la vikingoj en Anglio. Vere la akvofalo estas granda, impona kaj bela.

Ni reiris al Rejkjavik post vere neforgesebla ekskurso, kaj antaŭvidis bonan dormon kaj belajn sonĝojn. Dumnokte la ĉambro estis tro varma, ĉar la hejtiga aparato tro entuziasme funkciis, kaj mi malfermis la fenestron, kvankam mi logis keletoĝe. Je duono post la tria, la fenestro klaketis, kaj mi supozis ke venteto skuas ĝin. Mi ekstaris por fermi ĝin kaj subite vidis la kapon kaj ŝultrojn de homo, duonenirinta mian ĉambron tra la fenestro. Surprizita, mi kriegis. Li diris ĝentile, en la angla lingvo, "I've come to help you". En Islando eĉ la ŝtelistoj flue parolas la anglan. Mi ankoraŭ duondormis, kaj respondis: "I don't need help". Denove li respondis per perfekta B.B.C. dialekto: "I work here. I've come to help you." La voĉo estis vira, mi tute vekigis kaj respondis: "Sugar off!" Li evidente komprenis anglajn idiotismojn kaj tuj malaperis. Mi ankoraŭ ne disponis pri lampo en la ĉambro, sed ne gravis, krepuska taglumo sufiĉis por certigi min, ke mia nova brakhorloĝo kaj fotiloj ankoraŭ kuŝas sur la fenestrobreto.

Matene mi ĉeestis prezentadon de Ges-roj Grattapaglia el Brazilo, pri "Bona Espero", la eta Esperantujo, kie Trevor kaj Edith Steele el Brizbano laboris tiel efike. La prelego kaj lumbildoj vekis grandan intereson kaj instigis multajn demandojn. Ankaŭ Ges-roj Einihovici el Perth priskribis viziton kai spertojn en "Bona Espero".

Posttagmeze ni ekskursis al "Bessastadir", la hejmo de la Prezidento de Islando. Ĝi staras sur duoninsulo en la haveno, ĉar antaŭe ĝi estis la logloko de la danaj guberniestroj, ne amataj de la islandanoj. Komprenoble la domo estas blanka, kiel mia, ĉar ĉiu prezidanto devas loĝi en blanka domo. Poste ni transiris pejzaĝon "lunaspektan" laŭ la

kongreslibro, sed efektive oni povas vidi per la televidaparato de la astronautoj, ke la luna pejzaĝo ne estas tiel severa kiel la islanda.

Kelkaj esperantistoj renkontis min survoje hejmen, kaj unu demandis angle: "Where is the National Theatre, please?" Mi unue respondis angle, sed post kiam li komencis traduki mian respondon Esperanten, mi klarigis Esperante. Surprizite la anglaparolanto diris: "Mi supozis, ke vi estas Islandano, ĉar vi tiu bone parolis la anglan!". La pluvmantelo kaŝis mian verdan stelon. Vere, en Islando la instruistoj de la angla devas esti lertaj.

La 5-an de aŭgusto mi ĉeestis kunvenon de delegitoj kaj partoprenis viglan diskuton pri la necesa lingvosocio de delegito. Laŭ Eŭropanoj, iĝi delegito estas grava honoro, kaj delegitoj kaj fakdelegitoj devas esti zorge elektitaj, per voĉdonado se eble. Mi piediris en la urbon kaj butikumis en la ĉefaj stratoj. Ĉiuj varoj kostis trifoje la sumon de la samaj aŭ similaj en nia lando. Survoje al la kongresejo, franca samideano haltigis min kaj fotografis min, ne ĉar mia beleco impresis lin, sed ĉar, laŭ lia opinio, mi estis la kongresano kiu vojaĝis la plej longan distancon por atingi la kongreson.

Mi surmetis mian plej solenan vestaĵon por ĉeesti oficialan akcepton de la Islanda Prezidento, kune kun 100 aliaj elektitaj el la eksterlandaj salutintoj, kaj la L.K.K. Mi sidigis en la aŭtobuso por veturi al Bessastadir, kaj alvenis S-ino Y. Isobe el Tokio, kiu ĉeestis la 1-an Pacifikan Kongreson. Ni kunparolis survoje, kaj mi prezentis ŝin al D-rino M. Boulton, ĉar tiuj 2 eminentuloj de nia movado antaŭe ne renkontis unu la alian.

La blanka domo estas eleganta. Ni manpremis la Prezidenton kaj lian ĉarman edzinon, kaj trapasante la unuan ĉambron mi trovis min inter D-ro N. Isaac el Egiptujo kaj Ges-roj Harmon el Kalifornio. Ni pridiskutis estontajn Pacifikajn E-Kongresojn, Baldaŭ Prezidento Kristjan Eldjarn salute parolis en la islanda lingvo, kaj la prezidanto de la L.K.K. interpretis. Nia prezidanto H. Tonkin respondis Esperante, kaj diris ke mankas en Islando serpentoj, ranoj, formikoj kaj — soldatoj. La prezidanto de la L.K.K. islandigis la respondon, kaj kelnerinoj komencis alporti trinkaĵojn.

S-ro Ralph Harry afable prezentis min al Prezidento Kristjan Eldjarn, kiu parolis la anglan, kaj ni pridiskutis lingvojn kaj dialektojn. Post la akcepto mi piediris ĝis la aŭtobuso kun Ges-roj Grattapaglia kaj parolis pri "Bona Espero".

Poste mi ĉeestis la Islandan Vesperon kaj ĝuis la prezentadon de islandaj specialaĵoj. Aktorino bele vestita en nacia kostumo deklamis tradician poemon, kaj horo kantis popolkantojn kaj melodiojn de islandaj komponistoj. Nekutima ero estis la luktado laŭ tradicia islanda maniero: tio precipe interesis min, ĉar mi mem dufoje luktis en la Oksforda Teamo kontraŭ la Kembriganoj, laŭ la japana stilo, islanda tre similas al la stilo de la norda parto de Anglio, kie mi naskiĝis.

La fino de la kongreso rapide alproksimiĝis kaj ĉiuj laciĝis post tiom da aferoj. La Solena Fermo ĉiam estas malĝojiga, sed necese oni devas esprimi dankon al ĉiuj helpantoj, kaj transdoni la flagon al la L.K.K. de la venontjara kongreso. Oni devas emfazi, ke la L.K.K. de la 62-a disponis pri nur malmultaj personoj, sed tamen brile sukcesis starigi vere ĝuindan kongreson.

—R. G. Robertson.

### FORIGEBLAJ PROBLEMOJ DE HANDIKAPITOJ

Mi deziras atentigi vin pri problemoj, kiuj tro ofte tuŝas la vivon de multaj homoj en ĉi-tiu mondo. La problemoj estas arkitekturaj bariloj, kaj mi elektis la temon, esperante, ke iam en la estonteco almenaŭ unu el vi estos en situacio fari ion konkretan por forigi tian problemon.

Unu el la celoj de kriplulo estas tio, ke li vivu en socio kie ekzistas neniam obstrukcoj kontraŭ libera movado; ke li vivu en socio kie li povas utiligi ian ajn hotelon, motelon, butikon, teatron, muzeon, restoracion, preĝejon, aŭ ion alian —eĉ trotuaron.

Tro ofte ni trovas, ke tiujn, kiujn la sorto jam handikapis, la socio plihandikapas. Ni daŭre trovas, ke unu parto de la homaro ne povas disponi multajn el la oportunaĵoj de hoteloj, moteloj, butikoj, teatroj, muzeoj, restoracioj, preĝejoj, k. t. p. dum la alia parto povas.

Kiam homo, kiu ne povas uzi siajn krurojn, kaj tial devas iradi per radseĝo, vĉjaĝas turisme, li ne scias, ĉu li trovas hotelon aŭ motelon, en kiu li povos eniri necesejon aŭ banĉambron. Efektive, li eĉ ne scias, ĉu eblos, ke li eniru dormĉambron. La kulpajoj estas ŝtupoj ŝtuparoj, mallarĝaj pordoj, kaj troakutaj anĝuloj en mallarĝaj koridoroj.

En 1972 mi ĉeestis en Sidnejo tutmondan kongeson pri malsanuloj kaj kripluloj. La malfermo de tiu kongreso okazis en la Sidneja Urbodomo, kiu, je tiu tempo, ne estis facile enirebla por kripluloj, kaj verŝajne ankoraŭ ne estas. Por solvi la problemon oni uzis fork-

levan ĉaron, kiu havis kaĝon sur la forko. La fizikhandikapitaj homoj eniris la kaĝon, kaj tiel unuope leviĝis ĝis alirejo speciale kaj provizore konstruita super ŝtuparo ĉe unu flanko de la urbodomo. Do, eĉ en urbeĝo tiel granda kiel Sidnejo, parto de la homaro ne povas facile eniri tian gravan konstruaĵon pro arkitekturaj bariloj.

Cetere, en la urbodomo troviĝas lifto, kiu estas tute senutila por homo en radseĝo pro tio, ke la liftopordo estas tro mallarĝa por enlasi radseĝon.

Mi ne menciis la Operodomon!

Ĉe mia vivloko Pyengana oni an'aŭne-longe konstruis porpublikan konstruaĵon kaj ĉe ĉiu el tri enirejoj almetis ŝtuparon, kie eĉ ĝemaljunuloj bezonas helpon grimpi la ŝtupojn. Estus tre simple enmeti taluson (milde deklivan vojon) por ĉies uzo.

Antaŭnelonge en unu el la hoteloj en Launceston mi partoprenis en kunveno de organizaĵoj pri mens- kaj korpokripluloj. Por atingi la kunvenĉambron ni devis grimpi krutan ŝtuparon. Kvar viroj portis min en la radseĝo, kaj tio ne estis facila pro tio, ke ekzistas akutaj anĝuloj en la ŝtuparo. Aliaj kripluloj ĉeestus, se ili ne devus esti portataj supren kaj malsupren. Ilia digno ne lasis ilin suferi tian . . . speciale tiujn, kiuj piediras pere de lambastonoj.

La "Tasmanian College of Advanced Education", moderna konstruaĵo en Launceston, enhavas, kiel ĉiu ano de la 21-a A.E.A. Esperanto-Kongreso scias, multegon da ŝtuparoj, kio tute malhelpas homon en radseĝo.

Kripluloj maltrankviliĝas pri la fizikaj bariloj, kiuj limiĝas ilian liberan partoprenon en la oportunaĵoj provizitaj de la komunumo.

La pensema kriplulo agnoskas la fakton, ke la fizika mondo de la naturo prezentas multajn obstaklojn, kiujn li ne povas venki. Kion la kriplulo ne povas kompreni estas jene: Kial homoj mem pliiĝas la problemon per daŭra kreado de artefaritaj obstrukcoj?

Ĉiu arkitekto kaj ĉiu planisto devus pasiĝi tri monatojn katenita al radseĝo. Tiam ili eble scius plani konstruaĵojn kaj ĉirkaŭaĵojn, kiuj taŭgas por ĉiuj.

Por forigi obstrukcojn oni povas fari vojetojn sufiĉe larĝaj; oni povas enmeti norme ampleksajn pordojn; aŭstataŭ konstrui ŝtupojn, aŭ aldone al ŝtupoj, oni povas konstrui taluson; aldone al ŝtuparoj intere, oni povas enmeti lifton.

Arkitektoj kaj konstruigintoj devus turni sin al la bezonoj de la tuta socio, ne nur parto de ĝi. Ĉiu-jare la nombro da kripluloj kreskas pro akcidentoj kaj aliaj kaŭzoj. Ni pensu ankaŭ pri ĝemal-

junuloj, gravedulinoj, kaj patrinoj kun infanĉaretoj, aŭ ec butikumanto kun plenbrako da pakajoj. Se radseĝulo povas senobstrukce iradi, ĉiu povas pli facile iradi.

—Clarence Strochetter, Pyengana, Tas.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH:** Je 1-a de feb. Chris Dean montris lumbildojn pri sia vizito al Tasmanio kaj la Aŭstralia E-Kongreso en Launceston. Jack Hawks gvidis klason por konversado. Ni adiaŭis Annie Spence, kiu post kelksemajna vizito al Perth reveturos al Brisbano.

Okazas nun 2 kursoj en la Teknika Lernejo de Subiaco. Ambaŭ kursojn gvidas Vera Payne. Dudek ses aliĝis al la klaso por komencantoj (lundvespere) kaj 16 al la klaso por progresintoj (mardvespere).

Vidu apartan raporton pri la "Hyde Park" — Festivalo.

● **MELBOURNE:** Harry Beechey parolis, 20/2 pri la "Flor-kuraciloj de D-ro Edvardo Bach". Tiu metodo parencas al naturopatio, kaj D-ro Bach, kiu estis unue kvalifikita medicina doktoro, forlasis ortodoksan medicinon por praktiki la "florkuracadon". Li nomis 38 florojn uzeblajn por apartaj celoj.

Ĉe la amuzvespero de la 27-a feb., S-ro Marshall Cohen montris lumbildojn pri vizito en Okcidenta Aŭstralio. Liaj diapozitivaj montris Perth, Insulon Rottnest kaj la "Dukan Muzeon" en urbeto Denmark.

S-ino Fay Koppel, 6/3, skizis la stariĝon kaj historion de la Akademio de Esperanto. Ĉe la amuzvespero, 20/3, Ken Linten montris diapozitivajn kaj parolis pri rondveturo tra pluraj anglaj urboj: Oxford, Stratford-on-Avon. Bildoj inkludis Tamizajn pejzaĝojn, la "Regan Shakespeare Teatron", kaj Kastelon Windsor.

Bonvena gasto ĉe nia kunveno de la 3-a de aprilo estis S-ano R. Felby kun gefiloj el Adelaide. S-ro H. Koppel komencis serion da prelegoj pri siaj "Spertej kiel gasto de Reĝo Georgo la Sesma" dum la 2-a mond-milito.

● **SYDNEY:** Ĉe la Konversada Posttagmezo (5/3) Wre Chandler legis elĉerpaĵojn el letero de Shirley Fanos, kiu estis neĝokaptita en Serpa vilaĝo alte en la Himalaĵo, kaj devis esti liberigita per helikoptero. Je 6/3 Tom Elliott vikle kaj tre gaje legis elĉerpaĵojn de la verkoj

de Raymond Schwartz kaj Karel Capek.

Wre Chandler, 13/3, prelegis pri la temo "Kiel aĝi gracie en Esperantujo". Li komencis negative kiel eviti malgraciajn trajtojn de maljuniĝo, kiaj plendi ke la mondo kadukiĝas, kaj kredi ke vi rajtas pontifiki pri ĉiuj homaj aferoj. Li sugestis havi absorban hobion, kaj li konsilis kolekti ion. Li citis ke Tibor Sekelj kolektas ĉielarkojn kaj diris, ke li mem kolektas kisojn. Li jam estas kisita de belulinoj en 33 landoj. Johano Matasin interrompis por diri, ke tio estas pro la barbo. Wre diris, ke estas lia ambicio esti kisita en minimume 50 landoj antaŭ ol tro maljuniĝi por veturado.

Konversada Posttagmezo okazis 8/4. Ni bonvenigis Edna Strickland, kiu ne ĉeestis dum multaj monatoj pro severa malsano. La ĉeftemo de la Konversado estis kiaman'ere certigi, ke "Telopeo" venku la malfacilojn kaŭzitajn pro maŝinrompiĝo. — Revanto.

● **MANLY:** Nia klubo kolektis \$501 por Ruĝa Kruco. Eunice Graham flugis al Ateno, de k'e ŝi kun sia flino Jane intencos vojaĝi ĉirkaŭ Eŭropo.

Dimanĉe, 16/3, en la hejmo de Edna Giles, kunvenis dekseks membroj el la Sidneja, Manlia kaj "Wesley Centro"-grupoj. Ni renkontis D-ron kaj Kitty Gassner, tre interesan paron. D-ro Gassner lernis Esperanton antaŭ 30 jaroj de rad'o-kurso en Vieno. Li estas profesia tradukisto en 6 lingvoj, sed parolas 20 aliajn lingvojn. Betty Cleminson montris d'apozitivajn pri Japanujo, kaj Svislando.

—Edna Giles.

● **BRISBANE:** Ni ĝojis bonvenigi rev-enintajn vojaĝintojn Gilbert kaj Decia Shonhan, Eric Whisden kaj lian novan edzinon, Hilda, kaj Edith kaj Trevor Steele, kiu la 24-an de januaro parolis pri kelkmonata restado ĉe Esperanto-kolonio "Bona Espero" en Brazilo. La konversacia grupo daŭras ĉiusabate en la hejmoj de la membroj.

Post longega restado ĉe Martin Cambroj, ni trovis novan hejmon, ĉe la Senior Citizens Centre, 22 Qualtrough St., Woolloongabba. La novaj ĉambroj estas ja luksaj, kaj ni atendas egale longan restadon tie.

—C. Sullivan.

● **TOOWOOMBA:** La marta kunveno okazis ĉe S-ino Carney, diskutis pri duplikatiloj, legis teatraĵojn kaj ricevis inviton de F-ino Evans al esperantlingva tagmanĝo. S-ino J. Lehane paroletis pri Estonio kaj montris bildlibrojn, bildkartojn kaj turistajn flugfoliojn. Funkcia la "alportu-kaj-aĉetu budo", la biblioteka "korto" kaj la libroserva "valizo". S-ino Carney fine provis bongustan vespermanĝeton.



La aprila kunveno okazis ĉe S-ino Lehane. La komitato raportis progreson pri aranĝoj por E. F. K.-konferenco en oktobro. F-inoj Connors kaj O'Mara legis teatraĵeton. Ni aŭdis pri S-ro Derek Oubridge, kiu instigis kaj daŭrigas kampanjon pri Esperanto en Newcastle (N.S.K.)

S-ro Bob Weis ĵus malfermis plant-vedojn apud sia restoracio ĉe la "Top of the Range". Kiam vi vizitos Toowoomba nepre vizitu ĝin. (Parku ĉe "Top of the Range"). — J. Lehane.

## FESTIVALO "HYDE PARK"

De la 5-a ĝis a 7-a de marto okazis en la granda kaj belega "Hyde Park" la ĉiujara festivalo. Nia Ligo sukcesis okupi budon por Esperantoekspozicio. Multaj afiŝoj, libroj, ornamitaj kovertoj dekoraciis la budon. Ĉe la supro de la budo estis slogano "Lernu Esperanton".

Mi decidis organizi konkurson por kiu mi donacis \$25. La konkurstantoj devis respondi al 2 demandoj: 1-e Kio estas Esperanto kaj 2-a Kial lerni tiun fantastan lingvo? La plej juna gajninto estis 11-jara knabo David Ellis kiu gajnis \$5, kaj la 16-jara Blair Silverlock gajnis \$10. Ambaŭ studas Esperanton en lernejo.

Ni disdonis propagandfoliojn, vendis ekzemplerojn de "Jen Nia Mondo" kaj kelkaj personoj fariĝis subtenantaj membroj. Laŭ informo de loka ĵurnalo la festivalon vizitis 50.000 personoj, jen do bona okazo propagandi Esperanton.

Idyss Einhovici.

## EL LA FEDERACIO

**N.S.K.** De la 18-a ĝis la 19-a de marto okazis konferenco de la N.S.K.-a ĉe Robertson, sur la Suda Altreĝiono. Bedaŭrinde pluvegis; Robertson ricevis 940 milimetrojn (ĉ. 37½ colojn) da pluvo. Tamen la konferenco sukcesis, krom ke la ekskurso tra la naturo ne povis okazi dimanĉmatene. Bonvena vizitanto estis Oswald Michelsson, el Hammerfest, Norvegujo, la plej norda urbo en la mondo. — Revanto.

**Kvinslando:** La 29-30-an de aprilo kunvenis en Bundaberg 25 anoj. Klubanoj el Rockhampton, Brisbane, Toowoomba Ipswich kaj Sunshine Coast ĝuis belegan veteron, komfortan loĝlokon kaj esperantan etoson. Dankon al la Rockhamptonanoj pro la bonegaj aranĝoj.

La ĝeneralan kunvenon, sabaton posttagmeze, prezidis S-ino Doris Sinclair. Vespere okazis la oficiala vespermanĝo. Membro de la Konsilantaro de Bundaberg, S-ro Clements, ĉeestis kaj poste gastparolis. Li ankaŭ restis dum kelkaj

eroj de la distra vespero kiun la tuta ĉeestantaro tre ĝuis. La Brisbana kantgrupo kantis, Ges-roj Ross kaj Tom O'Grady prezentis skeĉon, same faris David Guy kaj Bob McNeill. Doris Sinclair kaj Gay Phillips deklamis, Margaret O'Mara kaj Sandra Connors prezentis skeĉon.

John Moore donacis al ĉiu partoprenanto kantlibrojn.

Dimanĉmatene okazis vizito al "Avocado Grove" (apud Bundaberg), kie ni ankaŭ piknikis, antaŭ ol ni forlasis la belan distrikton por hejmeniri. "Avocado Grove" estas kultivejo de plantoj, arbetoj, fruktarboj kun multaj specoj de ekzotikaj kaj indigenaj birdoj.

—Ray Ross

## PAPILIA VIZITO DE ĈARMA JAPANINO

Letero de S-ro B. Išizaki, kiun ĉeestintoj de la Pacifika Kongreso sendube memoros, kaj kies raportoj pri agado en Japanio aperas jen kaj jen en nia gazeto, anoncis alvenon en Melburno de samideanino el Kumamoto, kaj tiel ebligis ke A.E.A.-Vic-Sekretario, H. Koppel, ne nur aranĝu renkontiĝon, sed ankaŭ informu aliajn Esperantistojn en urboj vizitaj de ŝia turista grupo.

S-ino Reiko MORITA, veturante kun la edzo profesoro pri historio, estis la sola esperantisto inter la japana vojaĝgrupo, kaj tre modeste prezentis sin kiel "ne tre bonan" laŭlingva scipovo, sed spite pruviĝis pli ol kapabla. Ĉar la grupo nur tranoktis en Melburno, kaj estis ligita al plenplena programo, ŝi havis je dispono nur kelkajn horojn. Iris renkonte al ŝia hotelo (8-an de marto) tri M.E.S.-anoj, la sekretario kun edzino kaj Prezidanto S. Kanaĉki, en kies aŭto mobilo la kvar esperantistoj faris rondveturon tra Melburno kaj St. Kilda, poste al restoracio por kafo kaj fine al la Esperanto-domo, kie S-ino Morita fotografis la por ŝi imponan bibliotekon kaj la tri Melburnanojn. Adiaŭante la vizitantino disdonis memorigaĵojn — belajn ujon por okulvitroj kaj ekzemplerojn de libreto kies Esperanto-traduko el japana originalo kolektive preparis membroj de E-grupoj de insulo Kiuŝju, inklude S-inon Morita.

La verko, "En la Nubon Si sorbiĝis for", kortuŝe sed ĉarme, kvazaŭ laŭ la observoj kaj sperto de unusola postvivanta kamfor-arbo, priskribas okazajojn je la tempo, kaj post, la faligo de atombombo sur la urbon Nagasaki. Sincere la aŭtoro celas instigi al japanaj gelnantoj fari sian eblon influu sur la mondon por eviti ke iam reokazu tia hororo.

Kvazaŭ "postskribo" al la Melburna renkontiĝo sinsekve prezentigis aro da leteroj. S-ino Bety Cleminson (Manly) raportis ke tri "Manly"-klubanoj, S-inoj M. Duncan, E. Graham kaj B. Cleminson iris al Hotelo Boulevarde (Sydney) por renkonti S-inon Morita je la tago de ŝia rucvo en Aŭstralio (16/3) post rondveturo en Nov-Zelando, kaj ĝuis du-horan babiladon kun ŝi, kio samtempe konsistigis bonan propagandon por Esperanto inter la aliaj japanaj turistoj. S-ino Morita mem dufoje danke skribis, el S-dejto kaj el Kumamoto kun fotoj.

—Fay Koppel.

## RECENZOJ

**Lingvo kaj Logiko:** de Albert Goodheir; Eldonis KARDO, 1977. 20p. Brita prezo 30 pencoj. Havebla ĉe la Libroservo de A.E.A.

Kiam mi estis pli juna, negativaj kritikoj pri Esperanto, kiel ekzemple tiu de Bodmer en "Loom of Language" incitis min, ĉar mi sentis ke ili estas maljustaj. Sed mi ne bone sciis kiel refuti tiujn asertojn pri manko de logikeco en la lingvo. Poste, ravis min la eseo de Kalocsay pri "La Evoluo de Nia Poezia Lingvo" en la volumo "Lingvo, Stilo, Formo". En ĝi, Kalocsay asertis, ke la logikeco de matematiko, sed ia "logikeco logikeco e matematiko, sed ia "logikeco pure senca". La kantantaj frazoj de la hungara majstro plene konvinkis min. Mi ne plu min ĝenis pri la afero.

Sed nun, en pensiga libreto, Dro Goodheir montras al ni ke, el la vidpunkto de la scienco nomata "logiko" neniu lingvo rajtas pretendi al tiu epiteto. Laŭ li, Esperanto ne estas logika lingvo, sed ĝi estas racia kaj praktika. Tion ni ne bedaŭru, ĉar lingvaj projektoj kiel Ido kaj Basic English estas mortnaskitaj ĝuste pro la "reduktista" kaj "minimumista" filozofio de iliaj kreintoj. Esperanto, male, vivas, ĉar Zamenhof elektis inter la eblecoj konataj al li laŭ praktikaj, ne logikaj principoj.

Jen valora kaj cerbumiga legaĵo por ĉiu pensema praktikanto de nia lingvo.

—R. McG.

## NIA NOVA INFORMILO

La nova, konciza informilo ESPERANTO IN AUSTRALIA estas nun havebla de la Libroservo (8 Lone Pine de, Matraville, 20356). Sendu po 5

cendojn, plus poŝtkoston, kiel kontribuon al represado (ekzemple \$2.40 por 40 ekzempleroj). (Se vi volas disdoni ĝin, sed ne povas pagi, vi ricevos ĝin senpage; la agado estas pli grava ol la ...ono.)

Sed mendu nur kiom vi povas TUIJ uzi. La uto: Tuj disdonu po unu al: Publikaj bibliotekoj, unua- kaj duagrada lernejoj (unu por la instruisto, unu por la infana biblioteko). Po unu al la urbestro, al ĉiu pastro, kaj al viaj lokaj ŝtataj kaj federala parlamentano. (Lasu la ĉefministrojn al la Federacioj de Esperanto).

Po unu al ĉiu dentisto, frizisto, kuracisto, por la atendejo, kaj poste regule inspektu por bezonata renovigo. (Ne donu grandan kvanton, kiu eble malaperos en la rubkeston post via foriro!). Po malgranda kvanto al via konata fidinda butikisto, kiu favoras Esperanton. Po unu al ĉiu redaktisto, radio-stacio, kaj konata ĵurnalisto en via loko.

Rezervu sufiĉajn por ĉiam havi unu preta por hazarde renkontita intereso (en via poŝto, mansako aŭ aŭto). Sed ne trudu ilin al homoj, kiuj evidente ne interesigas. Regule remendu laŭ bezono. Sed nepre NE lasu vian stokon sur la kluba breto por akiri polvon kun la Fundamenta Krestomatio! Tio NE utilus!

Skribu al la Libroservo vian unuan mendon NUN. Dankon.

—Joh nMoore, Emu Park.

## NIA LIBRO-SERVO OFERTAS

"Kriŝtanaŝka Triptiko" — Felix Timmermans. Elnederlandigis E. Paesmans. Tri kristnaskaj rakontoj. 45 paĝoj, broŝurita. \$2.10.

"Sciencaj Komunikadoj 1977" — 99 paĝoj pinglitaj. Dua kaj kompetenta aldono al Sciencaj Komunikadoj 1976 de la Komisiono pri la Sciencaj kaj Fakaj Aplikadoj de la Hungara Esperantista Asocio. \$5.20.

"La Mastro de Korboja" — A. H. Tammsaare. Elestonigis Benita Kart. 155 paĝoj. \$1.80.

"La Aventuroj de Lia Reĝa Moŝto Stultulo de la X-a de Fuŝio" — Satiro de F. V. Dorno, kun "Levu la Manojn!" Gaja tri-akta komedio de F. V. Dorno, 140 paĝoj, broŝurita. \$5.70.

(Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo, 8 Lone Pine Parade, Matraville, 2036)

Se vi dufoje pensus antaŭ ol paroli, vi ektronus, ke la edzino jam ŝanĝis la temon.

# NEWS - DIGEST

**OH TO BE IN FOLKSTONE NOW THAT APRIL'S THERE!** On 29th April and until 4th May, Esperantists from Britain, France, Belgium and other countries will forgather at the Southcliff Hotel, The Leas, Folkstone. No doubt a delightful time will be had in that delightful seaside spot during that delightful season.

**LOVE TO GO A WANDERING?** A recent issue of "Heroldo" gives a map of Europe showing locations of Esperanto courses, conventions, congresses, reunions, etc., during 1978. They extend, as usual, from the lands of somnolent siestas to those of snow and sunshiny midsommer nights. They range, too, from simple camps, through family holidays—such as those in Castle Gresillon at Bauge, France, — to quiet esoteric University Summer Schools for the erudite. An Esperantist can very pleasantly fill in several weeks abroad visiting various groups "of kindred mind".

**TWINKLE, TWINKLE LATIN STAR** Since European Esperanto news is easier to come by, we tend to forget that Esperanto is a truly universal movement. Yet, in South America, for example, the green star is still a twinkle. The "Venezuela Star", now to-hand, reminds us that the Latin-American Esperanto Congress for this year will be held from 17th to 22nd July in Marilja (near Sao Paulo, the 'Coffee City' of Brazil). It also points out that regional conferences will be held at Easter (in Argentina) and during July (again, in Brazil).

**BROTHERS IN LEBANON:** The "Venezuela Star" also draws attention to the plight of Lebanese Esperantists whose homes, whose meeting places, whose books and whose very livelihoods have been destroyed by the cruel civil war. Donations may be sent to A/c. No. 161.00.05499, Prof. Salah Ghanem, The Royal Bank of Canada, Middle East Dora Branch, Lebanon; or Lebanese

Esperanto Institute P.O. Box 11-9254 Beirut, Lebanon.

**THE "VOICE OF AMERICA":** In a recent function in Washington, the programme began with greetings in Esperanto to Dr. William Solzbacher, a well known academic who has for so long been associated with "The Voice of America". In the presence of many officials of the American Government Dr. Solzbacher responded appropriately in Esperanto.

The Russian Language "Voice of America" also broadcasts a long interview about our International Language.

**IN THE SERVICE OF SCIENCE:** Prof. Vasil Peevski, cheerful and distinguished member of "Honora Patrona Komitato de U.E.A." has published an article in "Science World" on "Science and the International Language". It appeared, not only in Esperanto, but also in the English, German and Russian editions of the publication.

**"SCOTS WHA HAE":** Dr. Albert Goodheir, a guid Scot, author and publisher, recently took five British teacher colleagues with him to Chiavari (Italy). There will be a reciprocal visit in the Northern Summer. Dr. Goodheir has also been invited to be visiting lecturer to various French Esperanto groups.

**PLAN NOW FOR 1981:** There have been Universal Congresses in the New World, e.g. Washington 1910, San Francisco 1915, and Portland 1972, but, in 1981, for the first time in history, the Universal Congress will be in SOUTH AMERICA. The venue is Brasilia, which is an ultramodern city of uniquely challenging architecture, with a very easy going way of life where there is little danger of even our Women's Lib. Esperantists being put behind bras.

Rumour has it that, somewhere on the Atlantic Coast of U.S.A. there will be a North American Congress followed by an Esperanto Caravan through Central America down to Brazil. If this eventuates, it should prove to be the "journey of a lifetime". See you there?

(Credits: Pilo Press, Heroldo, Venezuela Star).

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and  
pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063  
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095  
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 163 (243)

MELBOURNE

JUNIO, 1978

## LA 1-a LATIN-AMERIKA KONGRESO

Pro la celkonscia laboro de Ges-roj Grattapaglia, konataj pro sia penado en la Esperanto-kolonio 'Bona Espero', la unua Latin-Amerika Esperanto-Kongreso okazos en Marilia de la 17-a ĝis la 22-a de julio. Ges-roj Grattapaglia enmigris Brazilon el Italujo antaŭ kelkaj jaroj. S-ro Guiseppe Grattapaglia estas nun la UEA-Cefdelegito por Brazilo kaj S-ino Ursula G. estas UEA-Estrarano pri landa kaj regiona agado.

La kongres-urbo Marilia estas 460 km for de Sao Paŭlo kaj la lokaj instancoj forte subtenas la organizan komitaton. Speciala poŝto-stampo estos uzata dum la kongreso kaj la kongresanoj rajtos uzi senpage la komunumajn aŭtobusojn de la urbo. Eksterlandaj vizitantoj eĉ rajtos senpage veturi de Sao Paŭlo al Marilia. Okazos ankaŭ postkongreso en la urbo Bauru (110 km de Marilia).

Montriĝas granda intereso pri tiu tutkontinenta kongreso kaj ĝis 30-a de majo jam aliĝis 534 kongresanoj el 12 landoj. Radio Dirceu de Marilia dissendas dum la kongreso ĉiutagajn informojn en Esperanto kaj la televida stacio "TV-Globo" ĉeestos la inaŭguron.

Ni, kiuj organizis la unuan tutpacifikan kongreson, multe interesiĝas pri tiu unua Latin-Amerika Kongreso. "Australian Esperantist" estas reprezentota en Marilia. Speciala korespondanto, S-ino Elvira Fontes, Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Sao Paŭlo partoprenos la kongreson kaj promesis al ni sendi detalan kongresraporton.

## ESPERANTO: 'DANGERA' LINGVO

Ulrich Lins priskribis en sia libro, kiel danĝera diktatoroj kiaj Hitler kaj Stalin taksis Esperanton kiel popolojn ligantan lingvon kaj ke ili tial malpermesis ĝin. Ankaŭ en alia rilato ĝi povas aperi danĝera, ekzemple al lingvistikaj eldonejoj, se ili prezentas samtempe lernaĵojn por aro da naciaj lingvoj kaj Esperanto. En la kazo ke Esperanto estus akceptita kiel dua lingvo por ĉiu, la bezono je lernmaterialo en la naciaj fremdlingvoj malpliĝos. Do kontraŭus al la intereso de la eldonejoj oferti ankaŭ Esperanton inter la lerneblaj fremdlingvoj.

Ni ne scias, ĉu tio estis la motivo, kiam la granda germana fremdlingva eldonejo Langenscheidt aperigis sian novan liston pri eldonataj verkoj. Ĉar en tio estas prezentaĵaj lernaĵoj por 28 fremdaj lingvoj, sed inter ili nun ne plu por Esperanto, kvankam la firmao ĝis nun eldonis ankaŭ lingvan gvidilon kaj Lili-putan vortaron por Esperanto. La moto enkondukanta la liston ŝajnas aludi tion: "La estonteco estos plur-lingva. Lingvaj scioj - via kapitalo de morgaŭ."

## TRANSMARAJ REDAKTOROJ KAJ ELDONISTOJ ATENTU

Bonvole notu ke la adreso por sendi viajn interŝanĝ-ekzemplerojn kaj librojn por recenzo estas:  
"ESPERANTO", Box 2122 T.,  
G.P.O. Melbourne, 3001,  
Aŭstralio.

Se niaj priprenoj estas ĝustaj, tiam la ekkono de la dangereco de tiu senco egalus agnoskon de la signifo de Esperanto. Certe Esperanto disvastiĝanta ne forigus la tutan fremdlingvan intereson, sed nur limigus ĝin. Ĉu la tempo estas rigardebla kiel jam nun veninta, povas ŝajni dube. Ĉiukaze oni povus interpreti la novan sintenon de la eldonejo kiel respekto havata kontraŭ Esperanto. Ankaŭ nenio ŝanĝiĝus, se la eldonejo dirus, ke ĝi ne plu okupiĝus pri Esperanto pro tio ke ĝi havas tro malgrandan prestiĝon. Tio nur estas dirata por propagando, kiel ŝajnmotivo.

(Interlingvistika Informa Servo)

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

**PERTH:** Membroj kiuj ĉeestis je 18-a de aprilo povis vidi neordinaran ekspozicion. La gast-parolanto estis S-ro Percy Oliver, antaŭa ŝtudento kaj subtenanto de la Liĝo. Dum multaj jaroj S-ro Oliver kolektis poŝtmarkojn, bildkartojn kaj la poŝt-stampojn kiuj montras la lokon de enpoŝtigo. Kiel emerito li havis tempon por esplorado kaj posedas proks. 50 speciale presitajn kartojn por Esperanto-okazoj. La plej frua honoras la Universalan Kongreson en Dresden (1908), la lasta la ĵus pasintan kongreson en Launceston. Je 2/5 S-ro McGrath parolis pri la "Dek Principoj de Edzinoj". Sekvis vigla diskuto.

Tre sukcesa pikniko okazis 14/5, kiam 36 membroj kaj amikoj estis gastoj de David Miller ĉe Rolystone. Inter la vizitantoj estis Kapitano Miller, kiu pilotas "Jumbo"-jeton. Nia gastiganto lukse regalas nin kaj poste distris nin per piano-muziko. Frank Larter ludis la fluton.

**ADELAIDE:** Dank' al la klopodoj de S-ro Robert Felby, Esperanto denove ekflagris en Suda Aŭstralio. Je 23-a de junio grupo de 8 gesamideanoj kunvenis en la Universitato, ideala kaj centre lokita kunveno. Por akiri novajn lernantojn la ĉeestantoj decidis reĉlami en gazetoj, flughaveno kaj lokaj butikumoj, ankaŭ instigi al Y.M.C.A. kaj la Plenaĝula Vesper-Lernejo enkonduki Esperanto-kursojn.

**MELBOURNE:** S-ro Harry Beechey, 10/4, parolis pri "La religioj de la mondo". Tempo mankis por priskribi la

grandan nombron da religioj, do la klubanoj elektis Taoismon, religion de la kontraŭuloj de la Konfucea religio.

"Vilaĝaj geedziĝoj en Jugoslavio", estis la temo de prelego (17/4) de S-ro S. Kanački. Je la amuzvespero de 24/4, S-ro Ken Linton montris diapozitivajn kaj parolis pri la A.E.A.-Kongreso en Launceston.

S-ino Fay Koppel (1/5) parolis pri "Du famaj membroj de la Esperanto-Akademio"—KABE (K. Bein) kaj Rene de Saussure—kiuj multe influis la evoluon de Esperanto. Je 15/5 S-ro H. Koppel daŭrigis sian rakonton pri "Spertoj kiel gasto de Reĝo George la Sesa dum la Dua Mondmilito."

Harry Beechey, 22/5, daŭrigis sian klarigon pri "Taoismo". Ties anoj estas kontraŭuloj de la Konfucea religio, ĉar ĉi tiu konsistas el tro rigora etiko, kaj, do estas nenatura.

**SYDNEY:** 3/4 Prelegis S-ro C. Saaren pri "Lingvoj kaj Muziko". Li komparis la Finnian, Karelian, kaj Latvan lingvojn kun Esperanto. Poste li distris nin per ludado de sia memkonstruita koncert-citro, kiu estas unuvira orkestro.

S-ro Wre Chandler, 10/4 parolis pri "Abeloj kaj Abelkulturo". Li komencis per kopio de kavern-desegnaĵo el antikva Hispanio, laŭ radiokarbona datumado antaŭ sep mil jaroj, kiu montras kolektadon de sovaĝa mielo el truo en klifo. La unua priskribo de komerca abelkulturo venas el antikva Egiptujo antaŭ kvin mil jaroj. Li skizis la progreson de abelkulturo ĝis la lastatempa eltrovo pri la "miel-dancado" per kiu la abeloj montras al aliaj kie sin trovas multe da nektaro. Oni raportis ke ĉe la "Promenado kontraŭ Manko", Wre kaj May Chandler sukcesis promeni la tutan distancon, 20 kilometrojn, kaj ke ili estis la plej maljuna paro kiu finis la marŝadon.

Je 17/4 Tom Elliott prezentis elĉerpajn el la Esperanto-literaturo por diskutado, kiun sekvis vigla debato en ektemporalaj Esperanto. Wre rimarkis poste ke la plej bona rimedo paroligi la timemajn estas "paŝi sur ties kalojn".

S-ro T. Ilow, 24/4, montris lumbildojn pri Nepalo. Li montris kiel la nepalanoj estas ŝajne bonsanaj malgraŭ malpureco kaj manko de higieno. Kvankam la plimulto sin vestas krude kaj ĉifone, ili aspektas sataj kaj gajaj. S-ro Ilow planis montri bildojn ankaŭ pri Afganio, sed tempo mankis.

Oni raportis, ke la ĉiujara Kongreso de la "Kampara Virina Asocio" adoptis rezolucion petantan, ke Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj. Oni decidis,

ke la membroj de S.E.S. skribu al la gazetaro laŭdante la decidon.

1/5: La temo de David Gould estis "Amuzo per Numeroj". La partoprenado de la ĉeestantoj faris el ĉi tiu vespero interesan kaj guindan sperton. David montris magiajn kvadratojn kaj aliajn surprizajn kalkulojn. Li rakontis pri la huffriso, kiu postulis unu cendon por la unua najlo kaj duobligis la prezon por ĉiu sekvanta najlo. Estus pli ol kvar milionoj da dolaroj por meti la kvar hufferaĵojn sur nur unu ĉevalon.

**MANLY:** Dudek anoj ĝuis, 27/5, piknikon ĉe Hornsby, kie ilin ravis sinprezento de nova esperantisto. "Adrian", kiel tiu deziras nomiĝi, estas universitata studento, kiu nur 5 monatojn aŭtodidakte lernas Esperanton, kaj jam flue parolas.

S-ino Edna Giles, parolante pri la gejunula interesiĝo rilate Esperanton, raportis pri vizito al la Radio-Lernejo ("School of the Air") en Broken Hill, kie ŝi postlasis la broŝuron "Esperanto in Australia" sur la tablo de la estro. El tio sekvis peto, ke ŝi alparolu la geinstruistojn pri Esperanto, kaj plue, ke libroj estu alsenditaj por konatigi Esperanton al la lernejaĵoj.

—Edna Giles

**BRISBANE:** La 19-an de majo la kantgrupo surkasetigis 4 kantojn por sendi al E-grupo en Berlino. Trevor Steele aldonis raporton pri "Bona Espero". Tri klasoj studas ĉiulunde ĉe nia nova klubejo. En julio ni esperas starigi novajn klasojn por komencantoj.

**ST. LUCIA:** Je la 19-a de junio S-ino Winsome Greenhalgh kaj ŝia edzo foriris Brizbanon por pasigi ferion kun sia filino kaj ŝia familio en Usono. S-ino Greenhalgh esperas renkonti S-inon Peg Barkley, UEA-delegiton en San Francisco.

Inter junio kaj aŭgusto la klubanoj ĉeestos la klasojn ĉe la halo de la Ryan's Road Unuiĝanta Preĝejo, St. Lucia. Granda intereso por la klubanoj estis letero kaj gazeto, kiujn S-ino Ruth Morrison ricevis de amikino en Finnlando. Ĥiu ŝi renkontis dum la kongreso en Islando. S-ino Joycelyn Munro estas la nova instruistino de la komencanta grupo. — Decia Shonhan.

**IPSWICH:** Sep entuziasmaj komencantoj kunvenas ĉiujauĉe en la klasĉambroj de la Asocio por Plenaĝuloj. Tiu asocio ankaŭ reklamas pri nova klaso en junio.

**TOOWOOMBA:** Dudek anoj renkontiĝas ĉiusemajne en privataj domoj, speciale ĉe Kath Evans. La estraro por 1978 estas: Patrono: S-ro H. V. Petley; Prez: S-ino J. Lehane; Vic-Prez: S-ro R. Weis; Sekretario: F-ino Sandra Connors; Kasisto: F-ino Gloria Morgan.

**ROCKHAMPTON:** Ni nun havas 12 membrojn. La klubo donacis librojn kaj kasetojn al la Publika Biblioteko. La Generala Kunveno elektis la jenan estraron: Prez: S-ro R. McNeill; Vic-Prez: F-ino Joyce Turner; Sekretario: S-ino Palma Guy; Kasisto: S-ino Jane Daniels.

### Somera Lernejo ĉe Toowoomba

Kunlabore kun la Kvinlanda E-Federacio kaj la E-klubo de Toowoomba, la "Darling Downs Association for Advanced Education" planas inkludi en ties "Feria Lernejo" (8-18 januaro, 1979), Esperanto-Seminarion. Oni planas inviti S-inon Audrey Childs-Mee, instruiston de instruistoj ĉe la Lingvo-Akademio Berlitz en Roterdamo kaj foje instruiston ĉe "Kultura E-Domo, Kastelo Gresillon", gvidi klason de instruistoj kaj volontuloj ĉe la Seminario. La metodo de S-ino Mee estas modernigita Csehmetodo, kaj certe ĉiu partoprenanto fariĝos pli bona instruisto de Esperanto.

La kosto de la Seminario, inkluzive lito kaj ĉiujn manĝojn plus instruadon, ne estos pli ol \$200. La veturkosto de S-ino Mee estos kredeble \$1200. Nia tuja tasko estas varbi sufiĉe da partoprenantoj por validigi la elspezon. La gajno al la Esperanto-Movado en Aŭstralio estos nemezurebla.

Bonvolu teni liberaj la tagojn 8-an ĝis 18-an januaro, 1979. Plenajn detalojn kaj alĝilojn ni sendos kun venonta "A.E.". — Jean Lehane, Wre Chandler, (Rimarko: La r'multo da kongresanoj en Launceston NE subtenis la proponon ke A.E.A. pagu la vojaĝkostojn de S-ino Mee, pro manko de sufiĉaj financaj rimedoj.)

### Repris el nia gazeto

"Brazil Esperantisto" (Julio-Sept. 1977): "Esperanto kiel faktoro en la moderna vivo", de Janos Hamvai ("A.E." marto 1977).

"The Worker Esperantist", Britujo (Dec. 1977): "Postmilita anekdoto", de P. Schwerin ("A.E." junio 1977)

"The Worker Esperantist", Britujo (Feb. 1978): "The Brakes on the Wheels of Progress", de K. Linton ("A.E." junio 1977).

## NIAJ EKSTERLANDAJ KORESPONDANTOJ RAPORTAS

### NOVAĴOJ EL JAPANUJO

(De nia japana korespondanto  
Bun'iči Išizaki)

Lastatempe aro da eksterlandaj esperantistoj vizitis Japanujon kaj multe helpis propagandi Esperanton en nia lando.

El **ITALIO** venis F-ino Mikela Lipari, 29-jara ŝtatifacistino, kiu unue vizitis la urbon Jamaguči (suda parto de Japanio). S-ro Satoo jasuo gvidis ŝin dum tri tagoj ĉirkaŭ Jamaguči kaj Hagi, montrante al ŝi famajn historiajn lokojn. Vespere ŝi interkonatiĝis kun membroj de la loka E-societo, kiuj plejparte neniam antaŭe renkontis eksterlandan esperantiston kaj tial aplaudis la bonŝancon praktiki la lingvon. Familio Fujita gastigis ŝin kaj S-ro Harada Micuo, 72-jara estro de la Jamaguči E-Societo, gvidis ŝin per sia aŭtomobilo tra la ĉirkaŭaĵoj de la urbo.

El **DANLANDO** venis S-ro Henrik SCHLEICHER, filo de S-ro Ib. Schleicher, prezidanto de la Dana E-Asocio. Li alvenis en Jokohama per rusa ŝipo kaj estis tuj intervjuita de tagjurnaloj, radio kaj televidaj stacioj, kune kun lokaj samideanoj. Sekvintan tagon aperis raporto pri la alveno de Henriko en 2 ĵurnaloj, kun foto de la E-centro de Jokohama. Li unue vojaĝis per fervojo de Tokio al Hokkaido (plej norda parto de Japanio). Dum pli ol unu monato li vojaĝis tra Japanujo de nordo ĝis sudo kaj en ĉiu urbo li estis bonvenigita de esperantistoj. Li vizitis la E-grupojn de Jamagata kaj Nagoja kaj poste atingis la urbon Kameoka, la ĉefurbon de la Oomoto-movado kie li partoprenis la Oomoto E-Kongreson. Kelkajn tagojn poste Henriko vizitis la urbon Hiroŝima, kie membroj de la loka E-Societo montris al li la atombomb-memordomon. Fine li vizitis la urbon Fukuoko, kiu situacias sur la plej suda insulo de Japanujo.

El **BRAZILIO** vizitis nin S-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, esploristo de la fabrikejo "Acesita" pri mineralogio. Li gastadis dum unu semajno en Tokio por ĉesti kongreson pri mineralogio. Li estis gastparolanto ĉe kunveno de la klubo "Zamenhof", kiu kunvenas unufoje monate en la domo de la Japana Esperanto-Instituto. Li prelegis pri la vivmaniero, diversaj kutimoj, lingvoj kaj popoloj de Brazilo.

### EL NOV-ZELANDO

La 43-a Kongreso de la Nov-Zelanda E-Asocio okazis inter la 17-a kaj 21-a de januaro en la modernaj konstruaĵoj de la Massey-Universitato en Palmerston North. Aliĝis 70 personoj, inter ili Ges-roj R. Niŝida el Japanujo. Malfermis la kongreson S-ro Lithgow, la parlamentano por Palmerston North.

S-ro Naŝida, kiu estas budhana pastro, prelegis pri la japana E-movado. Al a ĉefparolanto estis D-ro Hamvai (Auckland), kiu prelegis pri la vivo kaj verko de la hungara aŭtoro Gardonyi kaj pri sia traduko de ties verko "La Nekonata Homo".

La 44-a NZ E-Kongreso okazos de la 10-a ĝis la 14-a de januaro, 1979 en Kolegio St. Matthew's en Masterton, urbeto ne tro malproksima de Wellington. Aŭstraliaj Esperantistoj rajtas partopreni tiun kongreson senpage. Plenajn detalojn vi ricevos de S-ino Mary Richardson, P.O. Box 330, Wellington, N.Z.

## NIA GAST-ARTIKOLO

### "NEUROVISION" 1978

Socian neŭrozon kaj eĉ publikan psikozon povas kaŭzi ne nur politikaj malsukcesoj kaj sociaj perturboj. Sufiĉas kontinuaĵ malsukcesoj en la kultura agado. Jen laste nia (izraela) piedpilka federacio estis eksigita el la Tutazia Unuiĝo de Piedpilkaĵ Konkursantoj, laŭ postuloj de niaj najbarlandaj rivaloj. Ne pro sportaj motivoj, sed ĉar nia ŝtato estas "kolonialista kaj agresema". Do, la loka Unuiĝo turniŝ sin al la Tut-eŭropa Unio de Piedpilkaĵ Societoj por esti akceptota en ĝin. Sed la lasta, ĉar ni situas en Azio rifuzis. Tial niaj piedpilka-ludantoj restis kun suben mallevitaj nazoj.

Koncerne al niaj korbopilkaĵ ludoj ni ankaŭ ne havas ĝojon. En 1976 niaj korbopilkaĵistoj ricevis la mondvenkan pokalĉen. Sed lastjare ili suferis du malvenkojn: de Madrida brigado "Rojal" kaj de la itala "Girgi-Varese". Tio ĉi forte deprimis nian publikon.

Eĉ sur tereno de ŝakludo ni malsukcesis, akirinte dum la mondturniro, se

mi ĝuste memoras, aŭ la 5-an, aŭ la 6-an lokon. Nur antaŭ 3 jaroj ricevis nia "belulino" la tutmondan "Belec?Reĝinecon".

Nun la kompatema Dio niĝ benis. Dum la tutmonda konkurso pri frenezo ni ricevis la unuan lokon. Temas pri la universala epilepsia konvuls-simila saltado, sub akompano de laŭtkriaĉado, nomiganta Eŭroviziono.

Por ricevi la unuan lokon oni elektis "kantiston" kun raŭke obtuza voĉo, scipovanta bojmuĝi kiel ŝakalo kaj ard-temperamente saltadi, kiel mordpikita de serpento. Kaj li kun kunularo ricevis 157 poentojn, kontraŭ 135 de belgaj samfakuloj. Pri muziko ne temas. Ĉar ne estas muziko, estis la t.n. "pop".

En certa usona filmo, antaŭ tre multaj jaroj prezentita, sin turnis la juna Mickey Rooney al la bela Deanna Durbin, invitinte ŝin kanti. Kaj ŝi aŭdigis belvoĉe ian arion. Ekpetis ŝin Rooney: "Bonvolu kanti muzikon!"

— "Ja mi ĵus kantis", respondis ŝi.

— "Ne", diris li, — "vi kantis operon, sed ne muzikon".

Kaj ŝi ekaŭdigis jazbande akompanatan ritmo-sonadon, t.n. "bugi-vugi". Konklude, ekzistas du specoj de son-aŭdigado: la tradicia muziko kaj la nuntempa "music". La lastan mi ne nur malaprobis, mi eĉ ne kapablas ĝin digesti...

Multaj kuriozaĵoj okazas en la mondo. Rakontis la mondfama bas-kantisto F. Salapin en siaj memoraroj ("Miaj maskoj"). Estinte junaĝe vagabondo, li kun amiko Aleksej Peŝkov (poste la fama Maksim Gorkij) piediris el urbo al urbo en ĉiujn aventurojn. En certa provinca urbo ili venis en operateatron petinte, ke oni akceptu ilin en la horon. La konduktisto ekzamenis ilian kantpovon. Maksim Gorkij estis akceptita, sed li, Feodor Salapin estis trovita maltaŭga kiel horana kantisto.

Kuriozo, ĉu ne? Sed tia kuriozo kiel tiu ĉi neŭrovizio de "pop-sonado" povas servi kiel diagnozo de niatempa muzika degenero, kaj ĝenerale, de niatempa kulturstato. De la tuta Eŭropa kulturo.

Forte ofendis nin, ke en kelkaj landoj, ĉi tiu venis la vico de la izraellandaj bojkantistoj aŭdigi sian kantaĉadon, la ŝtate direktitaj televidaj kaj radio-disŝendaj stacioj elŝaltis la disaŭdigon. Tion faris ekzemple Jordano, Sirio, k.a. Ankaŭ la kompat-kora Sovetunio. Verŝajne pro envio. Ankaŭ indiko pri ilia kultur nivelo.

— J. Kohen-Cedek (Jerusalem)

If "The Australian Esperantist" arrives incorrectly addressed, or if you should change your address, please supply the correct details to our  
Despatch Officer:  
Mr. Jack FALLU  
10 Sumersett Avenue,  
Oakleigh South, Vic., 3167

## NEKROLOGOJ

### DOROTHY HASLUCK

Je la 9-a de majo mortis in Jamberoo, N.S.K. F-ino Dorothy Hasluck, membro de la Sidneja E-Societo. Si vizitis malŝan ankinon sur farmbieno en Jamberoo por flegi ŝin. Si donis la matenmanĝon al sia amikino kaj reiris al la lito, kie ŝi pace mortis.

F-ino Hasluck naskiĝis en Nov-Zelando en 1896, do estis 82-jara ĉiam ŝi mortis. Si venis al Sidnejo en la jaro 1934. Si multe interesiĝis pri la naturo kaj ofte partoprenis la ekskursojn de la "Sydney Bushwalkers".

### LOUIS FEKONJA

Je la 8-a de majo mortis en Sidnejo S-ano Louis Fekonja, membro de la Sidneja E-Societo. Li estis malnova esperantisto, kiu lernis Esperanton en sia gepatra Jugoslavio.

La membroj de U.E.A. jam scias pri propono starigi Universitaton de Unuiĝintaj Nacioj, sed tiu temo sendube interesos aliajn. La temoj studotaj en ĉi tiu universitato estos internaciaj temoj, kiaj postrikolta konservado de nutraĵoj. Ŝi taksas, ke proksimume de dudek ĝis kvardek procentoj de la manĝaĵoj, kiujn oni kreskigas, estas neniam manĝataj de



homoj, ĉar tiom estas manĝata de ratoj aŭ detruata de putriĝo. Alia temo studota estas la diversaj bezonoj pri nutrado por homoj, kiuj loĝadas en diversaj partoj de la mondo. Japanio jam promesis donaci cent milionojn da dolaroj por starigo de tia universitato kaj provizi lokon en Tokio.

—K. G. Linton.

## JUNULARO

Elektiĝis la estraro de la AŬSTRALIA ESPERANTISTA JUNULARA ASOCIO. Prezidanto: Edith Kerr, P.O. Box 638, Launceston, Tasmanio. Sekretario: David Guy, 178 Thoret Road, North Rockhampton, 4701. Kasisto: S-ino Palma Guy. Membrokotizo estas \$2 jare. Personoj pli ol 25-jaraĝaj rajtas esti 'patronaj membroj' (sen voĉdona rajto). La Asocio intencas eldoni "Novajleton" Kvarfoje jare.

## BIGAMIO ?

Li-mia amiko N. - posedis prosperan entreprenon en Berlino. Sed dum la unua mondmilito li fariĝis germana militkaptito en Rusujo kaj estis transportita al Siberio. Tie oni laborigis la kaptitojn en fabriko, kiu produktis ledajojn. La posedanto de la fabriko estis rusa oficiro, kiu tiutempe estis ĉe la okcidenta fronto. Lia edzino "Maŝa" anstataŭis lin en la administrado de la fabriko. N., kiu devis labori tie, kompreneble sciis pli multe pri tiaj aferoj ol Maŝa, do li baldaŭ multe helpis al ŝi en la organizado kaj fakte antaŭ nelonge fariĝis la vera direktoro. La intima kunlaborado kun Maŝa ne povis ne konduki al flirto, ama afero kaj fine kvazaŭ-geedza vivado. Tio estis bona afero por ĉiuj, la fabriko, la edzino, la amiko N. kaj ties kaptitaj kamaradoj. Kaj neniu el ili tre bedaŭris la daŭran kontinuo de la milito. - -

Sed iutage la rusa posedanto revenis de la militkampoj por dusemajna forpermeso. Li tuj ekkonis la situacion kaj vokiĝis la kulpan kaptiton. "Vidu," li diris, "mi scias ĉion kaj mi komprenas. Se mi estus germana oficiro, mi certe mortpafus vin. Sed ne valoras . . . Post du semajnoj mi devas ree foriri al la batalfronto. Vi multe helpis al mia edzino. Vi bone prizorgis la fabrikon . . . daŭrigu tion . . . tion . . . kaj . . . ĉion

. . . ." Tiel fariĝis. Post kelkaj monatoj la rusa oficiro mortis en batalo, kaj la idilio en la fabriko vilaĝo daŭris.

Tutan jaron poste la milito finiĝis, kaj la germanaj militkaptitoj laŭeble komencis marŝante atingi la foran landlimon. Nia N., kiu per sia laboro disponis pli da mono, helpis multe al la aliaj kamaradoj, kaj nur post semajnoj li mem ekmarŝis al la hejmlando. Tiel okazis, ke unu el liaj kamaradoj atingis la hejmurbon antaŭ li, vizitis lian edzinon, kiu demandis lin, kiam ŝia edzo revenos. "Ho," estis la respondo, "li ne revenos, li ja havas tie sian Maŝan kaj vivas tre feliĉe kun ŝi."

Du tagojn poste N. tamen mem revenis al sia edzino . . . kaj li devis multon klarigi . . . Kaj ankaŭ ŝi komprenis . . .

—P. E. Schwerin.

## Gramatike -

Estas necese, ke ni komprenu la diferencon inter "dika" kaj "densa". Laŭ P.I.V. "dika" signifas: "granda laŭ la tria dimensio, kiu estas nek longo nek larĝo"; kiel duan signifon ĝi donas "malfluema", sed por tiu signifo mi preferas uzi la vorton "viskoza".\* Por la signifo de "densa" ĝi donas "prezentanta la karakterizan aspekton de substanco, kies eroj estas tre proksimaj unuj al aliaj; estas multnombre entenataj en malgranda volumeno". Ekzemploj de uzado estas jenaj:

- (1) A thick fog covered the whole town. (Densa nebulo kovris la tutan urbon.)
- (2) A thick layer of ice covered the water. (Dika tavolo de glacio kovris la akvon.)
- (3) The snow fell thickly on the mountain. (La neĝo falis dense sur la montojn.)
- (4) The plank was five centimeters thick. (La tabulo estis dika kvin centimetrojn.)
- (5) His head was thickly covered with fine hair. (Lian kapon dense kovris delikataj haroj.)
- (6) The crowd grew thicker each minute. (La homamaso plidensiĝis ĉiun minuton.)
- (7) She used to cut the bread too thick. (Ŝi kutimis tranĉi la panon tro dika.)
- (8) He spoke thickly, as if he were rather

drunk. (Li parolis malklare, kvazaŭ li estus iom ebria).

\*"viskoza": malfuema; malfacile fluanta". Kremo, mielo, kaj melaso estas viskozaj. —K. G. LINTON.

## RECENZOJ

**FORKAPTITA** ("Kidnapped") de R. L. Stevenson. El la angla tradukis Albert Goodheir. Eldonejo Kardo, Glasgow, 1976. 181p., broŝ. Angla prezo \$2.25. Libroservo de A.E.A.

Mi legis "Kidnapped" kiam mi estis infano, sed ial ĝi ne multe plaĉis al mi. Eble ĝia heroo estis tro modesta por mia tiutempa gusto. Do mi estas des pli danka al Dro Goodheir pro tio ke lia traduko donis al mi okazon relegi tiun faman verkon. Ĉi-foje mi tre ĝuis la legadon. Konfesinde, helpis la fakto ke pasintjare mi vizitis Skotlandon por la unua fojo kaj nun povas des pli bone bildigi al mi la fonon sur kiu tiaj (cetere fikciaj) aventuroj okazis. Sed tiu sperto nur aldonis spicon al la legado, ĉar Stevenson tre lerte prezentas la diversajn pejzaĝojn.

Temas pri la aventuroj de juna skoto en la periodo de la tiel-nomataj "jakobistaj" ribeloj de la 18a jarcento. Davido Balfour estas forkaptita je la instigo de fripona onklo kaj spertas surspitan batalon, ŝiprompigon kaj persekutadon antaŭ ol finfine ricevi sian laŭlegan heredadon.

"Forkaptita" estas ne nur atentokapta rakonto. El la personaro kiun vi renkontos sur ĝiaj paĝoj almenaŭ unu, la brava jakobisto Alan Breck Stuart longe restos en la memoro, ĉar en li Stevenson kreis portreton vere vivecan.

La traduko estas same fluegebla kiel la originalo kaj eble eĉ pli flue komprenebla, ĉar interpretitaj estas la skotismoj kaj arkaismoj de Stevenson. La tradukinto ankaŭ prezentas ĉe la fino de la libro tre oportunan ĝlosaron. Koncerne lingvouzon, la vorto "maljam", kelkfoje uzata, estis por mi nova. Mi ankaŭ rimarkis "butonita" anstataŭ la pli kutima "butonumita" kaj "amasitaj" anstataŭ "amasigitaj". Certe tiuj du formoj estas malpli pezaj, sed ĉu imitindaj?

En antaŭparolo kies ĉefa celo estas prezenti la historian fonon de la romano,

William Auld ankaŭ diras "Laŭ mia opinio, tiaj kolorplenaj, atentokaptaj, tamen literature valoraj legajoj tro malofte venas en la manojn de la esperantistoj, kaj mi estas certa, ke la libro ĝuos la sukceson, kiun ĝi nepre meritas". Mi same opinias. R. McG.

### DANSK ESPERANTO-FORLAG

ricevis, 1-an de aprilo, novan posedanton. Tiu estas Bent Holm-Laursen, Sdr. Alle 29, DK-8000 Arhus, Danlando. La ĝisnuna posedanto, L. Friis, Abyhoj, kiu fondis la eldonejon en 1932, devas pro aĝo kaj malpli bona sanstato rezigni sian entreprenon kiu aperigis preskaŭ cent titolojn, i.a. "Ĉu vi kuiras ĉine?", "Fianĉo de l'Sorto", multajn Schwartz-librojn, kaj la konatajn Lernolibrojn "Tom kaj Tina", "Sub la Verda Standardo", kaj "Ne tiel, sed tiel ĉi". Holm-Laursen daŭrigos la viglan aktivecon.

En Aŭstralio, la libroj de la dana eldonejo estas ĉiam haveblaj de nia Libro-Peranto, Tom Elliott.

### KONKURENCO

Juna kaj konscienca viro havis gazet-standon antaŭ banka konstruaĵo. Lutage, unu el liaj amikoj preterpase haltis kaj petis lin pri pruntedono de kvin doloroj. "Mi bedaŭras diris la junulo sincere, estas domaĝe, ke mi ne povas fari tion. Vidu, mi havas kontrakton kun la banko."

"Vi . . . kontrakton kun la banko? Kion vi volas diri?"

"Nu, komprenu, estas tiamaniere. Mi ne donas pruntojn. La banko ne vendas gazetojn. Estas perfekta interkonsento. Mi bedaŭras, sed tio ligas min."

—P. E. Schwerin.

Nenion oni donus pli malavare ol konsilon.

La devo estas tio, kion oni postulas de aliaj.

**ASIAN ASPIRATIONS:** Many Asians, esp. the Japanese, do very well in Esperanto, although there is a real problem of lack of Esperanto dictionaries in many Asian lands.

Apparently this problem is being overcome most satisfactorily in Iran where the Shah has made onslaughts on illiteracy and backwardness in technology and science. Thousands of Iranians are now reported to be learning Esperanto to catch up on the knowledge of the West.

# NEWS-DIGEST

**HOME TRUTHS FROM ABROAD?** From Nurnberg come these thoughts, relative to the 90th anniversary of Esperanto: Many aspects of Esperantism haven't changed. We are still battling away. We spend great sums of money on propaganda, without ever checking its effectiveness. Propaganda is useless unless the Esperanto movement has life, a special culture and a practical use. We blow our trumpets about "millions of Esperantists." In fact, these exist in name only.

Do you speak Esperanto? Do you correspond in Esperanto? Do you form part of Esperanto gatherings? Do you read Esperanto literature including our journals? Are you really a MEMBER of Esperanto organisations?

Now, as 90 years ago, our greatest enemy is, "I haven't time". (N.B. Views expressed are not necessarily those of the Editor).

**NEATH LE PONT D'AVIGNON:** You have probably all heard of Ann Gash, a member of Manly Club who sailed alone round the world (except for a small "gap" between Africa and England.) Who hasn't? Well, from Avignon, an island city, came a letter to S-ro Ivan Madder of Morwell. The writer tells of the thrill she received when she heard an Australian voice, speaking in Esperanto interspersed with Anglicisms and French, telling that she was Ann Gash an Australian Esperantist, just arrived by small boat moored by the bridge.

Of course, since Esperantists are universally hospitable, the intrepid wanderer was fested, shown the Papal Palace and made to feel at home. Doesn't this fill you with pride?

**QUITE A BURG!** Luxemburg city, with its white buildings and clean streets, its steep grassy embankments and its shady parks, is a delightful place. But it's not just a pretty city! It includes an impressive Esperanto Centre and a very active Esperanto Association.

The "Marienkalender", famed calendar for 100 years has, in this its jubilee number two pages in pictures and words (German) about the Centre and those who work in it.

**RUMANIAN FLAME:** We seldom hear about this country — though some of us may well see part of it during the Post Universal Congress Excursion this year. However, the well known Bucharest newspaper "Flagara" (The Flame) recently contained an article about the Rumanian Esperanto torch which, obviously, is burning brightly beside the Black Sea.

**TO THE CONGRESS?** The Esperanto Airlif, we mentioned some months ago is now likely to begin and end at Frankfurt, not Stuttgart as previously stated. This should be more convenient, as all international trans-German flights land at Frankfurt.

**ANOTHER NATIONAL HONOUR:** The President of the French Senate has awarded the gold medal of the Society for the Encouragement of Good Works to S-ro Rene Lech-Walter of Perpignan. These are some of his titles: "President of the French Esperanto Union, President of the Esperanto Languedoc-Rusiljono Cultural Centre at Perpignan, Polytechnic Association, Joyous Catalonian Troubadour, Secretary of the Cationian Red Cross, Treasurer of the Literature and Science Association, and member of the authors' and composers' society. What does he do in his spare time? Attend Esperanto gatherings, of course.

**OUT OF THE MOUTHS OF YOUTHS:** Otto Gessner, a university student has been elected President of the Esperanto Society in Wurzburg. His special aim is to attract youth. Let us hope that he can cure the generation imbalance in his part of the movement.

**COMMENDABLE TREND IN CROATIA:** 22 elementary schools in Croatia, as well as many colleges in other parts of Yugoslavia, now give Esperanto courses.

Credits: Pilo Press.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063  
Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095  
A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 164 (244)

MELBOURNE

Julio-Aŭgusto, 1978

## LA UNUA LATIN-AMERIKA KONGRESO

(De nia speciala korespondanto  
Elvira Fontes)

Kiam Tomas Antonio Gonzaga, portugaldevena poeto, uzante la nomon Dirceu, dediĉis belajn versojn al sia 15-jaraĝa amatino Maria Doroteia Joaquina Seixas, donante al ŝi la poezian nomon Marilja, li tute ne povis imagi ke tiu nomo estos donita, post pli ol 1½ jarcentoj al ĉarma brazila urbo. Kaj evidente li ne divenis, ke tiu urbo povos esti la sidejo de belega kongreso de Esperanto, — tute simple ĉar li mortis 50 jarojn antaŭ la naskiĝo de Zamenhof.

Marilja, la urbo naskiĝinta sub la signo de l'amo, gastigis de la 17-a ĝis la 22-a de julio, ĉirkaŭ 500 esperantistojn el 11 landoj (Anglio 1, Argentino 26, Francio 1, Germanio 1, Meksikio 1, Peruo 2, Ĉilio 2, Urugvajo 1, Usono 2, Venezuelo 2 kaj el 38 brazilaj urboj).

La malferman solenon ĉeestis kelkaj gravuloj, inkluzive de la urbestro de Marilja, honora prezidanto de la kongreso; la prezidanto de la urbkonsilantaro; la ĝenerala konsulo de Pollando, la reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, la reprezentanto de la Sekretario pri Sporto kaj Turismo de la ŝtato San Paŭlo, la reprezentanto de la Gubernestro de Brazilo; Ursula Grattapaglia, estraranino de UEA kaj la reprezentanto de la Ministro pri Telekomunikado. Saluti la kongreson Prof. Walter Francini, elokventa oratoro.

Dum la tuta kongreso, en aparta ĉambro de la kongresejo, kelkaj poŝtfunkciuloj akceptis la sendotajn korespondadojn. Ciu letero aŭ poŝtkarto ricevis la kongresan stampon.

Tre interesaj prelegoj pri la plej diversaj temoj riĉigis la vastan programon. Mi citu inter ili: "Esperanto kaj la moderna lingvistiko" — Prof. Geraldo Mattos, membro de la Akademio de Esperanto kaj profesoro ĉe Federacia Universitato de Parano; "Antibiotikoj en la moderna medicino" — D-ro Paŭlo Sergio Viana; "Cibernetika Pedagogio" — Prof. D-ro Osvaldo Sangiorgi, Universitato de San Paŭlo; "Praa Homo — Praa Scienco" — Pastro Jose Nogueira Machado, Recife. Ĉi tiu klera pastro celebris en la lasta tago de la kongreso meson en Esperanto.

Rimarkindaj programeroj estis: la lanĉo de la libro "ESPERANTO SEN ANTAŬJUGOJ" de Prof. Walter Francini, Vic-Prezidanto de la San Paŭla E-Asocio, kaj la ekskurso al la impona elektrejo en la urbeto Salto Grande, kie la kongresanoj estis bone akceptitaj de la urbestro kaj manĝis bongustajn frandaĵojn.

La kongreso rekomendis

- 1-Ke la landaj asocioj en Latin-Ameriko invitu kiel eble plej ofte, latin-amerikajn kongresojn en sian landon por regula interŝanĝo de ideoj kaj diskutado de problemoj;
- 2-Ke en la landoj, kie ankoraŭ ne estas organizita movado, oni laboru por atingi tion;
- 3-e Ke estas nepre necese al ĉiuj landaj asocioj aliĝi al UEA kaj

Poste li kaj lia familio veturigis nin tra Zilina kaj la belaj Tatraj montoj al Krakovo en Polujo, kie loĝas polaj amikoj, kun kiuj ni korespondas jam de kelkaj jaroj, ekde kiam mi helpis ilin trovi sian fraton en Aŭstralio.

Ni ĉiuj — Ĉeĥoj kaj Aŭstralianoj — loĝis en ilia malgranda apartamento dum kvin tagoj, kaj kvankam ni estis multaj en malgranda spaco, ni pasigis felĉan tempon kune. Estis ĉiam multe da ridado, kaj la manĝoj estis ege gajaj!

La Poloj ne scipovas Esperanton, kaj mi devis paroli kun ili germane. La Ĉeĥoj parolis ĉeĥe kun ili, la Poloj respondis pole, ambaŭ grupoj interkompreneble sin ĝis 90%! La filo de la pola familio, juna studento universitata, parolas bone la anglan kaj italan, kiujn li uzis kun mia edzino kaj mi. Ofte do aŭdiĝis ses lingvoj ĉirkaŭ la manĝotablo!

Pro la facileco kun kiu miaj ĉeĥaj amikoj kaj mi babiladis en Esperanto, tamen, la filo petis lernolibron kaj nun studas ankaŭ li la internacian lingvon!

Dum nia restado li kaj amiko lia, alia studento, kiun iom parolis angle, vidigis al ni la plej grandan parton de Krakovo, tre malnova, historia kaj bela urbo, kun granda palaco (la "Wawel") kaj multaj muzeoj, preĝejoj kaj aliaj vidindaĵoj.

Fine fluginte reire al Anglujo — kun larmoj ĉe la adiaŭo! — tra Varsovio, ni ĉiam memoros tiun ekscitan travivaĵon, ebligitan de Esperanto, konstatante eĉ pli ol antaŭe la neceson kaj utilecon de la internacia lingvo.

— Alan Towsey.

### Esperanto-Diservo en Londono

Se vi iam studis la historion de Eŭropo, vi eble scias ke, en la 16-a jarcento, multaj francaj protestantoj, persekutitaj en la propra lando, rifuĝis Anglujon. Por ebligi ilin adori Dion laŭ sia fido, la angla reĝo donis terpecon por fondi preĝejon.

La nuna preĝejo estas en Soho Square, en la Londona Okcidenta Kvartalo. Diservoj estas kondukataj konstante en la franca, hispana, pola kaj esperanta lingvoj.

Escepte de aŭgusto, je la dua dimanĉo monate, esperantistoj kunvenas en la Franca Protestanta Preĝejo kaj invititaj ovidantoj el diversaj eklezioj kondukas Diservojn en Esperanto.

Akustike la preĝejo perfekte taŭgas por paroli kaj kanti: aŭskulti la Lingvon Internacian tie estas memorinda sperto.

La unua Esperanto-Diservo okazis en 1912 kaj mi mem havas Ordon de

Diservo datumitan marto 12, 1939. Do, se vi iam vizitos Londonon, faru vian eblon partopreni Diservon en la preĝejo; mi estas certa ke vi estos benata.

—Harry Smith, Londono.

Dum mia vizito al Londono, mi ĉeestis la Dimanĉan Diservon kun Esperantistoj ĉe la Franca Protestanta Preĝejo en Soho, Londono. S-ro D. Deben gvidis la Diservon, kaj F-ino A. Gansler kantis en Esperanto. La orgensito estis S-ro L. Gentle.

Mi donis salutojn de miaj amikoj, S-ro Harry Smith kaj lia nevo, S-ro Geoff Dorow, kiu estas la redaktoro de "Kristana Alvoko", oficiala organo de Fellowship of British Christian Esperantists.

—Isabel Gale, Melburno.

## AŬSTRALIA = =KRONIKO

● **PERTH:** Lumbild-vespero okazis je 6/6. Jack Hawks montris diapozitivajn pri Afriko, Ruth McGrath pri Skotlando kaj Islando, H. Hutts pri Nederlando kaj D-ro Einihovici pri Islando kaj Skotlando.

Ges-roj Nath el Bangalore, Hindujo estis niaj bonvenaj gastoj je 20/6 Traduk- kaj konversaci-vesperoj okazis je 4-a kaj 8-a de julio.

● **ADELAIDE:** S-ano R. Felby raportas, ke la grupo regule kunvenas unufoje monate en la centre lokita Universitato. En la nova telefonlibro baldaŭ troviĝos ankaŭ la grupo sub "ESPERANTO GROUP of SOUTH AUSTRALIA" kaj la numero estas tiu de S-ino Beryl Randles 31-2668. Do, vizitantoj al Adelaide, nepre kontaktu la grupon aŭ skribu al S-ro Robert Felby, 11 Clare Street, Athol Park, 5012.

● **MELBOURNE:** Okaze de la Amuz-vespero je 29/5, S-ro Len McLochlan montris unikajn lumbildojn kaj informo parolis pri vojaĝo tra Bulgario. Je 12/6 S-ro H. Koppel invitis la membrojn al speciala vespero. Estis por li la 30-a datreveno de lia alveno en Melburno. Li rakontis, ke li alvenis el Kanado je la 8/6/48 en Sidnejo kaj 2 tagojn poste vizitis la Sydney E-Societon, kiu tiam kunvenis en ĉambro en la stacidomo de Milson's Point. S-roj W. Chandler kaj Matasin, F-ino F. Smith kaj S-ino K. Schwerin estis la unuaj aŭstraliaj E-istoj, kiujn li renkontis.

Je 19/6 S-ro S. Kanački priskribis la vivon en Jugoslavio sub germana okupado dum la milito, la malfacilojn kaj la timojn, sed jen kaj jen ankaŭ etajn triumfojn.

Cuj Melburnaj kluboj partoprenis la Duonarjarinan Vesperon en la Esperanto-Domo. F-ino Ann Hearn (Oakleigh) estris konkurson pri "unikaj travivaĵoj". La unuan premion gajnis S-ino B. Silva, kiu kortuŝe rakontis pri dumnokta arestado en patruja Litovio, de samurbanoj forkondukotaj en sklavecon en Siberio far la rusaj regantoj. Garry Killender dramece priskribis sperton en Hindujo. S-ro Stepanov rakontis pri renkontiĝo kun germana samideano, kiu vizitis Ruslandon. S-ro D. Pescod rakontis pri hazarda renkontiĝo en trajno kun la fama televida humoristo Benny Hill.

"Revo realiĝis" estis la titolo de prelego de S-ino F. Koppel (3/7), kiu aludis al la surluniĝo de du usonaj astronautoj en 1969 kaj kondukis al skizo pri la vivo kaj verkoj de Jules Verne.

● **SYDNEY:** Je 8/5 okazis ronddiskuto pri la propono "Malpermesi nudistajn plaĝojn". La plimulto konsentis, ke individuoj rajtas elekti ĉeesti nudistajn plaĝojn, kondiĉe ke ili uzu nur ŝirmatajn arandojn.

Volo Gueltling, 15/5, montris lumbildojn pri "Sidnejo de la aero". Li flugis super la Metropolo kaj faris multajn fotojn pri bonekonataj vidindaĵoj. Viktor Bourlin, 22/5, prezentis sian lumbildaron "Grimacoj de la Mondo". Kvankam ni jam vidis la plimulton el la bildoj, ni multe ĝuis revidi ilin. Viktor estas artisto, ne nur de pentrado, sed ankaŭ de humuro.

Robbie Robertson (29/5) montris lumbildojn pri aŭtobusa veturado tra Francio, Hispanio, Svisio kaj Italio por la Islanda Kongreso. Por multaj el ni la bildoj elvokis plaĉajn memorojn pri tiuj landoj.

—WRE CHANDLER.

Tadeus Ilow (10/7) montris lumbildojn pri Afganlando kaj Egiptujo, belajn scenojn de lokoj, kiujn ni ne ofte vidas. Li eĉ grimpis sur la Keops-Piramidon.

"La historio de la ciganoj estas en ilia lingvo", tiel D-ro Paspoti enkondukis libron, kiun li verkis antaŭ cent jaroj pri la ciganoj de Grekujo kaj Turkujo. Margaret Chaldecott en sia parolado pri la ciganoj, 17/7 prezentis liston de vortoj montrantaj la similecon de la lingvoj de anglaj kaj turkaj ciganoj kaj la Sanskrito. Post studado de la cigana lingvo, filologoj decidis, ke ciganoj unue venis el nord-okcidenta Hindujo, eble en la jaro 1000 p.K. Margaret ankaŭ parolis pri diversaj

moroj kaj kutimoj de la ciganoj. Tiu informo venis ĉefe el libro verkita de Jan Yoors, belga junulo, kiu loĝis dum 10 jaroj kun cigana familio.

Jim Harwood, 31/7, prezentis diapozitivon pri Svislando kaj montris la belajojn de la bela lando de la venonta Universala Kongreso. Frank Dunn, 7/8, parolis pri sia propra poezio. Ĉar oni ofte petis poemojn de li, je okazoj de festoj aŭ adiaŭaj vesperoj, li verkis angle.

Ce la Debata Societo de Mosman, Prof. R. Robertson parolis, 27/7, kontraŭ la temo " . . . ke la angla lingvo estas pli bona ol Esperanto kiel Universala Lingvo. Ne necesas diri ke li havis multajn subtenantojn kaj ke li venkis.

—Margaret Chaldecott

● **MANLY:** En la hejmo de S-ino Ruth Carruthers, 20/6 S-ro T. Ilow montris elstarajn lumbildojn pri Katmandu kaj Kabul.

Ges-roj Nath, esperantistoj el Hindujo, estis gastoj de S-ino Giles kaj poste de Ges-roj J. Matasin, 30/6 Dum kunveno en la Vesperlernejo de Manly, ili interese rakontis pri spertoj en Japanujo en 1977, kiam ili perdiĝis en Tokio pro lingvaj malfacilaĵoj. Fine ili estis savitaj de esperantisto. Ges-roj Nath propagandas Esperanton en Bangalore.

Arthur Cocking kaj Prof. Robertson partoprenis prezentadon en la televido kun la konata Mike Walsh. Ambaŭ bonege prezentis la utilecon de Esperanto.

Prof. Robertson ricevis inviton alparoli kunvenon de la Asocio de Kamparaj Virinoj en Orange.

S-ino M. Chaldecott estis la gast-parolanto ĉe nia klubo je 8/7, kiam ŝi parolis pri la ciganoj. (Vidu sub 'Sydney')

—Edna Giles

● **BRISBANE:** Malgraŭ la iom malvarma vintro, kursanoj kunvenas ĉiulunde, kaj kutime 12 ĉeestas ĉiusabate la konversacian rondon. S-ino W. Greenhalgh sendis plurajn bild-poŝtkartojn el Usono, kie ŝi kun la edzo nuntempe vizitas parencojn.

## EL LA FERERACIOJ

● **KVINSLANDO:** Dudek kvin membroj partoprenis konferencon en Bundaberg (29/30/4/78). Klubo en Brisbane, Rockhampton, Toowoomba, Ipswich kaj la Sunbrila Marbordo estis reprezentitaj. Sabate, S-ino Doris Sinclair prezidis la aferkunvenon, kiu decidis sendi al ĉiu provinca kaj kampara ĵurnalo specialan raporton, verkitan de John Moore, pri la

temo. "The Origin of Esperanto", kaj samtempe reklami pri kursoj en la samaj ĵurnaloj.

Sabatvespere okazis la oficiala vespermanĝo. S-ro Clements, membro de la Konsilantaro de Bundaberg partoprenis kaj faris la gastparoladon. Li ankaŭ restis dum kelkaj eroj de la distra vespero, kiun la ĉeestantaro tre ĝuis.

Dimanĉmatene konferencanoj vizitis la "Boskon de Avokadoj" apud Bundaberg.

La venonta konferenco okazos en oktobro en Toowoomba.

● **N.S.W.:** Dum la semajnfino 8-9-a de julio okazis konferenco en la W.E.A.-domo de Newcastle. Loka entuziasmulo, S-ro Derek Oubridge volas starigi E-Grupon, tial ni decidis ke Newcastle estus taŭgo loko. Pli ol 25 venis el Sidnejo kaj Manly, krom interesatoj el Newcastle.

La unua kunveno okazis sabate posttagmeze kun la kutima tagordo pri aferoj de la Federacio kaj diskuto pri fondiĝo de E-grupo en Newcastle. Post la kunveno Ges-roj Oubridge invitis la ĉeestantojn al festmanĝo. Samvespere okazis amuzvespero en la W.E.A.-domo. Arĥur Cocking lerte gvidis kantadon kaj alian partion de la programo. La urbestro de Newcastle vizitis la distran vesperon, salutis membrojn kaj esprimis bondezirojn al sukcesa konferenco.

Dimanĉmatene ni faris ekskurson tra la urbo kaj poste, S-ro A. Cocking gvidis nin al bela parko "Black Butt Forest, kie ni ĝuis promenadon en varma sunbrila vetero.

Dum aferkunsido (sabate) la ĉeestantoj decidis flankenmeti \$500 por la vojaĝ-kosto de S-ino A. Mee al la venonta Somera Lernejo en Toowoomba.

—Laŭ raportoj ricevitaj de S-ino E. Matasin kaj M. Chaldecott.

## SEKRETARIA RAPORTO

Donacoj - Publiciga kaj  
Generalaj Fondusoj.

1/1/78 — 31/7/78

S-ro W. Jaeger, Saratogo. NSW	\$28.00
Gesroj A. C. & E. C. Olivar, Orelia. W.A.	11.00
S-ro L. V. Scott, Manly. N.S.W.	10.00
D-ro & S-ino I. Einihovici, Floreat Park. W.A.	10.00
Ges-roj E. & I. Ammann, Maroubra. N.S.W.	8.00
F-ino W. Addis, Midindie, S.A.	8.00
F-ino V. E. Strahan, Glen Iris, Vic.	5.00
S-ro N. Butkumas, Bentleigh East, Vic.	5.00
F-ino A. Longson, Bentley. W.A.	5.00
S-ino F. N. Walter, St. Leonards, Vic.	3.00
D-ro K. & S-ino S. Bowling, Turramurra. N.S.W.	3.00
S-ino O. Wilkins, Bendigo. Vic.	2.00
S-ro P. Stervinou, Tuncurry, N.S.W.	1.00
	<hr/>
	\$99.00

### F. R. Banham Memoriga Fonduso

S-ro R. Harry, Canberra, A.C.T. \$20.00

### Specialaj Donacoj

Esperanta Edukada Fonduso, Brizbano, Al Aŭstralia Esperanto-Asocio	\$300.00
Sydney Esperanto-Societo Al A.E.A. Korespondkurso Servo	\$50.00
Aŭstralia Esperanto-Asocio Al N.S.W. Esperanto Federacio	\$100.00
(Kontraŭ peto por Subvencio por helpi pagi Kor/kursajn Reklamojn)	

Kluboĵ., Federacioj k.t.p., estas informataj, ke la Estraro de A.E.A. konsideros petojn por subvencioj por helpi kun pago de Esperantaj Reklamoj aŭ aliaj Publicigaj Kampanjoj. Samtempe, individuaj donacoj estos ĉiam bonvenaj por la supraj celoj.

### NOVAJ MEMBROJ de A.E.A.

Ges-roj M. & A. Ross, Fairlight. N.S.W.
S-ro Noel Smith, Geelong. Vic.
S-ro D. P. Mason, Mansfield. Vic.
S-ro P. Stervinou, Tuncurry. N.S.W.
S-ro Geo. Holding, Glen Waverley. Vic.
S-ro I. Grahovac, East Sydney. N.S.W.
S-ro C. Mossop, Petersham. N.S.W.
S-ino R. E. Stower, Toowoomba, Qld.
Ges-roj T. & G. Symes, Upwey. Vic.
S-ino B. Davies, King Island.
S-ro N. Dickens, Derby. W.A.
F-ino L. W. Burrows, Magnetic Island. Q.

### NIA LIBRO-SERVO OFERTAS

"La Granda Kaldrono" — John Francis 590 p., Broŝurita - \$18.90

"Rimlerteroj" — W. Auld kaj M. Boulton 93 p. — \$2.50

"Kantoj, Poemoj kaj Satiroj" — R. Burns Trad. Reto Rosetti kaj W. Auld — \$3.55

"Izolo" — Kalman Kalocsay, 77 p., Bindita — \$7.40.

"Don Quijote de la Mancha"—M. Cervantes 820 p. — Bindita — \$32.00.

Mendu ĉe A.E.A. Libro-Servo, 8 Lone Pine Parade, Matraville, 2036.

S-ino E. Nicholls, Jabur. S.A.  
 S-ro J. A. Ealy, Belmont. Vic.  
 S-ro W. Simpson, Macgregor. Qld.  
 N.S.W. 5; Vic. 5; Qld. 3; W.A. 1;  
 S.A. 1; King Island 1.  
 —Les Scott, Sekretario.

### A.E.A. Poŝtkesto ne funkcias aŭtomate.

Inter multaj aliaj oni povas trovi Poŝtkeston N-ron 415 en la Poŝtofiĉejo de Manly. Multaj leteroj kaj pakajoj venas el la tuta kontinento kaj fakte, preskaŭ el la tuta mondo. Estas bone, ke ekzistas konstanta adreso de A.E.A. por la ricevo de iu ajn Esperantaĵo.

La poŝtkesto ne aŭtomate kolektas kaj klasifas la demandojn, petojn kaj mendojn. Tiu agado estas unu el la multaj respondecetoj de la Sekretario — Les Scott.

La leganto de "A.E." estas invitita uzi la privatan adreson de Les, kiu loĝas ĉe 34 Ocean Road, Manly, 2095. Tiu informo ĉiam aperas sur la frontpaĝo de ĉiu eldono. Se tiu adreso estos uzata, tio certigos pli rapidan liveron de korespondado, sugestoj, petoj k.t.p. Ĉia komunikado estas bona!

### Pri la 22-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

Jan. 2-9, 1980

Estas kun granda plezuro ke ni povas anonci ke S-ro Ralph Harry partoprenos la kongreson.

La tuta programo estas ankoraŭ ne preparita, sed ni prezentos al la ĉeestantoj belan kongresejon, interesajn paroladojn kaj amikecon.

—Margaret Chaldecott

**Aŭstralia Norma Elementa Diplomo:** D-ro K. McG. Bowling, Sydney, kun hororo, 25-7-1978.

**Aŭstralia Norma Supera Diplomo:** S-ro C. F. Strochnetter, Pyengana, Tazmania, kun honoro.

### Korespond-kursa Servo

Jen raporto Informpetoj ricevitaj:	ĝis la fino de junio 1978;					Novaj Membroj
	Kursoj					
	venditaj:					Tuto:
	1	2	3	4	5	
12 Q.L.D.	1	0	0	1	0	2
14 NSW	6	3	4	0	1	14
10 VIC.	1	3	1	1	0	6
2 TAS.	1	0	0	0	0	1
1 S.A.	1	0	0	0	0	1
6 WA.	6	0	1	2	0	9
45	16	6	6	4	1	33
						8

Mi dankas al ĉiuj, kiuj helpis, helpas, kaj (mi esperas) helpos per daŭra reklamado, disdonado de **ESPERANTO IN AUSTRALIA** kaj alimaniere. "Guto post guto . . . traboras la monton granitan". Ni daŭrigu la bonan laboron!

Tre plaĉus al mi ankaŭ raporto pri kion vi faras, kaj kie. Skribu al mi, mi petas, pri via agado. — John Moore.

## RECENZOJ

**EPIFANIO**, de Shakespeare. Tr. William Auld. 71p. broŝ. Eldonejo Kardo. Angla prezo £1.80. Libroservo de A.E.A.

Kiam klubanoj ĉe ni iufoje prezentis scenon el "Julio Cezaro" laŭ la traduko de Reto Rossetti, oni iom mire konstatis, ke Shakespeare en Esperanta vesto estas pli facile komprenebla ol en la anglalingva originalo.

La dramoj de Shakespeare estas unu el la fieraj de la angla lingvo, sed paradokse ili havas por la meza leganto la grandan malavantaĝon, ke ili estas verkita en la lingvaĵo de antaŭ kvar jarcentoj. Do, la plejmulto el ni konas el tiu verkaro nur la elstare famajn, ĉefe tiujn kiujn ni, probable malvolonte, studis ĉe la lernejo.

Kun honto mi konfesas, ke mi neniam antaŭe legis "Twelfth Night", nek vidis ĝin sur scenejo. Erudiciulo mi memevidente ne estas. Pro tio mi celas al la bezonoj de mia samspeculo, la meza leganto. Tiuj kiuj jam bone konas la verkon en la angla prefere sin turnu al la recenzoj de Marjorie Boulton en "Brita Esperantisto" aŭ Bernard Golden en "Literatura Foiro".

Shakespeare okupis sin profesie pri la teatro kaj mem estis aktoro. Li verkis por la scenejo kaj ne por la leganto.

"Epifanio"-n li verŝajne destinis por prezentado dum la festo, kiu okazas dek du tagojn post Kristnasko. Do ĝi estas gaja komedio, sed kelkfoje kun malgajaj subtonoj, ekzemple en la belaj kantoj de la pajaco kiujn, parenteze, multaj rekonos eĉ se, same kiel mi, ili supozos ke ili nenion scias pri "Twelfth Night".

Orsino, Duko de Ilirio, amas riĉan, junan nobelinon Olivia kaj sendas al ŝi kiel mesaĝiston la junan Cezaron. Sed



Olivia, anstataŭ akcepti lian svatadon, ekamas la senditon — kiu efektive estas virino alivestita kaj mem amas la dukon. Sed Cezario, kies vera nomo estas Viola, havas ĝemelan fraton, liu tamen ne dronis post ŝiprompiĝo kiel ŝi supozis, kaj lia alveno tute ŝanĝas la verŝajne senesperan situacion.

Kelkaj domanoj ĉe Olivia - ŝia parenco la drinkema Sir Toby Rukt kaj ties malŝprita kamarado Sir Andreo Palvango, Malvoljo la malmodesta intendanto, Maria la inteligenta kaj sprita servistino kaj Feste la pajaco liveras al ni la plejmulton de la okazoj por ridado.

Kompari "Epifanion" kun la originalo estas interesa kaj instrua sperto. Oni sentas grandan admiron por la tradukinto, precipe kiam temas pri verŝajne neadukteblaj vortludoj kaj parolturnoj. Preskaŭ ĉiam Auld elpensis admirinde trafan ekvalenton. Komprenoble kiam temas pri poezio tion li majstre revestas en Esperanto.

Mi tamen bedaŭras la mankon de informo antaŭ-(aŭ post) parolo kian ni trovas en la ŝejkspiraj dramoj eldonitaj de Stafeto. Notaro ankaŭ helpus klarigi kelkajn enigmeccajn vortojn kaj aludojn. Kelkaj neologismoj bezonas gloson. Prezeraroj malmultas. "skevos" (p.20) mem-evidente devus esti "sekvos", sed "pli lante" anstataŭ "pli lante" vere ĝenas. Ne supozu (kiel mi, unuavide!) ke "kanumliantoj" (p.5) estas prezeraro. Ĝi estas intencita vortfuŝo sur la lango de la duonebria Sir Toby.

Mi esperas ke ne nur individuoj sed ankaŭ grupoj uzos ĉi tiun libron por informi kun ankoraŭ unu verko de la plej fama el ĉiuj anglalingvaj verkistoj — kaj samtempe sin plezurigi.

—R. McG.

## Gramatike-

S-ro V. J. Timmins demandis ĉu "elangligi" signifas "igi el la angla" aŭ "ĝisfine angligi". Bona demando, kiu tuŝas problemon, kiu ekzistas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la latina, angla, franca, kaj germana lingvoj. Ekzemple: por signifi "ĝisfine labori" ni uzas la vorton "ellabori", kiu en la latina estas "elaborare", france, "elaborer", angle, "to elaborate", kaj germane "ausarbeiten", en kiu "aus" egalas al "el" en Esperanto.

D-ro Kalocsay traktas la problemon en P. G. sub la rubriko, "Fina Aspekto", sed kvankam li mencias "fin", "tut", "tra", kaj "sat", kiel eblajn prefiksojn, en ĉiu li trovas difektojn, kaj malsukcesis prezenti solvon de la problemo. Vidu ankaŭ en P.I.V. sub "el".

Konklude mi konsilas uzi "elangligi" por signifi "igi el la angla", kaj "ĝisfine angligi" por la alia signifo.

—K. G. Linton.

### Eraro en la Studlibro por la Supera:

Posedantoj de tiu verko bonvolu fari la sekvan ŝanĝon: Sur paĝo 12, sub la titolo "La Infinitivo" en la resita linio, en la parantezo inter la krampoj metu komon post "alia" kaj ŝanĝu "infinitiva" al "finitiva".

### NUN HAVEBLAJ

ĉe A.E.A. Libro-Servo  
8 Lone Pine Parade,  
Matraville, 2036

Disko: "Al Vi de Mi" — R. Casey  
33 rpm. 30 cm \$8.50

Disko: "Kantas Miŝo Zdravev"  
45 rpm. 17 cm \$2.60.

## NEWS-DIGEST

WORK AND WANT NOT: The Yugoslav Esperanto Youth movement has organised, for August this year, an International Working Holiday (sic). One works 6 hrs. per day 6 days per week. Each participant gets free lodging, four meals a day, working clothes and shoes and travel expenses within Yugoslavia.

WHAT A DIAL! Around the short-wave radio dial there are many items in Esperanto. Here are various topics: Zagreb, cancer clinics and periodicals: Swiss Radio, Claud Gacond continues his series on the history of the Swiss Esperanto movement: Radio Vatican, "Letterbox" — comments and queries from all over the world:

Warsaw, twice weekly (not weakly) "Esperanto Ekspreso"—items as diverse as the football match against Argentina and Harry Tonkin's new year message: Vienna, stabilization of the Esperanto monetary unit, the Stelo.

**WORDS, WORDS, WORDS?** John Jones, Doctor of Divinity was a preacher; his brother, William Jones, Doctor of Medicine, was a medico. One day a new acquaintance asked one, "Are you the Dr. Jones who preaches or the Dr. Jones who practises?" A pertinent question hinted at by Dr. Humphrey Tonkin recently.

He pointed out that many words had lately been uttered in our support. Pres. Jimmy Carter said, "Better communication between individuals and nations is one of the chief methods of better international understanding and goodwill." S-ro Amadou-Mahtar M'Bow, Director General of Unesco, said, "The International Language can act as a cultural shield against the onslaughts of the 'big' languages and make possible direct contact between diverse peoples." The Soviet Union, several months ago, published an article very favourable towards Esperanto.

All this has happened before! In 1924 the French Academy of Science passed a resolution in our favour. So did the League of Nations. So did Unesco in 1954. Where are the words of yesterday? Dr. Tonkin points out that these words will become triumphant deeds only if we are determined to turn resolutions into resolute action.

**FERMENT IN ISFAHAN:** We have mentioned before that Esperanto has captured the imagination (and the resolve) of the Iranians. Now reports from that land indicate that learners range from 14 to 72. A keen protagonist is D-ro Saheb-Zamani lecturer in Islamic Law in the University of Teheran.

Why Esperanto? The Ministry of Education has found that the teaching of other foreign languages in Iran has been an abject failure. Successful examination candidates can NOT read or write in the languages of their choice.

What of English? It was proved to be an unspeakable flop!

**HURRAH FOR HERBERT:** Our esteemed Editor would be too modest to tell you, but his article gets pride of place on page one of Pilo Press (Nürnberg) now to hand. It is a report headed "Ralph Harry, honoured guest of the Australian Congress".

"Robbie" Robertson is, of course, duly spotlighted while Ralph Harry is referred to as "Launceston's famous son".

Herbert also assured "Pilo Press" that we "on the other side of the world" regularly use their news items in this column.

**FRIEND OF LEPERS:** Raul Folero, who wrote, "Nobody has the right to happiness in isolation" was remembered on World Lepers' Day. The Luxembourg Esperanto Centre printed an Esperanto digest of his "testament". Copies may be obtained gratis, provided return postage is paid.

Credits: Pilo Press.

**COUNTRY WOMEN'S ASSOCIATION:** Mrs. Bertha MacSmith, O.B.E., of Orange NSW writes: "In April this year, at the Annual Conference of the CWA of NSW, I put a motion that 'THE CWA WILL SUPPORT ANY MOVEMENT PROMOTING ESPERANTO AS AN INTERNATIONAL COMMON LANGUAGE'. This motion was passed unanimously by the 900 delegates representing 16,000 members. I have arranged for a public meeting to be called by the Mayor of Orange on 23rd August at which Prof. Roberston will be the guest speaker. Meantime I am to address the service clubs (Apex, Rotary, Quota, View) because I think, if the whole concept of the international language is explained, people would be anxious to hear Prof. Robertson on Esperanto".

Mrs. MacSmith is 86 years old and now blind. Can we who are younger and can see, now do less than our best to help?

Each year, starting about October, each CWA branch studies an overseas country. To help, contact your local CWA branch, find out which country and what sort of material is most needed. If you have no correspondent there and there is a DELEGITO of UEA in the country concerned, use the service (not forgetting the rules: enclose an international reply coupon and a UEA membership sticker, and repay any expenses incurred).

While you are about it, — if you belong to the eligible sex, — you might like to join the CWA anyway; they do a lot of good, their meetings are interesting, and they are a truly international organisation, through the International Country Women of the World.

—John Moore.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$12.  
(Individual, family, club, federation and pensioner)  
Full-time Students \$8



REDAKCIO: "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

Prezidanto: Prof. R. G. Robertson, 7 Euroka Street, Northbridge, NSW, 2063

Sekretario/Kasisto: S-ro L. V. Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095

A.E.A. Libro-Servo: S-ro T. Elliott, 8 Lone Pine Parade, Matraville, NSW, 2036

N-ro 165 (245)

MELBOURNE

Septembro, 1978

## La 63-a Universala Kongreso de Esperanto

okazis en Varna (Bulgario) inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto. Kun siaj 4413 aliĝintoj el 51 landoj, ĝi estis la dua plej granda Universala Kongreso iam okazinta. La propagando por Esperanto estis elstara kaj la nivelo de la artaj programoj tre alta. Sed tiu amasa kongreso alportis samtempe haosajn situaciojn. Kongresanoj atendis en longaj vicoj por akiri siajn dokumentojn. Evidentiĝis ofte ke ĉambroj estis plurfloje luitaj al diversaj kongresanoj.

Okazis eĉ, ke en lando kun la plej multnombra Esperanto-movado, mankis Esperanto-parolantaj deĵorantoj. La informa servo, la aranĝoj por nutri malatulojn kaj la dumkongresa servado preskaŭ ne ekzistis.

S-ro Arthur Cocking (Manly) kaj D-ro T. Einihovici (Perth) kapable reprezentis la aŭstralian Esperanto-movadon, Arthur, nome de A.E.A., salutis la kongreson ĉe la Malfermo kaj "D-ro Eini" havis la multifacitan taskon reprezentanti la aŭstralian Ĉef-Delegiton, K. G. Linton, ĉe la komitat-kunvenoj. Elstaris la brilaj paroladoj de U.E.A.-Prezidanto D-ro Humphrey Tonkin.

Peter Tanĉev, la unua vic-prezidanto de Bulgario, akceptis en gaja kaj amikeca atmosfero, en la reprezenta hotelo "Cerno More" (Nigra Maro), 500 kongresanojn kun gvidaj pozicioj en la Movado.

## La 51-a Kongreso de S.A.T.

okazis en a sudfranca urbo Lectoure inter la 15-a kaj 21-a de julio. La 272 kongresanoj el 13 landoj, post diskuto, akceptis gvidrezolucion, kiu "konstatas kaj protestas kontraŭ tio, ke malgraŭ

siaj solenaj deklaroj, la ŝtatoj senĝene malrespektas la homajn rajtojn." La rezolucio konstatas ankaŭ ke "la vetarmado kaj produktado de armiloj minacas detruiri la tutan vivon sur la planedo."

## La 4-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado

akazis inter la 22-a kaj 29-a de julio en la malnova, nord-hispana urbo JACA. Ceestis 102 personoj el 11 landoj (aliĝis 131). Ĝi okazis sub la aŭspicioj de la Universitato de Zaragoza kaj la Honora Prezidenteco de Lia ekscelenco la Ministro pri Kulturo.

La Inaŭguro okazis en la ĉefsalono de la urbdomo, sub prezido de la Urbestro. Prelegis D-ro Ivo Lapenna kaj S-ro Jean Thierry pri la ĉeftemo "Neŭtraleco kaj neŭtralismo". Pri la ĉeftemo "Eŭropo Hodiaŭ-Kulturaj kaj Politikaj Aspektoj" okazis 5 preleĝoj. Prezidanto de la Konferenco estis la konata multjara esperantisto Prof. M. Sancho Izquierdo.

La 5-a Konferenco okazos venontjare en Grekujo.

If "The Australian Esperantist" arrives incorrectly addressed, or if you should change your address, please supply the correct details to our  
Despatch Officer:  
Mr. Jack FALLU  
10 Sumersett Avenue,  
Oakleigh South, Vic., 3167

## VOJAĜA MOZAIKO

(De D-ro A. Einihoviĉ)

Ni flugis el Perto al Bombay kaj daŭrigis al Parizo. Bedaŭrinde, en Parizo, ni eksciis ke niaj valizoj iris al Londono kaj ni perdis 2 tagojn por rehavigi ilin, post granda penado. El Parizo ni vojaĝis al **Kastelo Gresillon**, kiu distancas 2 km de la urbo Bauge.

La Kastelo, vera Esperanta Domo, situas en tre antikva regiono, kaj estis, en 1951, aĉetita de S-ro Henri Micard, kiu dediĉis sian tutan vivon al la movado. Ĝia situacio en centro de bela arbaro allogas milojn da personoj el la tuta mondo. La konstruaĵo estas bela kaj tre taŭga por loĝigi preskaŭ cent personojn. La ĉambroj estas komfortaj kaj havas varman akvon. La Kulturdomo funkcias dum 3 someraj monatoj kaj iu ajn povas aliĝi por iu ajn tempo laŭ deziro. Tiuj, kiuj ne trovas liberan ĉambron, povas dormi en la najbara urbo Bauge, tamen povas manĝi kaj partopreni la aktivecon en la Kulturdomo.

Nuntempe la plej multnombraj grupoj estas la belga kaj nederlanda, sed inter la ĉeestantoj troviĝas reprezentantoj el 10 landoj, i.a. el Japanio kaj Irano. Post la matenmanĝo okazas kursoj (du grupoj) kaj la instruistoj estas tre spertaj. Sekvas prelego de partoprenantoj je sufiĉe alta nivelo. Temoj ĝis nun rilatis pri sciencfikcio, la movado ĝenerale, instruado kaj pri verkistoj Voltaire, Balzac kaj Jules Verne, pri saniga nutraĵo, Yoga kaj aliaj. Ankaŭ mi estis unu el la prelegantoj. Posttagmeze estas libera periodo por promonado al la urbo, ludoj aŭ naĝado en rivereto en la arbaro. Post la vespermanĝo okazas distraj vesperoj.

Ĝis nun mi taksas ĉi tiun lokon kiel la plej taŭgan por la movado. Ne malpli ol 30% estas junuloj, tre aktivaj, decaj kaj disciplinitaj. Pli ol 50% estas instruistoj. La respondeca direktoro de la Kulturdomo, S-ro Babin, estas tre kapabla kaj klera persono.

Post miaj spertoj en Svisio, "Bona Espero" kaj nun en Gresillon, ŝajnas al mi, ke nia movado devos dum multaj jaroj sekvi la sistemon de malgrandaj landaj kulturaranĝoj.

La organizado de la 63-a Universala Kongreso en **Varna** certe ne estis perfekta. Tro multe da eraroj kaj konfuzo. Nur post reveno al Perth mi ricevis de la L.K.K. aprobon pri la hotelo en Varna, kion mi mendis antaŭ sep monatoj. Mi opinias, ke la malefika organizado estis ĉefe la rezulto de metodoj uzataj en socialistaj landoj.

Multaj el ni atendis kun intereso la postkongreson en **Smoljan**, sed ankaŭ tiu —malgraŭ ke nur ĉirkaŭ 30 personoj partoprenis — estis en malordo: malmalpuraj hoteloj, manko de akvo, malkomfortaj ĉambroj, malkontentigaj manĝoj. Sed la lokoj, kiujn ni trapasis dum la vojaĝo de Varna al Smoljan, (Veliko Tarnovo, Gabrovo, Plovdiv, Careviĉ-Kastelo) estis trege interesaj, la pejzaĝoj mirindaj.

La Internacia Kursejo en **Pamporovo** situas en montaro, kie la panoramo estas mirinde pitoreska. La konstruaĵo estas de originala arkitekturo, la ĉambroj (200 litoj) tre komfortaj, balkonoj kun ĉarma panoramo al skikampoj, la kuirujo kaj manĝosalono grandaj kaj tre komfortaj. La prezo por loĝado, manĝoj, instruado kaj ekskursoj estas \$8 tage. La aero, kaŭze de verdaj pinoj kaj montara situo, la impona kvin-etaĝa konstruaĵo, ĉio estas tre alloga kaj faras impreson, ke tiu loko havas ŝancon fariĝi granda internacia Esperanto-Centro.

De Bulgario ni iris al **Gorizia** (Italio), kie okazis la 12-a Konferenco de la Int. Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kun partopreno de 150 personoj el 12 landoj. ILEI nun havas reprezentanton en Unesko. La sekretario, Mario Dazzini, estas trege aktiva. La urbestro tre multe helpis dum la tuta kongreso, same la Televideo, Radio kaj gazetaro.

Sekvis la 49-a Itala Kongreso en **Cesena**. La organizado estis sufiĉe sukcesa. La heroino de la kongreso estis la ĉarma instruistino Ganfranka **TADDEJ**, kiu instruas Esperanton al 400 gelnantoj, kiel devigan temon, en la Eksperimenta Stata Lernejo. La direktoro de tiu lernejo ne scipovas Esperanton, sed tre simpatias la movadon. Li kontribuis multe al la organizado de la kongreso, kaj dum vizito de la kongresanoj al la lernejo, li vigle kaj pacience klarigis la funkciadon de la lernejo. Li ankaŭ ofte partoprenis en la diskutado dum la kongreso, kompreneble en itala lingvo, kiel ankaŭ aliaj neesperantistoj de la loka loĝantaro. Ĉio estis tradukita en Esperanton. Same okazis kiam senatoroj salutis la kongreson. Entute la etoso estis tre agrabla, kaj ĉiuj estis tre kontentaj.

La plej kontentigaj partoj de la ĉi-jaraj kongresoj estis la multnombra partopreno de ĝejnuloj, kaj la intereso montrita de T.V., Radio kaj gazetaro.

- 
- A. Ĉu vi estas la fiulo, kiu diris, ke mi estas idioto?  
 B. Tute ne! Mi neniam prikritikas viron laŭ lia ekstera aspekto.

## PLI OL DEK PROCENTOJ

"Kiam mi ekloĝis en Brazilo", skribis angla ĵurnalisto, "mi opiniis, ke tio, kion oni rakontas al mi pri preternormalaj okazaĵoj, devas esti aŭ troigoj aŭ sensencaĵoj".

Jen ĝuste nia propra reago. Sed same kiel multaj aliaj "okcidentanoj" ni devas ŝangi nian opinionon. Verŝajne interesos la legataron de **The Australian Esperantist** legi pri almenaŭ unu tia okazaĵo kiu, kvankam apenaŭ klarigebla laŭ niaj konvenciaj konceptoj, malpli ŝarĝos la imagopovon ol multaj aliaj fenomenoj tie spertitaj.

Iam en aprilo mi vundis mian dorson dum laboro en la legomejo de Bona Espero. Mi povis nek sidu nek kuŝi komforte, kaj mia laborkapablo estis pro doloro kaj malforto nur ono de la normala. Oni transportis min al la bela kaj moderna hospitalo en Brazilio, kie mi prezentigis kiel unu el la miloj da "nepagipovuloj". Do la "kuraco" estis mallonga; la kuracisto forte pugnofrapis tri fojojn mian spinon kaj, ĉar mi nek svenis nek kriegis, plua ekzameno ne necesis. Mi revojaĝis al Bona Espero timante, ke eble la vundo iĝos permanenta.

Komence de junio kvar homoj vizitis Bonan Esperon, membroj de grupo, kiu esploras psikajn fenomenojn, ne maloftaĵojn en la esperanto-kolonio. La ĉefo de la kvaropo nomiĝas Sergio (pron. Serĵu), sed ĝia laboro dependas unualoke de la talentoj de la juna mediumo Paŭlo. La taĝon post ilia alveno mia edzino Edita suferis fortan kaj nekutiman kapdoloron. La edzino de Sergio, Lygia (Lija), demandis, ĉu Edita deziras, ke ili "deprenu" ĝin. Nu, kial ne? Ni eniris la bibliotekon. Edita sidis sur seĝo. Paŭlo sidis vidalvide, kelkajn metrojn antaŭ ŝi, sed ne rigardis ŝin. Sergio staris malantaŭ Edita kaj tenis la manojn super ŝia kapo. Ni aliaj kompletigis cirklon ĉirkaŭ ŝi. Paŭlo murmuris ion, kaj tuj Sergio petis nin koncentri niajn pensojn sur la kapon de Edita—sed ne estis normalaj pensoj. Li petis nin pense sendi "lumradiojn" por volvi ŝian kapon, ĉu bluan, ĉu violan . . . (mi ne plu memoras la sinsekvon de la koloroj, sed li diris, ke ĉiu koloro havas propran efikon). Sergio manĝestis, eble por aranĝi la fluon de la nevideblaj lumradioj, ĝis Paŭlo anoncis "finite". Edita starigis sen kapdoloro; la tuta kuraco daŭris nur du-tri minutojn.

Nu, mi pensis, tio estas ja stranga kaj impona, sed kapdoloroj povas rezulti el "memsugestio" kaj sammaniere malaperi.

Sed tiu doloro en mia dorso estas tre konkreta, certe ne la sekvo de iu mensostato . . . Do mi petis Sergio, ke ili iam provu kuraci mian dorsdoloron, se la tempo permesos. Ili promesis fari tion post la vespermanĝo.

Vespere. Mi kuŝas surventre sur la biblioteka sofo kaj malbone vidas, kio okazas. Paŭlo sidas, eble kvar paŝojn for de mi, sed ne rekte rigardas min. Sergio staras apud mi, la aliaj formas cirklon ĉirkaŭ mi. Paŭlo, kiu apenaŭ konas min kaj kiu ricevis nenian medicinan trejnadon, malrapide parolas, ĝuste diagnozante pasintajn vundojn de mia dorso kaj la kaŭzon de ĝia nuna doloro. Sergio direktas la grupon elsendi kolorajn "pensradiojn" por volvi mian korpon, iom post iom koncentrate pri la spino. Li ne tuŝas min sed mi konscias, ke liaj manoj pasas super mia spino.

Subite mi sentas aĝran sed agrablan varmon flui el liaj manoj kaj penetri mian dorson. Kvar-kvin fojojn nevidebla varmo-ondo trafluas min kaj sento de korpa bonfarto lulas min. Paŭlo indikas, ke mi estas kuracita. Mi stariĝas, kun elano mi fingrotuŝas la piedojn, mi klinas min malantaŭen, mi saltas, mi duobliĝas . . . nenia spuro de la kripla doloro.

Kaj nun Paŭlo senaverte demandas, Editan, ĉu ŝi sentas sin iom malbone. Fakte dum la lastaj monatoj ŝi spertis neklarigeblan naŭzeton, precipe post manĝoj, sed nur al mi ŝi diris tion kaj mi ne pluen parolis pri ĝi. Paŭlo diagnozas, ke iu parto de ŝia stomako kuŝas neĝuster: nun Edita memoras, ke kuracisto parolis la samon al ŝi antaŭ dudek jaroj, sed intertempe ŝi tute forgesis la aferon. Nu, mallonge dirite, oni kuracas ŝin laŭ la sama metodo, per koncentritaj koloraj pensradioj. Ŝia naŭzoseno ĝis nun ne plu manifestis sin.

Tiu grupo ne pretendas ian magian potencon; male, Sergio asertas, ke ĉiu homo posedas almenaŭ latentajn kapablojn "nekredeblajn", se nur li scias ilin evoluigi. La potenco de niaj pensoj lerte, direktitaj povas efiki "mirakle", kaj tion sciis multaj antaŭaj civilizacioj. Nia "akcidenta" civilizacio bedaŭrinde fidas nur je maŝinoj kaj iloj kaj neglektas senperajn homajn fakultojn.

Eĉ niaj sciencistoj foje plendas pri la 90% de la homa cerbo, kiuj onidire restas neuzataj. Ĉu niaj brazilaj amikoj utiligas parton el tiuj 90%?

—Trevor Steele

# AŬSTRALIA= =KRONIKO

● **PERTH.** La Ligo kunvenis je 4/7, 18/7 kaj 1/8 kaj la programo konsistis ĉefe el traduk-ekzercoj, gvidataj de Jack Hawks. Je 15/8 pluraj membroj montris diapozitivajn pri Nederlando kaj diversaj partoj de Aŭstralio.

● **MELBOURNE:** S-ro H. Koppel, 17/7, daŭrigis sian serion pri "Spertoj kiel gasto de Lia Reĝa Moŝto George VI-a". S-ro S. Kanački, 24/7, parolis pri naciaj kostumoj de Jugoslavio, montrante multajn belajn bildojn, kiujn li rilatigis al diversaj regionoj surmape. Li ekspoziciis ankaŭ bele broditan robon kaj pupeton en nacia kostumo.

Len McLochlan estis la parolanto ĉe la amuzvespero de 31/7. Li montris diapozitivajn kaj parolis pri vojaĝo tra Rumanio, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. S-ro H. Beechey prezentis, 14/8, treege interesan prelegon pri "Perdita Civilizacio" de la ŝtonepokuloj kiuj, laŭ freŝdataj elfosajoj montriĝis lertaj termezuristoj kaj astronomoj.

La Esperanto-Grupo en antaŭurbo OAKLEIGH kunvenis la 19-an de julio por adiaŭi sian prezidantojn Jack Fallu, kiu vojaĝos al Varna, Bulgario, por partopreni la Universalan Kongreson.

● **GEELONG:** Nova grupo fondiĝis en Geelong, la dua plej granda urbo de Viktorio, proks. 74 km sudokcidente de Melbourne. La nova grupo, kiu estis komencita pasintjare de F-ino Nan Loffel (nun S-ino Anthonisz), havas nun 7 membrojn kaj kunvenas ĉiulunde en la hejmo de membroj. S-ro Edward C. O'Brien (31 Cook Street, Newtown, 3220) elektigis kiel Prezidanto. Li ankaŭ estas nuntempe aganta sekretario La nova, vigla grupo aranĝos (27-29/10/78) la jaran seminarion de la Esperanto-Federacio de Viktorio.

● **SYDNEY:** Volo Gueltling, 14/8, prezentis lumbildojn pri aŭstraliaj kunvenoj en la daŭro de eble 15 jaroj. Tiel montriĝis vizaĝoj de amikoj jam ne vivaj, kaj aliaj longe ne viditaj. S-ro Tom Elliott, 21/8, daŭrigis temon antaŭe komencitan de Frank Dunn, "Kiu estas idioto, kaj kio estas idioteco?". La kamparo, popolo kaj urbetoj de la bela insulo Bali estis la temo de diapozitivaj montritaj de John Matasin (28/8).

Parolante pri la indiĝenoj de Sidnejo (4/9), D-ro Capell klarigis, ke antaŭ miloj da jaroj, inter Malajzio kaj Timoro, ekzistis nur unu granda insulo — Sunda — trans kiun venis la unuaj enloĝantoj — kun sia hundo, la dingo — disirante laŭ la marbordo en ĉiun direkton. Post-restaĵoj apud Lago Mungo (N.S.K.) datigas antaŭ 48,000 jaroj, aliaj en Nulabara Ebenajo antaŭ 22,000 jaroj. D-ro Capell ankaŭ priskribis la tribajn morojn kaj kutimojn.

S-ro W. Chandler, 11/9, kredante sin plurfoja reinkarniĝo, priskribis antaŭan vivon kiel Tartaro de proks. 300 jaroj A.K. Kontraŭ fono de la Granda Muro de Ĉinio li donis multajn detalojn pri ties malfacila vivo kaj kruela traktado far la despotaĵ regantoj. — M. Chaldecott.

● **TOOWOOMBA:** Je 3/8, membroj renkontiĝis por legado de teatraĵoj. Je 17/8, F-ino Connors montris bildojn kaj parolis pri sia ferio en Tasmanio. Je 26/8 S-ro J. Tweed, kiu estas la prezidanto de la loka Sak-klubo, estis nia bonvena gasto. Li parolis kaj klarigis al ni la ŝakludon.

Ni disdonis ĉirkaŭ 200 ekzemplerojn de "Esperanto in Australia" al ĉiu lernejo en la "Darling Downs"-regiono.

Je 28/8, nia kunveno okazis en la restoracio "Top of the Range". Ni diskutis planojn por la konferenco de la Federacio de Kvinlando en oktobro, la Zamenhofa Festo en decembro kaj la Somer-lernejo en januaro. Post la aferkunveno, S-ino Meg Blacker el Christchurch (N.Z.) parolis pri la E-movado en Christchurch kaj pri sia vizito al Kvinlando. Kafo kaj tortoj estis bongusta fino de la vespero. — Jean Lehane.

## McGREGOR COLLEGE SUMMER SCHOOL (Darling Downs Institute of Advanced Education)

This is the 10th Annual Holiday School in Toowoomba and will be held from 8th to 18th Jan. 1979. It offers 35 classes on a variety of subjects, including Esperanto.

**Fees:** Tuition \$85, Accommodation \$120. 25% reduction in tuition fee if 3 persons from one family enrol. Chief Instructor, Mrs. A. Childs-Mee (Rotterdam)

Inform the Vacation School Office when you are arriving and you will be met at the terminal.

For further information write (in English) to W. Nicol, P.O. Box 100, Toowoomba, 4350.